

# FILOZOFIA VORTARO

KOMPILIS
Dr. STAN. KAMARYT

ELDONIS MORAVIAJ ESPERANTO
PIONIROJ OLOMOUC, ČSR

# FILOZOFIA VORTARO

KOMPILIS
Dr. STAN. KAMARYT

ELDONIS
MORAVIAJ ESPERANTO PIONIROJ
OLOMOUC, ĈSR

1934
PRESIS HANÁCKÁ KNIHTISKÁRNA, OLOMOUC

Je brila memoro de modela pioniro
profesoro
THÉOPHILE CART
prezidanto de Esperanto Akademio
respektplene
Moraviaj Esperanto Pioniroj

**Antaŭparolo**

Celo de la verkinto de tiu ĉi libreto estis duobla: unue doni fidindajn klarigojn pri plej oftaj fakaj terminoj en filozofio kaj filozofiaj sciencoj, due helpi al tendenco en-estanta en arfefarita lingvo, ke signifo de ĝiaj vortoj evoluu al plia kaj plia precizeco la koncerne enhavon kaj amplekson. Ĉe terminoj filozofiaj tia unuecigo de la signifoj estus certe tre dezirinda. Tial la grandaj filozofiaj vortaroj franca de Lalande kaj angla de Baldwin almetis al siaj tifoloj tradukojn en la ĉefaj lingvoj. Sed la tasko veni al unusenceco aŭ pli bone dirite almenaŭ al samsenceco de filozofiaj ferminoj estas ekstreme maljacila kaj verŝajne plene ne atingebla. Ĉar ofte la pensulo, klopodanta montri novajn rilatojn inter la objektoj aŭ inter la ideoj pri ili, uzas la terminojn kun intence ŝanĝita enhano aŭ amplekso, donante al ili signifon, kiu ĝis tiam ne estis kutima. Tamen precipe tial utilos doni difinojn kiel eble plej precizajn kaj laŭ ebleco kompletajn. Grava malfacilaĵo estas en la konata fakto, ke diversaj terminoj, kvankam derivitaj de la samaj latinaj aŭ grekaj radikoj, tamen diferencas en apliko kaj signifo en la ĉefaj lingvoj.

La aranĝo de le artikoloj en mia verketo estas jena: Post la titolo sekvas le terminoj en angla, ĉeĥoslovaka, franca kaj germana lingvoj. Ĉeĥoslovaka termino estas donita en ambaŭ literaturaj formoj de mia gepatra lingvo, eĉ se ili diferencas

sole per diakritikaj signoj. Ne ĉiam estis trovebla ekvivelenta vorto nacilingva en ĉiu el la citataj lingvoj: tiam la leganto ĝin ne vidas. Poste sekvas difinoj de la termino. Se ili estas pluraj, ili sekvas laŭeble laŭ la ordo de ilia graveco ne laŭ la historia evoluo. Historiaj informoj estas donataj tie, kie ŝajnis al mi grave; ankaŭ la jaroj de apero de verkoj aŭ pri vivo de aŭtoroj. Certe ne ĉiu konsentos kun mia elekto kaj decido. Sed oni bonvolu pripensi, ke kompleteco ne povis esti celata ĉe amplekso de la verketo, kaj ke ĉia elektado estas necese laŭplaĉa. Mi klopodis ĉiam preferi difinon al laŭhistoria klarigo, sed tamen ie mi ne povis eviti tiun ĉi anstataŭaĵon de difino. La difinoj donataj koncernas preskaŭ ĝenerale nur la signifojn de vortoj en filozofiaj sciencoj sen atento pri ilia signifo en vulgara lingvo, precipe se tiu ĉi estas ĝenerale konata. Citaĵojn mi enmefis reletive mulfajn; iam mi volis per ili doni aŭtentikan klarigon aŭ difinon, iam mi volis venki malfacilaĵon tradukan ĉe fama aŭ malfacila teksto.

La vorfaro de Lalande enhavas  internaciajn radikojn“ ĉe fino de ĉiu titolo. Ili estis verkitaj de Couturat kun granda sperto kaj teknikeco. Bedaŭrinde ne estas ĉiuj uzeblaj, ĉar ili ofte tro dependas de la dogma konvinko de idisto. Cetere la empirio montris, ke Coufurat eraris pri la ido-principoj.

**A** en logiko simbolo de propozicio ĝenerala jesa laŭ la mnemonikaj versoj latinaj

*Asserit A,* negat *E, verum generaliter* ambo;
Asserit I, negat O, *verum particulariter* ambo.
Jesas A, neas E, sed *ĝenerale* ambaŭ:
Jesas I, neas O, sed *parte* ambaŭ.

**A = A** en logiko ofte uzata formulo por simboli principon de identeco.

**Abiogenezo** č. prvoplození, *prvoplozenie, g.* Urzeugung.

Spontanea generado, estiĝo de la vivo en siaj plej primitivaj formoj el la neorganika materio. Konvinko, ke abiogenezo estas ebla, bazas sur la fakto, ke ĉiuj vivaĵoj konsiatas el la samaj elementoj kiel la "neviva" materio kaj ke inter la ŝtofoj komponantaj vivajn korpojn validas la samaj leĝoj kemiaj, kiaj validas inter ŝtofoj el korpoj nevivaj. Tion plej konvinke pruvas la ĉiam pli vasta sperto, ke oni povas produkti en la kemiista vitro ĉiajn ŝtofojn trovatajn en la vivaj korpoj. Kontraŭ tiu ĉi sperto staras sperto ne malpli ampleksa kaj ne malpli konvinka, ke ĝis nun malsukcesis ĉiuj provoj produkti ian ajn formon de la vivo. Tiu negativa rezulto pruvadus konkludon, ke vivo estas fenomeno de alia kvalito, kiu produktas sin mem nepovante rezulti el ŝtofoj nevivaj; do, ke abiogenezo ne estas ebla. Tiu ĉi konvinko malfacile klarigas, kiele estiĝis la vivo sur nia planedo, se ĝi ne estis kreita de la Dio. Tiam estus ebla sole supozo, ke la vivo aŭ la viveroj enpenetris sur nian terglobon el la mondspaco, ke ili alflugis sur la teran surfacon kiel "k o s m o z o o j". *Spallanzani* pruvis en jaro 1765, ke por estiĝo de iu vivaĵo estias ĉiam necesa "ĝermo". *Pasteur* (1862) pruvis en sia glora esploro "pri la organismaj korpetoj en atmosfero enestantaj", ke en la aero ĉiam estas organismaj ĝermoj, kiuj enfalas en likvaĵojn senĝermajn kaj en ili vivas kaj kreskas. Pri eltrovo de Pasteur oni ofte proklamadis, ke ĝi pruvis neeblecon de abiogenezo; tio ne estis ĝusta, ĉar ĝi sole pruvis, ke organismoj ne povas estiĝi sub certaj artefaritaj kondiĉoj, sed neniel, ke sub aliaj kondiĉoj ili ne eblus estiĝi. Ernest *Häckel en* j.1866 proklamis tre laŭte kaj konvinke kredon, ke abiogenezo estas ebla; lin sekvis en tiu konvinko *Nägeli, Pflüger,* Roux kaj aliaj. Sed kvankam dum la lastaj dudek jaroj plurfoje estis anoncitaj sukcesoj en eksperimentoj produkti vivantan materion, tamen ĉiam montriĝis, ke la esploranto trompis sin mem kaj ke la observataj fenomenoj estas klarigeblaj alimaniere ol per viviĝo

de la neviva materio aŭ, ke la aranĝo de la eksperimento estas erariga. Ankaŭ kemiaj sintezoj de tre komplikaj organikaj ŝtofoj (albuminoj, hematino) ŝajnis esperigaj por fina sukceso de sintezo de la viva materio. Tamen en la plej nova tempo oni estas ĝenerale malpli konvinkita, ke tia sintezo baldaŭ sukcesos.

**Absoluto** a. the absolute. č. absolutno, f. l'absolu, g. das Absolute.
En metafiziko: Esto, kiu ne dependas de alia esto, ne estas de alia esto kondiĉata aŭ limigata, kiu estas pensata sen ĉiu supozo, kiu ekzistas per si mem kaj por si mem, kiu estas kaŭzo de la cetera esto. Absoluta estas, kio ekzistas en si kaj estas konceptebla per si“ (Spinoza). La vorto absoluta estas nun pli ofte uzata sole por montri, ke io dirita pri ia aĵo validas traktata en si mem, do interne“ (Kant, Kritiko de la pura intelekto). En la religioj estas la absoluta esto Dio. J. G. Fichte parolas pri absoluta Mi. T. W. Schelling pri la absoluta intelekto. Artur Schopenhauer jene parolas kontraŭ babilado pri absoluto“: La valideco de la propozicio pri la kaŭzo kuŝas tiome en formo de la konscio, ke oni nepre ne povas al si objektive imagi ion, kio ne postulus por si pluan kialon. Ke al iuj ilia malvigleco rekomendas ie ekstari kaj ian absoluton akcepti, tio povas nenion fari kontraŭ tiu aksioma certeco apriora.“ - En logiko: terminoj absolutaj metataj kontraŭ terminoj relativaj signifas nociojn rigardantajn sendependaj en tiu senco, ke oni metas ilin kvazaŭ enhavantajn neniajn rilatojn al aliaj terminoj. Homo estas termino absoluta, patro relativa“ (Litré). - En natursciencoj: Sendependa de ĉiu arbitra mezurilo: Absolutaj pozicio, movo, temperaturo.

**Abstraktado** a., f. abstraction, *č. abstrakce,* abstrakcia, g. Abstraktion.

Pensa procedo, per kiu ni venas el imagaĵoj specialaj al imagaĵoj ĝeneralaj eligante la signojn akcidencajn, nenecesajn, apudajn kaj kunigante la signojn esencajn, bezonajn kaj tial ĉefajn. La tiele konstruitaj pli ĝeneralaj imagaĵoj estas, kompare kun la imagaĵoj specialaj, artefaritaj, malpli naturaj ol la specialaj. La elekto de signoj, kiujn nia abstraktado konservas kaj kiujn ĝi eligas, dependas de la celo, pro kiu ni kreas la abstraktaĵojn. La fina abstrakta rezulto estas logika konceptaĵo. Estas klare, ke enhavo de logika konceptaĵo diferencas laŭ la intereso de ĝia kreinto. Ekzemple konceptaĵo de domo ne estas la sama por arkitekturo kaj por imposta sistemo; same konceptaĵo de floro tre grave diferencas por botanikisto kaj por pentristo. Kaj tamen ĉe ambaŭ ekzemploj temas pri imagaĵoj tre abstraktaj. A b s t r a k t a j oni nomas nun laŭ W. *Wundt* jenajn konceptaĵojn, al kiuj ne respondas adekvataj anstataŭantaj imagaĵoj." Th. *Ziehen* volas tute forigi la terminon abstrakta el filozofa lingvo, ĉar ĝi pro sia neprecizeco ofte helpis pruvadi metafizikajn trompaĵojn. Li volas anstataŭigi ĝin per du vortoj: ĝ e n e r a l i g i kaj i z o l i g i, kiuj nomigas la du vojojn, per kiuj oni abstraktas: aŭ eligante per vortoj la imagaĵojn el unueco de ia aĵo (izoligado) aŭ kunigante la komunajn signojn de similaj aĵoj en kunigantan konceptaĵon (ĝeneraligo).

**Absurda** a. absurd, nonsensical, č. absurdný, f. absurde, g. absurd, ungereimt, *widersinnig.*

En propra senco de la vorto: Kio ofendas principojn aŭ regulojn de la ĝusta t. e. logika pensado. Absurda ideo estas tiu, kiu enhavas erojn neakordigeblajn. Juĝo absurda estas tiu, kiu kunigas nociojn aŭ ideojn nekunigeblajn. Rezonado absurda estas tiu, kiu estas erara laŭ formala logiko. En tiu senco estas absurda pli ĝenerala ol forigo kontraŭa kaj malpli

ĝenerala ol malĝusta. - En lingvo komuna oni diras absurda pri ĉio, kio aperas malsaĝa aŭ malĝusta.
Rezonado per absurdo: tiu, kiu pruvas malveron de iu principo aŭ propozicio per absurdeco de ĝia konsekvenco. Speciale: Pruvo per absurdo (Probatio per absurdum) kaj redukto al absurdo (Reductio ad absurdum).

**Abulio** a. aboulia, č. abulie, abulia, f, aboulie, g. Abulie. Koncepto el psikopatologio. Nenormala stato konsisianta en manko de volo, posedo de tre malfortiĝinta volo, nekapableco veni al ia ajn vola decido, malfacileco koncentri atentemon. (Ribot, Malsanecoj de la volo. Störbing, Psikopatologio.)

**Adekvata** a. adequat, č. adekvátní, *adekvátny,* f. adé*quat, g.* adäquat.
Tiu koncepto, nocio, ideo, kono, kiu klare kaj tute esprimas kvalitaron aŭ esencon de sia objekto. Adekvata devas esti ĉiu difino. Spinoza nomas adekvata tiun ideon, kiu enhavas ĉiujn signojn de la vera ideo. *Leibniz* nomas adekvata tiun konon, kiu ĉion klare komprenis aŭ ĝis lasta fino analizis. - Adekvata kaŭzo: sufiĉanta, taŭga.

**Afekcii** a. affekt, č. působiti, pôsobiť, f. affecter, g. affiziren.
Elvoki, estigi ŝanĝon en anima aŭ korpa stato de vivanto. Ke la aĵoj nin afekcias, instruas pluraj filozofoj ekzemple Descartes kaj Spinoza. Laŭ I. Kant estas niaj konceptoj bazitaj sur afekcioj, niaj nocioj sur funkcioj. Objektoj estas al ni donitaj ekskluzive per tio, ke ili iel afekcias nian konscion. Ankaŭ la subjekto ekkonas nin nur tiel, ke ĝi afekcias sin mem.

**Afekcio** a. f. affection, č. afekt, g. Affektion.

En la plej vasta signifo de la vorto: ŝanĝo en ia stato. B. Spinoza klarigas ĉiujn fenomenojn kiel afekciojn de la substanco. S e n s a afekcio estas ekscito de la sensaj organoj per ia impulso. S e n t a afekcio (latine affectus) estas pli grava ekscito de la sentanta konscio; iam ĝi estas nomata emocio. Ĝi ĉiam posedas tendeneon forpuŝi el la konscio ĉiujn ceterajn enhavojn kaj samtempe elvokas diversajn fiziologiajn reakciojn (influas koron, sangujojn, glandajn sekreciojn, movojn); tiuj reakcioj naskas novajn perceptojn kaj sentojn influantajn siamaniere la afekcion mem, ofte ĝin malgrandigante, sed iam ankaŭ grandigante. Ĉiu sentafekcio estas subita ŝanĝo en la anima egalpezo; tiu ŝanĝo povas iĝi komenco de ia vola ago, sed ne ĉiam rezultas ago el la sentafekcio, ĉar ofle ĝi estas rapide malfortigata aŭ per aliaj ideoj ankaŭ kun la sentoj kunigitaj, aŭ per atento turnita al la afekcio mem, aŭ per volo instigita de alia ideo. Al ĉiu senta afekcio apartenas speciala fiziologia  esprimo“. Oni povas distingi sentafekciojn fortajn kaj malfortajn, vigligantajn kaj malvigligantajn. Sentafekcioj estas: Kolero, ĝojo, indignigo, timo, teruro, malespero, miro, envio, malgajo kaj aliaj. Estri sentajn afekciojn estas pedagogia postulato.

**Agnostikismo** a. agnosticism, č. agnosticizmus, f. agnosticisme, g. Agnosticismus.
Noetikaj doktrinoj, ke la esencon de fenomenoj, de la mondo, de esto, de absoluto la homo ne povas eĉ ekkoni. Ankaŭ ĉe la speciala problemo pri fenomenoj korpaj kaj psikaj ili kredas, ke esenco de tiuj fenomenoj ne estas konebla. La vorton kreis Thomas Huxley en 1869. Agnostikaj estas filozofiaj doktrinoj inter si alifake tre malsimilaj: Pozitivismo de A. Comte, Evoluciismo de H. Spencer, Relativismo de W. *Hamilton.* Eĉ pri kritikismo de I. Kant oni povas tion diri ĝis certa grado;

sed certe taŭgas tiu etikedo por nov-Kantanoj ekz. F. A. Lange.

**Aĵo** a. thing, čč. věc, vec, f. chose, g. Ding.
La plej ĝenerala termino nomiganta ĉion, pri kio oni supozas ekzistadon. En noetiko ĝi esprimas ideon de io reala, konceptata en empiria senco kiel apartigita aŭ apartigota, konsistanta el fiksa sistemo de kvalitoj. Oni do metas aĵon kontraŭ fenomenoj. Suno estas aĵo, eklipso okazaĵo." En tiu senco aĵo kaj objekto estas metataj kiel sinonimoj, sed objekto ofte havas pli grandan amplekson, ĉar ĝi signifas ĉion, kio estas perceptebla, do ankaŭ fenomenojn kaj rilatojn sur kaj inter aĵoj. - En metafizika senco oni iam uzas Aĵo en simem (a. thing in itself, č. věc sama o sobě, vec sama o sebe, f. chose en soi, g. Ding an sich) por montri tion, kio ekzistas en si mem, kio estas sia propra substanco. Kant ofte rezonas: Se la fenomeneroj estus aĵoj en si mem. . .“ tio estas, se ili ekzistus ekster nia imagado. Estas granda merito de Kant, ke li klare metis la demandon: Ĉu la aĵo en si mem, tio estas ideo, kiu ne posedas ian alian signon ol sian propran ekziston, ekzistas? Kaj montris, ke tia aĵo en si mem ne estas ebla. - En etiko aĵo estas kontraŭmetata al persono. Aĵo ne povas esti posedanto de si aŭ de alia aĵo, persono estas posedanto de propra juro sui juris“, povas posedi aĵojn, povas havi rajtojn.

**Akademio** a. academy, č. akademie, akademia, f. Academie, *g. Akademie.*
Origine nomigo de skolo de Platono laŭ la arbetaro de Akademos en Athenai, kie li kunvenadis kun siaj disĉiploj kaj amikoj. Oni distingas kvin akademiojn antikvajn: La pli malnova *(Platon,* Speusipos, *Xeno*krates, Krates, Polemon, Krantor) bazis ankoraŭ plene en doktrinaro de Platono. La meza (Arkesilaos) kaj la pli nova (Karneades) estis ambaŭ sub

influo de skeptikismo. La kvara *(Philon el Larisa)* denove re-venis al dogmismo. La kvina (Antioĥos el Escalon) kunigadis doktrinojn Platonajn kaj Aristotelajn kun elementoj stoikaj. Komence de la nova epoko fondis en Firenze (1459) Cosimo *el Medici* Akademion, kiu volis imiti akademion Platonan; ĝia spirita ĉefo estis *Marsilius* Ficinus. - Nuntempe oni uzas tiun nomon por societoj de sciencistoj kaj artistoj celantajn or-ganizon de esplora scienca aŭ krea bel-arta laboro. Membreco de tiaj akademioj signifas kutime honorigon de la elektitoj. En sfero de germana kaj de kelkaj slavaj lingvoj oni nomas krom tio akademioj kelkajn duagradajn lernejojn fakajn (komercajn, maristajn, pedagogiajn, muzikajn k. s.). Iam oni nomas a. kon-certon. Tiu ĉi uzo en esperanto estas evitinda.

**Akademia filozofio** aŭ **filozofado**.
Tia filozofio, kiu esias sen kontakto kun problemoj de praktika vivo, de politiko, sociaj okazintaĵoj, kiu pro tio aŭ pro aliaj kaŭzoj neniel influas la publikan opinion. Ofte uzata en malŝatiga senco.

**Akcidenco** a. f. *accident,* č. nahodilost, *g. Akzidenz.*
l. Akcidencaj estas tiaj ecoj de fenomenaĵoj aŭ objektoj, kiuj kontraŭe al atributo estas kontingentaj, tio estas ŝanĝeblaj, kiuj aperas kun aĵoj nek ĉiam, nek necese, nek kutime.
2. Akcidenco estas tio, kion ni ĉe objektoj konas, kiel objektoj aperas, kiel ili ŝajnas al ni, ekstera apero de la objekto sen rilato al ĝia esenco. Komparu: Atributo, Substanco.

**Aksiologio** a. axiology, f., č. axiologie, g. Axiologie. Doktrinaro pri valoroj. A k s i o l o g i a : laŭ valoro; taksante, juĝante laŭ valoroj.

**Aksiomo** a. axiom, č. zásada, axioma, f. axiome, g. Axiom.

La plej abstrakta, la plej ĝenerala propozicio, juĝo per si mem evidenta, pruvon nebezonanta, kiun oni ne povas transformi en alian, sed el kiu ĉiu scienca rezonado eliras. La plej ĝeneralaj aksiomoj estas logikaj principoj: propozicioj pri identeco, pri foriga kontraŭeco, pri la ekskludita tria, pri la sufiĉa argumento. Sed ĉiu scienco havas siajn aksiomojn specialajn; ili devas esti kiom eble plej malmultaj. - Oni povas rigardi *Eŭklidon* kiel kreinton de tiu ĉi nocio per ĝia uzo en lia geometrio por propozicioj geometriaj validantaj sen pruvo. Ekzemple: Du rektoj paralelaj kun la tria rekto estas paralelaj ankaŭ kun si mem.

**Aktivismo** a. activism, č. aktivizmus, f. activisme, g. Aktivismus.
Speco de pragmatisma doktrinaro, ricevinta nomon de R. Eucken (* 1878). Same kiel pragmatismo ĝi igas veron esti afero de la vivo kaj de ago multe pli ol de intelekto, kaj rigardas kiel ĉefan signon de la vero ĝian fruktodonecon por agado. Ĝi diferencas de la pragmatismo en tio, ke ĝi kredas, ke la vero estas io pli profunda ol nura homa decido, ke la vero estas vero ne sole ĉar ĝi estas utila, sed ĉar la kosmo movas sin al la spiriteco kaj tiele trovas daŭre sian profundecon kaj transformiĝas tiamaniere el regno de rilatoj en veran realon. Tiu ĉi realo ne dependas de nia sperto pri ĝi kaj tia vero estas komprenata intuicie tra aktiva vivo. - F. Rauh difinas jene: Starigi sin en la senperan vicon, studi estinton, kiu efikas je ni distinge kaj kontinue, preni vidmanieron de la estanto, jen la aktualismo aŭ, se oni volas, aktivismo, kiun ni rigardas tute prava en moralaj esploroj."

**Aktuala** a. actual, *č. aktuální,* aktuálny, f. actuel, g. aktuell.
1. Kio en nuna momento ekzistas agante aŭ efikante. Energio aktuala aŭ kinetika estas tiu, kiu enestas en viva forto,

kontraŭe energio potenciala enestas en stato de sistemo, kies movon ni ne povas percepti (energio kemia, energio de du korpoj en ekvilibro).
2. Kio ekzistas aŭ okazas aŭ interesas en aŭ por la momento, en kiu oni parolas.
Teorio de aktualeco, doktrino, ke la realo ne estas ia daŭranta netransformiĝanta esto sed senĉesa estiĝo, la unuopaj objektoj" nur percepte fiksitaj momentoj, kondensigitaj punktoj en la eterna fluo estiĝas. Fondinto de tiu ĉi doktrino estas *Herakleitos* (540-480 a. K.) pro sia instruo, ke ĉio fluas. La moderna teorio aktualeca estas energiismo.

**Altruismo** a. altruism, č. altruizmus, f. altruisme, g. Altruismus.
Etika principo, kiu vidas celon de la homa agado en la bonfarto de la proksimulo; ankaŭ kialojn de la agado ĝi trovas aŭ en tiu bonfarto aŭ en la t. n. sociaj sentoj de la unuopulo (simpatio, seksa instinkto). *Darwin* en sia verko Origino de homo" (ĉap. IV.) vidas la efektivan bazon de ĉiuj moralaj sentoj en la sociaj instinktoj, pro kiuj la animaloj trovas plezuron en la societo de siaj kamaradoj, en la sento de ia simpatio al ili kaj en farado por ili de diversaj komplezoj."
Tiun opinion de Darwin tre lerte uzis P. Kro*pothin* por fundamento de sia etiko, kaj liajn ideojn konsekvence finpensis kaj aktualigis amerikaj instrumentalistoj precipe J. Dewey, derivante altruisman etikon el empiriaj faktoj de solidareco kaj simpatio tute nemateriaj kaj tamen plene empiriaj. - La termino estis kreita de A. Comte kontraŭigonte egoismon; akceptita de Spencer; tre kutima en lingvo filozofia.

**Analizo** a. analysis, č. analýza, rozklad, f. analyse, g. Analyse.
Disigo de iu (homogena) unuo en (heterogenan) pluron, de iu tuto en ĝiajn partojn aŭ materie (analizo kemia) aŭ ideale

(difini estas analizi la nocion). Elementa analizo disigas la fenomenon en ĝiajn partojn ne atentante la proporciojn inter ili. Laŭkaŭza analizo disigas fenomenon en ĝiajn partojn atentante la laŭkaŭzajn rilatojn inter ili. L o gi k a analizo estas disigo de komplika fakto en ĝiajn partojn atentante iliajn rilatojn logikajn (W. Wundt en sia Logik). Analizon fenomenologian distingas Edm. Husserl de analizo p s i k o l o g i a : la unua signifas disigon laŭ signifo, la dua laŭ konsisto.

**Animalismo** č. animalizmus, f. animalisme, g. Animalismus.

Antaŭŝtupo de la religio, kredo ke ĉio, ŝtonoj, arboj, riveroj estas vivantaj simile kiel la homo.

**Animismo** a. animism, č. animizmus, f. animisme, g. Animismus.

Antaŭŝtupo de la religio, prezentas al si, ke en la mondo ĉio, almenaŭ ĉio posedanta ioman gravecon, havas propran animon. Tial ĝi estas nomata ankaŭ hilozoismo. Plej frue oni kredis, ke tiuj animoj (spiritoj) estas ligitaj al certaj objektoj nepovante el ili eliri, poste naskiĝis ideo, ke ili povas libere sin movi ekster siaj objektoj. Iniciato al tiuj imagadoj venis verŝajne el sonĝoj. La primitiva homo versimile ne sciis distingi inter sperto pri efektivo kaj pri neefektivo kaj rigardis siajn sonĝojn veraj kiel ceteran spertaĵon. Kaj ne sciis doni al siaj sonĝoj alian klarigon ol ke lia animo elirinte el la korpo libere vagas tra la mondo.

**Animo** a. soul, č. duše, duša, f. ame, g. Seele.

Ideo pri interno de la homo; organismo materia aŭ energia sistemo, kontraŭata al ekstero (tio estas al korpo materio). Principo de la vivo, pensado rigardata kiel estaĵo distingebla de la korpo. Sumiga koncepto por ĉiuj psikaj funkcioj de plasmo“ (E. Häckel).

Interna esto de la sama unueco, kiun ni ekkonas ekstere kiel apartenantan al la korpo“ (W. *Wundt).* Ĉiam estas en ideo de a. enhavita ideo de ia dualeco de la ekstera kaj interna mondoj, de materio kaj spirito aŭ se ne dualeco do almenaŭ provizora kontraŭmeto de tiuj du konceptoj. A. distingas sin de la vorto spirito; ĝi estas pli individua substanco ol la spirito; spirito estas uzata pli por intelektaj funkcioj. - Al la supozo de nevideblaj kaj nepalpeblaj aĵoj kondukis la primitivan homon versimile la vento. Vento, bloveto, eliras ankaŭ el la homa buŝo, ofte kiel malgranda nubeto videbla; la greka vorto pneŭma signifis samtempe spirblovon kaj animon. La vivo finas per eliro de la lasta elspiro, kio estas eliro de la animo. En insulo Nias (apud Sumatra) estas devo de la plej aĝa filo aŭ parenco preni per sia buŝo la lastan elspiron de la patro por tiel transpreni lian animon. Baldaŭ estis ideo de la a. kunigata kun ideo de la senmorteco. Ioniaj naturfilozofoj rigardis animon kiel ian plej delikaian ŝtofon. *Platono* kredis, ke a-j estas senmateriaj kaj ke ili ekzistas el eterno. *Aristotelo* nomas animon la plej ĉefa enteleĥio de ĉiu vivopova korpo; sole la intelekt-animo de la homo estas disigebla de la korpo kaj senmorta. S-a Aŭgustino kaj aliaj ekleziaj patroj instruas, ke a. estas nemateria substanco viviganta la korpon, en kiu ĝi sidas. Tio estas oficiala kristanisma instruo. *Kant* montris, ke a. ne estas aparta estaĵo posedanta siajn perceptojn, imagojn kaj sentojn, sed ke a. estas nura sumigo de ĉiuj sensacoj, imagoj, sentoj kaj tendencoj. Por tia koncepto de a. oni ofte uzas vorton psiko. La moderna psikologio ĉiam pli ofte estas konvinkita pri unueco de la a. aŭ psiko kaj la korpo. Pri senmorteco de la a. scienco povas doni neniun klarigon. Nek ĝin aserti nek ĝin nei. Malnovaj filozofoj (ekz. Platono, Aristotelo skolastikuloj, Descartes) klopodis pruvi senmortecon de la a. per argumento, ke ĝi estas primitiva, nekombinita substanco, nemateria, do nedetruebla. Post Kant aperis tia argumentado neebla.

Moderna filozofio povas argumenti pro senmorteco de la a. ekskluzive per etikaj valoroj. Garantii senmortecon de la a. povas sole ĝia interna valoro. Estus malfacile kompreni, ke homa animo daŭre celas por spirita kaj etika idento kiel sia plej alta celo, se ĝi estas ĉe fino detruota. Tiu daŭra tendencado de la animo al celoj pli kaj pli altaj estas multe pli facile komprenebla, se ĝia plej lasta celo ne estas en tiu ĉi mondo. Laŭ tiu vidmaniero ricevas la homa spirita kaj morala vivo pli profundan sencon, ĉar la spiritaj valoroj, por kiuj ĝi klopodas, estas daŭraj, eternaj.

**Antinomio** *a. antinomy,* č. rozpor, antinomie, antinomia, f. antinomie, g. Antinomie.
Kontraŭeco de du opinioj: jeso kaj neo de la sama opinio, kiujn oni povas pruvi kun la sama valideco aŭ konvinkeco; precipe malkonsento inter la racio kaj percepto, de la laŭkonceptaĵa pensado kaj laŭsensa komprenado; malkonsento, kiun oni trovas veninte ĝis fundo de iuj problemoj, kiujn oni povas solvi nek pozitive nek negative. Kant nomas kvar antinomiojn, al kiuj venas la intelekto klopodanta veni al nekondiĉita scio: 1. Tezo: La mondo havas komencon en la tempo kaj limon en la spaco. Antitezo : La mondo estas sen komenco tempe kaj sen limo space. - 2. Substanco konsistas el simplaj partoj kaj ne ekzistas io alia ol kio estas aŭ elementa aŭ kombinita el elementoj. Antitezo: Nenio en la mondo konsistas el simplaj partoj kaj ekzistas en ĝi nenio elementa. - 3. Tezo: La kaŭzeco de la naturleĝoj ne estas la sola, laŭ kiu estas klarigeblaj ĉiuj fenomenoj de la mondo. Krom ĝi oni estas devigata supozi ankoraŭ kaŭzecon por la libereco. Antitezo: Ekzistas neniu libereco, sed ĉio en la mondo okazas ekskluzive laŭ leĝoj de la naturo. - 4. Tezo: Al la mondo apartenas io, kio estante aŭ ĝia parto aŭ ĝia kaŭzo estas precipe necesa estaĵo. Antitezo: Ekzistas neniu precipe

necesa estaĵo nek en la mondo nek ekster la mondo kiel ĝia kaŭzo.

**Antitezo** *a. antithesis, č. antitéza, f. antithese, g. Antithese*. - Vidu *Tezo*.

**Antropologio** *a. antropology, č. antropologie, antropologia, f. antropologie, g. Antropologie*.
Scienco pri la homo kiel pri genro animala kaj pri komencoj de civilizo. En historio de filozofio esploro pri homo laŭ flanko anima kaj korpa kaj pri rilato de ambaŭ flankoj (laŭ Kant).

**Antropomorfismo** *a. antropomorphism, č. antropomorfizmus, f. anthropomorphisme, g. Anthropomorphismus*.
Maniero imagi Dion aŭ diojn kvazaŭ homojn kun ĉiuj homaj virtoj kaj malvirtoj. Simile ĉiujn sociajn unuojn ni ne povas al ni prezenti alimaniere ol kiel homajn estaĵojn. A. havas diversajn gradojn, de la plej primitiva ĝis la plej kulturita, kaj ĝi ŝajnas esti por la homa pensado kaj komprenado neforigebla.

**Antroposofio** *č. antroposofie, antroposofia, g. Antroposophie*. - Vidu *Teosofio*.

**Apercepto** *a., f. apperception, č. apercepce, apercepcia, g. Apperception.*
Vola, sciata prenado de iu enhavo en la konscion. De la percepto ĝi diferencas per la vola elemento, kiu elektas el la diversaj sensacoj kaj perceptoj tion, kion ĝi speciale volas enmeti en la rigardkampon". *Leibniz* distingis inter statoj, en kiuj la animo estas, kaj inter statoj, pri kiuj la animo konscias.

La unuajn li nomis perceptojn, la duajn aperceptojn. Do estas laŭ li 1a aperceptado tiu procedo, per kiu la neklaraj, senordaj imagaĵoj klariĝas kaj fariĝas klaraj komponantoj de la konscio. - Laŭ Kant estas pura aŭ transcenda apercepto la identiga, origine pure formala unueco de la ekkonanta konscio kiel prakondiĉo, la plej profunda fonto de la unuiga fluo kuniganta ĉiun empirian materialon en unuecajn rilatojn. - Laŭ *Maine de Biran*: interna konscio aŭ kono de la ago, per kiu la Mi enmetas sian ekziston en la muskolan streĉon. Laŭ *Herbart:* Adaptado kaj enmetado de novaj perceptaĵoj al la jam ekzistanta provizo de la de imagaĵoj nomata de Herbart apercept-maso". - Laŭ *Wundt*: pliklarigo de ia parto de perceptaĵaro per la atento, pligravigo de tia enhavo, dume percepto koncernas sole travivaĵon. Ekz. aŭdante muzikon de orkestro ni aŭdas kutime melodion kiel unu nediferencitan percepton. Sed ni povas turni nian atenton al sono de unu instrumento, kiun ni tiam speciale aperceptas. - Iam oni diras apercepti ankaŭ en senco asimili perceptojn.

**A priori - a posteori** (latine) oni uzas sen traduko aŭ adapto en multaj lingvoj, en esperanto oni uzas el tio derivitajn adjektivojn *apriora, aposteriora*. Apriora estas depost *Aristotelo* nomata tia kono, kiu eliras el la kaŭzoj, aposteriora tia, kiu eliras el la efikoj. Ankoraŭ *Leibniz* identigas konon aprioran kaj konon per la kaŭzoj. Dum la l8-a jarcento mal-rapide malaperis tiu ĉi signifo. Ĉe Kant signifas apriora: sendependa de ĉiu sperto, ja ĉiun sperton ebliganta. Ekz. la propozicio, ke ĉiu ŝanĝo havas iun kaŭzon, estas juĝo apriora. Signo de aprioreco de iu kono estas ĝia neceso kaj universaleco. - *L. Couturat* uzis la terminojn apriora kaj aposteriora en sia verko pri internacia lingvo (Histoire de la langue universelle, 1903) por distingi sistemojn de artefaritaj lingvoj laŭ origino de iliaj elementoj. Aprioraj li nomigis tiujn,

kiuj havas vortradikojn kaj gramatikajn regulojn elpensitajn laŭ iu racia principo, aposterioraj tiujn, kiuj havas vortojn kaj gramatikon derivitajn el vivaj naturaj lingvoj. Esperanto estas sistemo aposteriora preskaŭ ekskluzive; ĝia tabelo de korelativoj estas apriora. - A p r i o r i s m o estas nomata filozofia tendenco, kiu supozas ion aprioran aŭ en noetiko aŭ en etiko. Aposteriorismo ne estas uzata por nomi tendencon kontraŭan.

**Ateismo** *a. atheism, č. ateizmus, f. athéisme, g. Atheismus.*

Konvinko, ke neniu Dio ekzisias, supozo, ke la mondo ekzistas pro si kaj per si mem. Konsciaj ateistoj estas precipe: *J. O. Lamettrie, Holbach, Stirner, Nietzsche, Dühring, Büchner, Haeckel, Duboc, Grant, Allen.* Laŭ *F. Bacon* malmulto da filozofio kondukas eble al ateismo, sed pli profunda filozofado rekondukas al Dio. Laŭ Kanta kritikismo oni povas pruvi nek ekziston nek neekziston de Dio, tial oni povas je Dio sole kredi aŭ ne kredi. Iam signifas a. sole konvinkon, ke la plej alta estaĵo estas nekonebla aŭ ne esplorebla: tiam ĝi estas pli trafe nominda agnostikismo.

**Atomismo** *a. atomism, č. atomizmus, f. atomisme, g. Atomismus, Atomistik.*

Metafizika teorio de grekaj filozofoj *Leŭkipo, Demokrito* kaj *Epikuro*, laŭ kiu ĉiuj aĵoj materiaj kaj spiritaj konsistas el malgrandaj eroj ne plu disigeblaj. Estis nomigitaj atomoj pro ilia nedisigebleco. Ili estis korpetoj de eterno ekzistantaj, nedetrueblaj, diversspecaj, moviĝantaj. En jaro 1808 adaptis Dalton atomismon por hipotezo klariganta la kemiajn leĝojn pri konstantaj kaj oblaj proporcioj de komponantoj en kemiaj kombinaĵoj. Laŭ ĝi konsistas la plej malgrandaj eroj, je kiuj ŝtofo solviĝas aŭ vaporiĝas (molekuloj) el atomoj. Estas tiom da atomoj, kiom da elementoj. La atomoj diferencas pro siaj

kombiniĝemo kaj pro sia pezo. Ĉar ili ne estas plu disigeblaj, restas proporcioj de elementoj en diversaj kombinaĵoj la samaj. Efektiva ekzisto de atomoj estis kontraŭ atendo de pluraj filozofoj kaj ĥemiistoj pruvita en j.1918 de franco *Perin.* Li sukcesis per tre diversaj metodoj trovi la absolutan pezon de atomoj. La konvinkemo de la elkalkulitaj tiu aserto estas tiom alta, kiom de asertoj pri grandecoj kaj orbitoj de planedoj. Simbolo por hidrogeno H signifas unu atomon de hidrogeno. $H_2$ signifas unu molekulon de hidrogeno, kiu konsistas el du atomoj. Unuopaj atomoj ekzistas malofte, sed tamen. Ekz. molekulo de helio, argono kaj de ceteraj tiaj maloftaj gasoj estas unuatomaj. Same vaporoj de metaloj natrio aŭ hidrargo estas unuatomaj. V. *Molekulo, Elektrono.*

**Atributo** *a. attribute, č. atribut, f. attribut, g. Attribut.*
En metafiziko daŭra esenca kvalito de aĵo, precipe kvalitoj de Dio. Metafizikaj Diaj kvalitoj estas ekz.: senfineco, eterneco, universaleco k. a. Moralaj estas: justeco, ĉioscieco. Spinoza difinas jene:  Atributo mi nomas tion, kion la intelekto perceptas sur substanco kiel ĝian esencon.“ - En logiko: ĉiu eco, pri kiu oni asertas, ke iu objekto ĝin havas aŭ malhavas.

**Behaviorismo** *a. behaviourism, č. behaviorizmus, g. Behaviorismus.*
Tiu ĉi vorto enpenetros baldaŭ en nian fakan terminaron, ĉar ĝi estas nomo de nova psikologia skolo, kiu daŭre disvastiĝas kaj ricevas kreskantan influon en psikologiaj rondoj, precipe ĉe la psikologio uzita ekzemple en psikotekniko kaj pedagogio. La nomo estas derivita de la angla vorto behaviour - *konduto*, kaj signifas precipe psikologian metodon. Laŭ ĝi la sola poveblo studi science la psikologiajn fenomenojn estas observadi, kiamaniere kondutas la homo kaj la ceteraj vivaj estaĵoj en ia situacio. La situacioj kaj la kondutoj de homo en

ili estas la solaj faktoj, kiuj estas alireblaj por nia observo kaj sekve por scienca esploro. Tial la introspekto, la interna observo de si mem, en kiu la klasika psikologio vidis la tre gravan kaj efikan esploran metodon, estas por behaviorismo metodo neniel uzebla; ĝi ja ne donas faktojn science konstateblajn kaj kontroleblajn. Sed pri la konduto la behavioristoj kredas, ke la konduto dum la donita situacio estas laŭ sia rezultato la sama, estu la elparolita konvinko de la kondutanto kia ajn aŭ eĉ nula. Laŭ ekzemplo citita de Bertrand *Russel* ĉiu, sur kiu ekpluvis dum lia promenado, malfermos la pluvombrelon, se li ĝin kunportas; iu el ili diros al si ekpluvis“, la alia agos sen iel dirita penso, sed tio neniel influis la rezultaton de la agado. La kondutoj de homo havinta konvinkon“ kaj nehavinta konvinkon“ estas la samaj. Dum varma vetero iras la homoj, same kiel la bestoj, en malvarmetan flankon; la konduton neniel diferencigas, ke la homoj havas konvinkon“ pri la pliagrableco de la ombro, kaj ke al la bestoj mankas tia konvinko“. La rezultato estas la sama. Nenion plu ni povas efektive observi ol tiajn reakciojn al donitaj situacioj. La homa konduto diferencas de la besta sole per tio, ke la homaj kondutoj estas multe kaj multege pli diversaj, ke ili diferenciĝas ĉe ĉia ajn ŝanĝeto de la situacio, estu ĝi eĉ plej malgranda. La pensado konsistas sole en uzado de vortoj, la vortoj elvokas kondiĉajn respondojn. Per tio la demando, ĉu la bestoj ankaŭ pensas“ reduktiĝas al demando, ĉu la bestoj montras en certaj situacioj certajn signojn, kiuj elvokas ŝanĝojn ĉiam laŭ la sama direkto. Tiaj ŝanĝoj estas konstateblaj kaj mezureblaj. Do la diferenco inter la homa kaj besta konduto estas sole laŭkvanta, sed tiu kvanto estas grandega. Oni atentu, ke ĉe tia vidmaniero oni nenie en tiu ĉi psikologio renkontas ideon aŭ imagon de animo. Estas intence. Ĉar la tasko de la scienca psikologio povas konsisti ekskluzive en tio: ekkoni la ordigon de reakcioj al situacioj kaj

veni tiamaniere al leĝoj pri ilia reciproka aparteno. Tiuj ĉi behaviorismaj ideoj multon helpis al disvolvo de la objektiva psikologio. Precipe la mezuranta pedagogio bazas sur behaviorismo kvazaŭ firma fundamento. Ĝia patro estu nomata J. B. *Watson*, kies Psikologio el vidpunkto de behavioristo“ aperis en 1920.

**Biogenoj** *č. biogeny, g. Biogene*.

Laŭ multaj (Verworn en 1903, *Hartwig,* k. a.) nomo por hipotezitaj ŝtofoj proteinaj esencaj komponantoj de vivanta protoplasmo; el ilia daŭra kombinado kaj malkombinado konsistas laŭ tiu hipotezo la vivado.

**Biontoj** *č. bionty, g. Bionte.*

l. Laŭ H. *Wolff* nomo por elementoj de realo, simplaj vivcentroj“ kun tendencoj, sentoj kaj sensacoj, kreitaj de Dio, nepereeblaj. 2. Komuna nomo por animaloj kaj vegetaloj.

**Bono** *a. good, č. dobro, f. bien, g. Gut*.

Spinoza difinas kiel bono tion, pri kio ni certe scias, ke ĝi helpas nin atingi ian de ni kreatan idealon pri la homa natureco; kiel malbono li difinas tion, kio malhelpas nin plisimiliĝi al tiu idealo. Se io taŭgas al nia natureco kaj pro tio produktas plezuron aŭ estas uzebla kaj uzata por nia konservo kaj plivastiĝo, ĝi estas necese bona. *Kant*: Nenie en la mondo ja eĉ ne ekster la mondo estas imagebla io, kio povus esti metata kiel bona sen iu limigo, escepte bonan volon.“ Tiu fama propozicio bezonas por sia kompletigo difinon, kio estas bona volo, kio estas bona“. En etiko estas bono unu el la plej fundamentaj konceptoj normigaj. Oni signas bona tion, kio estas en donita situacio rigardata laŭ morala vidmaniero kiel preferinda por agi. La konceptaĵo de bono distingiĝas rimarkinde de la devo, ĉar ĝi ne entenas eĉ eron de ideo pri

devigiteco aŭ pri obeo al iu aŭtoritato kaj ĉar ĝi koncernas sole la agon farotan,

*La plej alta bono*, a. Summum bonum", č. nejvyšší, najvyššie dobro, f. bien souverain, g. das höchste Gut.

En greka filozofio la bono, kiu estas bono pro si mem kaj per si mem, rilate kiun la ceteraj bonoj ne estas io alia ol rimedoj. Derivite precipe ĉe Aristotelo: celo de ĉiu homa agado. En moderna filozofio, precipe ĉe Kant, bono, kiu kontentigas homon tutan, ĝian intelekton, sentemon kaj agemon Objekto de dezirkapablo ĉe inteligentaj finaj estaĵoj".

**Circulus vitiosus** 1. laŭvorte: cirklo *erariga,* laŭsence: pruvo per cirklo.

Malĝusta pruvo estiĝanta, se oni volas pruvi la propozicion A per ia propozicio B, kiu havas sian argumenton en la propozicio A. Ekzemploj: Ĉar ekzistas vero, necesas, ke ekzistu Dio; returne: Ĉar ekzistas Dio, necesas, ke ekzistu vero. - Ĉar la homo povas libere agi, ĝi havas liberan volon; returne: Ĉar la homo havas liberan volon, ĝi povas libere agi. - Se vi vivas morale, vi vivas virte; returne: Se vi vivas virte, vi vivas morale.

**Darvinismo** *a. darwinism, č. darvinizmus, f. darvinisme, g. Darwinismus*.

Ĉefaj faktoroj en teorio de organika evoluo trovitaj de Charles *Darwin* (1809-1882). Tial evoluciistoj komprenas per tiu termino aŭ akcentadon de la selektiveco subtenata de heredado de akiritaj signoj aŭ teorion pri la natura selektiveco solan.

**Daŭro** *a. duration, č. trvání, trvanie, f. durée, g. Dauer*.

Fineca parto de la tempo konsiderata kiel tuto. Ekz.: Daŭro da 2 minuioj. Daŭro de reakcio. Ofte oni uzas por la sama senco

la vorton tempo, kio estas malpli korekta. Henri *Bergson* metas ideon de daŭro kontraŭ ideo de tempo.  Daŭro pura, konkreta, reale vivita“ signifas sinsekvon sentatan senpere de la spirito, dume tempo signifas matematikan ideon, kiun ni kreas al ni por komuniki iliajn rezonaĵojn al la ceteraj niaj similuloj.

**Deismo** *a. deism, č. deizmus, f. déisme, g. Deismus.*

Kompreno de Dio kiel lasta kaŭzo de la mondo, kiel ĝia kreinto, sed tiamaniere, ke dio unufoje la mondon kreinte neniel ĝin influas kaj la mondo finfarita daŭras funkcii laŭ la leĝoj donitaj sen ia intereso de dio. Eĉ ne konformiĝis kun la dia digneco ia ajn rilato dia al funkciado kaj disvolvado de la mondo. Revelacio kompreneble ne estas ebla. Ĉefan rolon ludis d. en pensado de la 18-a jarcento. Ĉefaj reprezentantoj: Norbert *Cherburg, Collins, Toland*, *Tindal. Shaftesbury* en Britlando, *Voltaire, Jean Jaque Rousseau* en Francujo, *Bahrd, Reimaurus, Lessing, Mendelsohn* en Germanujo. Ĉar tiu termino ofte kondukas al konfuzo, ĝi estas uzenda sole en tiu ĉi senco historia.

**Demonismo** č. demonizmus.

Antaŭŝtupo de la religio, speciala formo de animismo. La spiritoj enmiksas sin per siaj agoj en homan agadon.

**Deontologio** *a. deontology, č. deontologie, deontologia, f. deontologie, g. Deontologie*.

Instruo pri devoj. Ĝi estas parto de etiko aŭ etiko laŭ speciala vidmaniero. La termino estas kreita de Jeremias *Bentham,* 1834.

**Dialektiko** *a. dialectic* en senco ĝenerala, *dialectics* en senco pedagogia por instruado per diskuiado, *č. dialektika, f. dialectique, g. Dialektik.*
Ĉe *Platono* arto alveni per demandoj kaj respondoj t. e. per dialogo ĝis la plej aliaj ideoj de logiko kaj metafiziko kune. Ĉe *sofistoj* arto de trompigaj propozicioj. En mezepoko sinonimo kun logiko. Ĉe *Schleiermacher* denove logiko kaj meiafiziko kiel ĉe Platono. *Ĉe Hegel* teorio pri propra evoluo de konceptaĵo; la konceptaĵo evoluas en sian kontraŭon, kaj super tiuj ambaŭ konceptaĵoj estas metata de ia koncepiajo tria, pli alta. Tezo transiĝas en antitezon kaj el ili ambaŭ estiĝas sintezo. Ekz.: Origine donita koncepio de *penso* transformiĝas en kontraŭan koncepton de *naturo*; per sintezo de ili ambaŭ estiĝas *spirito*. Karl *Marx* prenis dialektikan metodon de *Hegel* por traktado pri ekonomiaj rilatoj kaj konstatis, ke inter la ekonomiaj fortoj ekzistas antagonismo manifestanta sin en klasbatalo. Laŭ *Engels* estas d. observado kaj meditado pri la aĵoj laŭ iliaj rilato, ligiteco, movado, estiĝado kaj malaperado. Laŭ *Lenin* enestas en esenco de d. Disigo de tio, kio ŝajnas unueca, kaj ekkono de ĝiaj kontraŭantaj partoj“ (ekz. pozitiva kaj negativa elektro, kombino kaj malkombino de atomoj, klasbatalo). - La vorto d., kiel videble, akceptis tiom da diversaj signifoj, ke oni devus ĝin uzi sole indikante precize la sencon al ĝi momente atribuatan.

**Diismo**

Plej ĝenerala termino por kredo je Dio aŭ je dioj.

**Dio** *a. God, č. Bůh, Boh, f. Dieu, g. Gott*.
La plej alta estaĵo. Povas esti konceptata tre diversmaniere. Ĝi estas aŭ transcenda, t. e. substance diferenca de la universo kaj estanta super ĝi, aŭ imanenta, t. e. substance kun la universo

identa. En tiu ĉi dua konceptado ekzistas ankoraŭ du distingoj. Laŭ Spinoza Dio distingiĝas de la cetera mondo unusole per tio, ke ĝi estas unu, dum la perceptebla mondo estas plurmaniera. Ĉe stoikuloj Dio estas animo de la universo, principo posedanta senton kaj racion, kiu igas la universon konscie. Ambaŭ tiuj dokirinoj estas nomataj panteismoj, sed tiu de Spinoza estas panteismo pli konsekvenca. La difino de Dio konformebla al ĉiuj konceptmanieroj estus, ke Dio estas principo por unueco de la universo. Ateismo povas kontraŭdiri al tio, ke tia principo ne ekzistas, ke ĝi estas rezulto de abstraktado. Sed se oni akceptas unusole ekziston de Dio, oni akceptis tro malmulte. La plej grava demando estas, kia estas Dio. Religia evoluo de homaro montras, kiel diversa estas koncepto pri Dio. Sed malgraŭ la diverseco estas inter la diversaj ideoj pri Dio evolua kunligo kaj speco de unueco. Historio de religioj vidigas, ke evoluo tendencas al ideo pri Dio, kiel estaĵo spirita kaj morala, estaĵo individua, kiu eniras al homoj en rilaton personan kaj moralan. Esplori veran realecon de tiu ĉi ideo pri Dio tio estas tasko de religiofilozofio. Ĉi ĝenerale konsentas pri tio, ke la t. n. pruvoj pri ekzisto de Dio (ontologia, kosmologia, teleologia) havas nun sole historian valoron. Ili vidigas nur, ke la homa racio provadis pruvi religian kredon je Dio, sed eraroj de pruvoj estas jam konataj. Tial oni intencas doni anstataŭ la logikaj pruvoj vicon de argumentoj, kiuj igas ekziston de Dio se ne pruvitan tamen tre versimilan. Tiaj argumentaroj estas du, ambaŭ empiriaj. La unua eliras el empiriaj faktoj, el sperto pri la mondo, kiu trovas la plej akcepteblan klarigon nur en la metafizika klarigo. La dua eliras ankaŭ el empirio, el sperto pri valoroj. En hierarĥio de valoroj unu devas esti postulata kiel la plej alta valoro. Nia taksado de valoroj estas fakto. Tiu taksado povas havi sencon sole tiam, se ekzistas unu plej alta valoro; sole tiam povas tia taksado de valoroj objektive validi.

Tiu la plej alta grado de ĉiuj spiritaj valoroj, kiun la religio nomas Dio, estas postulato de nia spirita vivo. Ĝi estas postulato, ne logike necesa konkludo. Ĝi ne povas esti logike pruvita, sed ĝi povas esti sole argumentata per tio, ke ĝi donas sencon kaj signifon al faktoj de la homa spirita sperto kaj ke ĝi utilas al disvolvo de la homa spirita vivo. Difini per nocioj prenitaj el la homa sperto esencon de tiu ĉi plej alta valoro ne estas eble. Ĉar tiu ĉi plej alta valoro transpaŝas la limon de la homa sperto. Ĝi estas transcenda, eterna valoro, kiu efektigas en si perfekte la valorojn, kiujn ni homoj povas efektivigi nur parte kaj neperfekte. Sed tamen ni povas sur bazo de nia propra spirita sperto konkludi, ke tiu ĉi plej alta valoro estas estaĵo spirita kaj morala, spirita kaj morala personeca individuo. Regno de valoroj estas regno de individuecoj. Ekster individuoj estas la valoroj nuraj abstraktaj nocioj. Tial ankaŭ la plej alta valoro kaj la plej lasta valoro, se ĝi devas esti efektiva, necesas esti spirita kaj morala persono.“ (Fr. *Linhart,* Enkonduko en religiofilozofion, 1930.)

**Dinamismo** *a. dynamism, č. dynaimizmus, f. dynamisme, g. Dynamismus.*
Filozofiaj doktrinoj, kiuj klarigas ĉiun ekziston kaj daŭron per ago de forto (aŭ fortoj), aŭ vidas esencon de esto en la fortoj. Tiuj fortoj estas ofte nereduktеblaj al maso kaj movo. Sed iam oni metas la movon kaj estiĝadon kiel originaj kaj materion klarigas kiel rezulton de specialaj movoj (Lord *Kelvin)* aŭ aĵon vidigas kiel ŝtupon de progresanta evoluo (*Bergson*). Fondinto de *d.* en nova epoko estas *Leibniz.* Lia monado estas atomo senmateria, enhavanta sole la forton, kiu igas ĝin agi aŭ efiki mem, sen influo de premo kaj puŝo el ekstero.

**Disipo** *de la energio. č. disipace energie, f. dissipation de l' energie, g. Dissipation der Energie.*

Fizika fakto rezultanta el ĉiuj spertoj kaj eksperimentoj, ke energio transformiĝante el formo de varmo en ian alian formon neniam transformiĝas komplete, sed ĉiam restas mezurebla kvanto da varmo, kiu ne tranformiĝas kaj restas en speciala formo de varmo neniam plu transformebla en ian alian energiformon. Tiu formo de varmo estas nomata entropio. Ĝi do neniam jam povas transformiĝi en fizikan laboron. Logika konkludo el primedito de tiu ĉi fakto estas, ke fine ĉiu energio de la universo transformiĝos en staton de entropio, el kiu rezultos neebleco de iu ajn plua ŝanĝo de la energia sistemo. La energio en sia varmformo estos en la tuta universo sur la sama temperatura grado kaj ne povos plu transformiĝi kaj produkti laboron; ĉar varmo povas produkti laboron sole, se ĝi iras de temperaturo pli alta sur temperaturon malpli altan. Per transformo de la tuta energio en formon de entropio estiĝos  varm-morto“ de la universo.

**Dogmo** *a. dogma, č. dogma, f. dogme. g. Dogma.*
l. Filozofia opinio ricevita de la skolo. 2. Opinio pri metafizika problemo akceptita de eklezia (kristana) aŭtoritato apogata per revelacio, pri kiu la kredanta ekleziano ne rajtas dubi. Tiun sencon oni donas al la vorto depost la unuaj jarcentoj kristanaj. *Dogma metodo*, maniero dedukti teoremojn el la fundamentaj propozicioj aŭ studi sciencon laŭ ĝia samtempa stato. *D. m.* kontraŭas al la laŭhistoria kaj al evolua metodo.

**Dogmismo** *a. dogmatism, č. dogmatizmus, f. dogmatisme, g. Dogmatismus*.
Origine ĉiu filozofia konvinko, kiu kredas, ke ekzistas iaj koneblaj veroj. Ĝi kontraŭas skeptikismon. Depost *Kant* oni kunigas kun tiu termino ofte sencon malplaĉigan kontraŭmetante ĝin ne al skeptikismo sed al kritikismo kaj al

kritiko. Periodo de dogmismo estis depost fino de la l7-a ĝis fino de la 18-a jarcentoj (*Spinoza, Leibniz, Wolf* k. a.).

**Doloro** *a. pain, č. bolest, f. douleur, g. Schmerz.*
Unu el la fundamentaj sentaj afekcioj, nedifinebla, ĉar ĝi estas psika stato memstare nereduktebla al iu alia. Sed iam ĝi signifas tre specialan senton, ekz. doloro de la kapo, bruldoloro k. a. tute diferencan de malĝojo, aflikteco, ĉagreno, iam ĉi enhavas ĉiujn tiujn specojn de malagrablaj sentoj. Ĉar la psikologio de la sentoj estas tre malmulte disvolvita, uzo de koncernaj terminoj varias.

**Dualismo** *a. dualism, č. dualizmus, f. dualisme, g. Dualismus.*
Metafizika supozo pri du kvalite diferencaj ekzistaj principoj, du substancoj efektive ekzistantaj, kiuj estas du esencoj de ĉiuj fenomenoj. Reciproka influo de tiuj du substancoj estas diversmaniere klarigita; tiu klarigo estas la plej malfacila problemo de *d. D.* estas tre malnova. Jam la primitivan homon kondukis la sperto pri morto al distingo inter animo kaj korpo. Depost *Taleso* ĝis *Sokrato* tiu distingo tre progresis. *Anaksagoro* (500-428) jam distingas inter aĵoj materiaj kaj spirito, kiu enkondukas ordon en materian ĥaoson, sed esencon de la spirito ne scias Anaksagoro ankoraŭ klare difini. *D.* estas ofta klariga principo en ĉiuj epokoj. Jenaj paroj de konceptaĵoj vidigas oftecon de ĝia uzo: Spirito - materio; naturo - spirito; Dio - mondo; Dio - diablo; animo - korpo; anorganika - organika naturoj; sensa sperto - racio; kredo - scio; subjekto - objekto; naturscienco - spiritscienco; neceso - libereco; tie-ĉi - transe. En ĝenerala senco signifas *d.* ĉiun konvinkon pri du principoj aŭ du vidmanieroj reciproke nereduktеblaj ekz. dualismo morala por moraleco natura kaj de la graco, dualismo psikologia por volo kaj intelekto. *D.* en publika administrado k. t. p.

**E** en logiko simbolo de propozicio ĝenerala nea laŭ la mnemonika versoparo. V.

**Eklektikismo** *a. Eclecticism, č. eklekticizmus, f. éclecticisme, g. Eklekticismus.*
Tendenco kunigi tion, kion oni trovas ĝusta en diversaj sistemoj filozofiaj, en unuecon pli malpli kompletan kaj sisteman. Se ĝi faras tion pro timo el malagrablaj konsekvencoj de unu sistemo, ĝi montras filozofian malfortecon de la eklektikulo. Sed se ĝi estas konsekvenco de klopodado por la plej ebla grado de vereco, tiam la e. estas prava. Sed neniam ĝi devas kunigadi erojn tro malkonformajn; tiam ĝi estas nomata sinkretismo. - En antika filozofio estis eklektika skolo de Aleksandrio. En nova epoko uzis tiun nomon Victor *Cousin* (1817) por sia filozofia sistemo. Li volis kunigi doktrinojn de la kontraŭmetafizika skolo skotlanda *(Hume, Hamilton*) kun doktrinoj de la germanaj metafizikulojn *(Schelling, Hegel),* Cousin intence volas, ke lia sistemo ne estu mozaike kunmetita aro de eroj trovitaj en aliaj sistemoj, sed sistema kunigo de la realaj principoj antaŭekzistantaj en la homa spirito, el kiuj la pensuloj estis konstruintaj siajn sistemojn.

**Ekscito** *a. excitement, č. popud, f. excitaiton, g. Reiz.*
En psikologio: Afekciado de sensorgano per fizika impulso eliranta el medio ekster la afekciata organismo. La povebleco de organismo reakcii je tiu ekscito estas iritebleco. La ekscito kaŭzas en la koncerna sensa organo iriton. Akceptas ĝin finoj de nervoj, kiuj estas en fino de ĉiu sensorgano diversforme kaj specife diferenciĝintaj. Ŝajnas, ke la nervoj en diversaj sensoj estas kapablaj akcepti ekscitojn sole siaspecajn (laŭ *Lotze,*

*James, Bergson*). La ekscito donita al nervo estas fizika (t. e. mekanika, varmeca, elektra, luma aŭ kemia), nervo kondukas ĝin kiel iriton, kio estas procedo fiziologia. La irito kuras tra la nervo per rapideco 30-90 metroj dum sekundo. La nervoj ŝajnas kondukemaj por ĉiuspecaj iritoj. La irito veninte en la nervan centron, precipe en cerbon, estigas sensacon, kvazaŭ tiu fiziologia reakcio transformiĝus en reakcion pure psikan. Kiaj procedoj okazas en la kondukanta nervo kaj per kiaj procedoj ŝanĝiĝas la fiziologia irito en psikologian sensacon, oni ne sukcesis ĝis nun iel ajn klarigi. Eĉ ia almenaŭ iom akceptebla hipotezo mankas.

**Eksperimento** *a. experiment, č. pokus, f. expérience. g. Versuch, Experiment.*
Laŭplana izolado, variado kaj kombinado de kondiĉoj por studo de fenomenoj dependantaj de ili. *E.* estas  nenio alia ol demando al la naturo, kiun devas la naturo mem respondi, observo dum fiksitaj, arte starigitaj kondiĉoj“ (*Haeckel*). Simpla observanto aŭskultas la naturon; eksperimentanto demandas ĝin kaj devigas ĝin forigi sian vualon“ (*Cuvier*). Laŭ Claude *Bernard e.* estas observo komencita por kontroli aŭ por inspiri ian ideon. Eksperimentado estas tre malnova. Jam *Demokrito* eksperimentis. Roger *Bacon* kaj *Baco de Verulam* postulis eksperimentadon por ĝisfunda esploro de la naturo. *Galilei* aplikis ĝin unuan fojon por scienca esplorado celscie.

**Ekspresionismo** *č. expresionizmus, f. expressionisme, g. Expressionismus.*
Kompreno kaj bildigo de la mondo laŭ imagoj kaj sentoj de la subjekto. Prezentado de la subjektivaj humoroj kaj sentoj sen atento pri  objektivaj“ aŭ konvenciaj valoroj, juĝoj, opinioj, veroj. Kontraŭo: Impresionismo. La vorton uzis unuan fojon

(1901) franca pentristo J. A. *Hervé*. *E.* fariĝis esprima metodo en poezio, beletristiko, pentrarto, muziko, sed ĉiam ĝi trovis sole partan aprobon.

**Ektoplasmo** *č. ektoplasma, f. ectoplasme, g. Ektoplasma.*
Stranga speco de materio, eliranta laŭ aserto de spiritistoj el mediumoj, kiun oni ne povis konstati aliloke kaj alitempe. Ĝi eliras laŭdire el la buŝo aŭ el fingroj de la medioj dum la tranco kaj dum fino de la tranco plejparte eniras denove en la korpon tiel, ke restas sole malgrandaj kvantoj por esploro.

**Ekzisto** *a. existence, č. existování, jestvovanie, f. existence, g. Existenz.*
Samsignifa kun realo, sed tamen kelkaj filozofoj atentante aplikon de la vortoj volis diferencigi inter la ambaŭ nocioj. Plej konata estas vidmaniero de skolo de *Brentano*, el kies disĉiploj precipe *Ant. Marty* malrekomendis mikson de nocioj ekzisto kaj realo. Ekzisto havas laŭ li sole signifon logikan, ĝi estiĝas nur per rezonado, do ĝi ĉiam supozas propozicion. La realo estas iel klarigebla kaj ĝi estas donita al ni en ĉiuj kvalitoj fizikaj kaj psikaj. Ankaŭ *J. M. Baldwin* kaj *O. Külpe* diferencigas en simila senco. Tiel la ekzisto signifus logikan nocion estiĝantan per meditado pri realo, la realo signifus transcendecon de la objektoj. Tia diferencigo ne estas sen ia ajn bazo, sed tamen ĝi estas superflua, ĉar ekzisto kaj realo signifas la saman fundamentan kvaliton pli detale ne difin-eblan. Ankaŭ *David Hume* ne diferencigas inter la du terminoj. La ekstreme racionalismaj sistemoj rigardas ekziston kiel precizan, racionalan nocion kun fiksa amplekso, kiu povas esti signo de alia nocio kiel ĉiuj ceteraj signoj, kaj per kiu ĉiu nocio ricevas la celatan kaj bezonan kompletecon. La plej grava konsekvenco de tiu ĉi pensmaniero estis ontologia pruvo pri ekzisto de Dio elpensita de *s-a Anselino*. La pli posta

skolastika filozofio (s-a Tomaso el Akvino) malŝatis tiun ĉi pruvon sed tamen persistis en la sama racionala konvinko. Eĉ *Descartes, Spinoza*, *Leibniz* bazas siajn metafizikojn en principo de la ontologia pruvo. Laŭ la racionalisma pensmaniero la ekzisto estas nocio plene racionala (fiksa, fineca, limigita): kiel ĉia ajn nocio ankaŭ ĝi povas esti predikato en propozicio; aliĝante al aliaj signoj de nocio ĝi estigas el ĝi realon. Nur *D. Hume* komprenis la unuan fojon neracionalecon de la ekzisto, li komprenis, ke la konvinko pri ekzisto estiĝas el neracionala kredo kunigita kun ĉiuj niaj sensacoj, perceptoj kaj ideoj. Estas nek percepto nek ideo de iu ajn speco, kiun ni havas en la konscio aŭ en la memoro, kiu ne estus konceptata kvazaŭ ekzistanta kaj la plej eminenta ideo; eĉ la konvinko pri ekzisto naskiĝas el tiu ĉi konscio." Hume montris la gravecon de la kreda elemento ĉe la ideo de ekzisto, kaj volis per ĝi klarigi la neracionalan eron en la ideo de ekzisto.

**Elano vitala** *č. ivotní elán, f. élan vital.*
Esprimo enkondukita kaj popularigita de tre eminenta franca filozofo Henri Bergson en lia verko Krea evoluo" (1907). Ĝi signifas esencon de la tuta universa vivo, sed ne tiel, kiel prezentas al si tian substraton ia celeca aŭ kaŭzeca sistemo. Elano estas esenco de la vivo mem, sed nek kvazaŭ kaŭzo nek kvazaŭ celo. Ĝi signifas la plej fundan kaj la plej elementan fakton de la viveco. Ĝi estiĝis en nekonataj sed certaj momento tempa kaj punkto spaca kaj daŭre diavolviĝadas kreante la diversegajn formojn de la vivo kaj donante al la materio diversajn formojn de objektoj. Disvolvo de la vitala elano iris laŭ du malsimilaj direktoj: vegetaloj estas unu poluso de la dubranĉa disiĝo, animaloj la dua. Sed en ĉiu el tiuj du branĉoj la vivo diversfoje kaj diveramaniere disvolviĝadis. Inter la animaloj du direktoj estis speciale preferataj de la evoluo: la

unu ĉe la vertebruloj, la dua ĉe la insektoj. Ĉe la unuaj evoluis la intelekta flanko, ĉe la duaj la instinkta. Sed neniam estas trovata sola intelekta aŭ soln instinkta kapablo. Ĉar ili ambaŭ estas produkto de la sama komenca elano, kies ili ambaŭ estas du flankoj el nekalkuleble granda nombro de kapabloj kaj evoluopovoj. La vitala elano havas laŭ vortoj de Bergson sian esencon en la bezono kreadi. Ĝi ne povas esti absolute krea ĉar materialo, kiun ĝi povas uzi por siaj kreaj celoj, estas materio; kaj tiu ĉi estas kvalite tute kontraŭa al la elano. La materio estas inerta kaj determina, do senlibereca, ĝi mem kaj ĉio en ĝi estas necesa. Sed la elano vitala estriĝas de tiu ĉi materio kaj enigas en ĝin kiom eble plej multon da libereco kaj maldetermineco, kvankam la materio kontraŭstaras tiun penadon pro sia inerteco. Pro tio estas formoj de la vivaĵoj tiom diversaj.

**Elektrono** *a. electron, č. elektron, f. electrone, g. Elektron.*

Elementa kvanto de elektro. Atomoj konsistas el elektronoj, pro ilia elektra karaktero duspecaj t. e. negativaj kaj pozitivaj. Elektronoj estas ĉiam la negativaj, pozitivaj ne havas ankoraŭ fiksan nomon. Iam oni nomis ilin protonoj, iam pozitivaj elektronoj. Kvanteco de tiuj ĉi partetoj estas eksterordinare malgranda eĉ kompare kun absoluta pezo de hidrogenatomo. Ĝi estis kalkulita el devojiĝo de katodaj radioj per elektra kaj magneta kampoj kaj trovita proksimume unu dumilono da pezo de unu hidrogenatomo. Sed tiu ĉi pezo laŭ mezuradoj pri rapideco de katodaj radioj kaj de proporcio inter elektra ŝarĝo kaj materio pligrandiĝas kun rapideco de la radioj. E1 tio oni estas devigata konkludi, ke pezo de la elektrono ne estas konsekvenco de ĝia materio, sed de rezisto de la elektraj kampoj elektrona kaj akcela. Alie dirite: elektrono, kiu estas la plej fundamenta ero de materio, ne estas materia sed elektra ero. Pro tio oni povas koncepti materion

kiel fenomenon elektrodinamikan. Per helpo de tiu ĉi ideo pri elektrono sukcesis Niels *Bohr* klarigi multajn ecojn de ĥemiaj elementoj. Li imagigis H-atomon konsistanta el 2000 pozitivaj kaj negativaj elektronoj. La plej granda parto de ili estas kunigita en atoma kerno, treege unu apud la alia. La elementaj elektraj kvantoj en la atomkerno neŭtraligas sin reciproke escepte kelkajn pozitivajn, kiuj restas liberaj. La nombro de ili estas ĉe ĉiu elemento alia: la plej malgranda ĉe hidrogeno, unu, la plej granda ĉe uranio - 92. Ĉirkaŭ ĉiu atoma kerno ĉirkaŭas en orbitoj la sama nombro de elektronoj, kia estas la nombro de pozitivaj liberaj ŝarĝoj en la kerno. Diametroj de tiuj orbitoj estas kompare kun la diametro de la kerno tre grandaj. Tial estas eĉ en la atomo multe plI da malplena spaco ol da materio.

**Emano** *a. emanation, č. emanace, emanácia, f émanation, g. Emanation.*
Naskiĝado de iu estaĵo pli simpla aŭ malpli alta el iu estaĵo pli komplika aŭ pli perfekta, ankaŭ el estaĵo plej perfekta, plej alta, sen transformiĝado aŭ malgrandiĝado de tiu ĝi. Bildo de tia emano en materia mondo estas emano de lumo aŭ varmo el ĝiaj fontoj. Laŭ doktrinaro de novoplatonanoj kaj gnostikuloj estas la mondo emano de dio, kiu restas malgraŭ tio tamen senŝanĝa. Laŭ *Jambliĥo* (  330 p. K.) el la prakaŭzo emanas la Unuaĵo, el ĝi konceptebla mondo, el ĝi intelekta mondo kun spirito, el tiu ĉi la animo, el tiu ĉi fine emanas sensa mondo.

**Emocio** *a. emotion, č. emoce, emocia, f. émotion, g. Gejühlsbewegung*.
Ĉia iom intensa ŝanĝo en la senta stato kunigita kun volaj elementoj: komplikaj sentoj, sentafekcioj, pasioj, humoroj kaj simile. Ĝi povas estiĝi subite, surprizige (emocio kolizia, ekz. kolero kaj timo) aŭ malrapide per disvolviĝo de la sento (senta

emocio, ekz. amo, malamo, ĝojego, malespero). Ĉe ĉiu emocio oni povas distingi tri esencajn elementojn. Unue: ekobservo de iu situacio (subita malfeliĉo, rapidanta danĝero, neatendata feliĉo). Due: malordiĝo de imagoj kaj ideoj, kiuj ekkuras laŭ nekutimaj direktoj tiel, ke ni ne povas ilin estri per kutima streĉo. Trie: aro de organaj malregulaĵoj (batado de koro, tremo, paliĝo, ruĝiĝo, ŝvitado, larmoj k. t. p.). Ĉiuj ĉi tri faktoroj efikas kiel iniciantoj de emocioj. Kiu el ili estas la plej primitiva, la plej baza, kaŭzanta la ceterajn, pri tio ekzistas du teorioj. La pli malnova  psikologia" akceptas, ke la origino de emocio estas en sfero psika, t. e. en la malordigo de la ideoj kaj intensigo de sentoj, kiuj okazis pro eniĝo de iu objekto en sferon perceptan aŭ pensan. Organaj reakcioj la emocion akompanantaj estas ĝia natura konsekvenco. Tio estas klasika opinio pri esenco kaj deveno de emocio. La nova teorio  fiziologia aŭ periferia" elpensita de *C. Lange, W. James* kaj iliaj disĉiploj asertas, ke la komencaj elementoj de emocio estas la ŝanĝoj en la periferiaj korpaj organoj (sensaj, movaj, vazomovigaj). *W. James* resumas sian teorion en jena paradoksa teksto: Estas malvera la vulgara opinio, ke oni tremas, ĉar oni timas, aŭ ke oni ploras, ĉar oni estas malĝojigita. La kontraŭo estas vera. Oni timas, ĉar oni tremas, oni malĝojas, ĉar oni ploras. Argumentoj por tiu teorio estas jenaj: 1. Kelkaj observoj montras, ke sola percepto de iuj objektoj elvokas malregulaĵon en iuj organoj, el kiu malregulaĵo sekvas la psika emocio. Ekz. la ŝafoj tremas vidante lupon, la ĉevaloj furioziĝas flarante odoron de rabbestoj, eĉ se ili neniam iel spertis danĝerecon ĉe tiuj ĉi perceptoj. Homoj mem ĉiam ektremas ekvidanle subite nigran staturon dum duonlumo, kvankam penso pri ebla danĝero nur poste estiĝas en nia psiko kiel sekvo de enorganaj malregulaĵoj. 2. Neniu imago, neniu penso povas veki en ni emocion alimaniere ol se ĝi elvokas ian reakcion en la

organismo, kaj tiu ĉi reakcio estas origino de la emocio, determinante ĝin per influo de materio je psiko. Emocioj estas konsciiĝoj pri malordoj skuantaj la organismon. Ekz. la fuĝo el la batalo elvokas pluan timon ĉe la fuĝantoj kaj tiel la timo grandiĝas ĝis paniko. Nia malĝojo fariĝas pli profunda per niaj plorsingultoj. La kolero kreskas per koleraj krioj kaj ceteraj vidigiloj de ĝi. Tiuj ekzemploj montras laŭ James konvinke, ke la menciitaj emocioj havas sian originon en la nomitaj organismaj reakcioj. 3. La ĉefa argumento estas, ke emocion oni ne povas forigi de la sensaco kaj de la organisma ekscito. Ili apartenas al ĝia esenco, sen ili restus el la emocio senenhava nocio, artefaritaĵo de penso, al kiu mankus ĉio, kio estas emocia; tia nocio estus efektiva neo de emocio. La sensacoj kaj fenomenoj organismaj estas ja esencaj kaj fundamentaj elementoj de ĉiu emocio. Kontraŭ la periferia teorio oni povas diri, ke la aluditaj faktoj estas tute bone klarigeblaj ankaŭ laŭ teorio psikologia per instinkto (ŝafoj, ĉevaloj), aŭ per surprizo (nigra staturo), aŭ per asociado (fuĝo, kolero). Sed estu ĝia taksado kia ajn, nefordisputebla merito de la Jamesa teorio estas en tio, ke ĝi donis novan pruvon, ke la homa organismo estas unueca, kiel tio sekvas al ĝia tria argumento. Kontraŭ dualismo de Descartes, kiu vidas en emocio fenomenon sole de animo akompanatan, kaj vidigantan sin per okazado materia sen ia ajn esenca rilato inter fenomenoj materiaj kaj spiritaj, asertas James: Emocio homa sen rilato al homa korpo estas pura ne-esto. Emocio disigita de ĉiu organisma sensaco estas netaŭga abstraktaĵo.“

**Empiriismo** *a. empirism, č. empirizmus, f. empirisme, g. Empirismus*.
Noetika opinio, ke la sperto estas la sola fonto de ĉia kono. Ofte ĝi aperas kunigita kun sensualismo asertanta, ke ĉiu imagado kaj pensado estas ekskluzive reciproka sin asociado

kaj afekciado de malpli klaraj perceptaĵoj. Kiel doktrino e. igas sperton pli valoranta ol simpla metodo eksperimenta. Tiu ĉi uzas eksperimenton, do observon de spertaĵoj, sed estrante ĝin, aplikante ĝin al celoj elpensitaj de la eksperimentanto. En sia plej simpla formo la e. neniel atentas la fakton, ke la homo ĉiam aldonas al spertaĵoj ian kunigon kaŭzan aŭ celan, pensante pri ĉiu (aŭ preskaŭ pri ĉiu) spertaĵo kiel rezulto de ia kaŭzo aŭ fino de ia celo. Empiriismo volas nenion aserti *apriori*", sed ĉion venigi al faktoj" ne sole la praktikon de la agado, sed ankaŭ ĉian eksplikon, ĉiun teorion. En tio ĉi ĝi estas atakebla. Ĉar la homa spirito eksplikante ĉiam aligas al aŭ eligas el la spertaĵoj. La plej primitiva supozo aŭ ekspliko estas, ke efiko de materiaj aĵoj daŭras ankaŭ antaŭ aŭ post la homa observado. Tiu supozo estas malfacile konstatebla empirie, kaj tamen estas bazo de ĉiu klarigado de la aferoj. Kontraŭo: raciismo. Fondintoj de empiriismo en la moderna filozofio estas rigardataj Francis *Bacon*, John *Locke*, Etienne de *Condillac*. E. estris precipe en la angla filozofio, en la nova epoko sciis ĝin defendi sukcese *j. Stuart Mill. Kant* provis forigi la malkunigeblon inter empiriismo kaj apriorismo.

**Empirio** *č. empirie, empiria, g. Empirie.*
Ĉio atingebla al la homa kono per sensoj. Empiriisto rigardas empirion ekskluziva bazo de la homa kono.

- En medicino kaj ankaŭ en aliaj aplikitaj sciencoj: Laborado kaj konkludado laŭ sperto nesufiĉe vasta, nekompleta kaj nekontrolita de ĝeneralaj leĝoj. Ĉiam en malŝatiga senco. Homo tiel aganta estas empiriulo.

**Energetiko** *a. energetics, č. energetika, f. énergetique, g. Energetik.*
Scienco kaj doktrinaro pri energio. Ĉia fondinto estas Julius Robert *Mayer (1814-1878).*

**Energiismo** *e. energetizmus, g. Energetismus.* Uzo de energetiko por metafizika sistemo klariganta ĉian okazadon en universo, esencon kaj fenomenaron de la naturo kaj spirito, vivojn de individuo kaj homaro per principo de energio. Fondis, disvolvis kaj popularigis ĝin Wilhelm *Ostwald*, glora germana ĥemiisto (* 1853). Principe ĝi estas materialismo, kiu anstataŭ koncepto de materio metas koncepton de energio. Oni provis apliki energetikan rezonadon kaj meditadon ankaŭ en etiko kaj proklamis kiel bazan normon de la etiko la *energiisman* (= energetikan) *imperativon* ordonantan: Ne malŝparu iun ajn energion!

**Energio** *a. energy, č. energie, energia, f. énergie, g. Energie.* En natursciencoj: kapablo produkti laboron. Substance estas e. unusola, sed aperas sub diversaj formoj kiel e. mekanika, elektra, kalora, luma, ĥemia. Ĝia kvanto estas mezurebla per kvanto de la laboro de ĝi produktata. Tial estas diversaj mezurunuoj por diversaj formoj de e. Ekz.: *Ergo* por la mekanika, *Kalorio* por la kalora kaj *Watto-sekundo* por la elektra. Ceteraj formoj de energio ne estas ankoraŭ mezureblaj, tial mankas unuoj por ili. Rilatoj inter la unuoj nomitaj estas mezureblaj kaj mezuritaj tre precize kun plena fidindeco. 10,000.000 ergoj egalvaloras 0'2387 kalorioj, egalvaloras 2'788 dekmiliononoj de 1 kilovato-horo. Diversmaniera uzo de tiuj unuoj kaj plej preciza kaj ofta mezurado pri transformado de tiuj ĉi formoj de energio pruvis kun imageble plej granda certeco la plej ĝeneralan leĝon de fiziko pri sin-konservado de la energio, kiu konstatas: Sumo de la energio en la universo estas konstanta; laboro povas esti produktata ekskluzive per transformado de unu speco de energio en alian specon tiamaniere, ke neniam povas estiĝi pli aŭ malpli da laboro ol respondas al kvanto de disponata aŭ

disponebla energio; inter energio enmetita en sistemon en iu formo kaj ricevita en aliaj formoj ĉiam ekzistas egaleco koncerne kvanton. Tiu ĉi leĝo estas ankaŭ nomata *unua* termodinamika propozicio. El ĝi sekvas neebleco de perpetuum mobile de unua grado“, t. e. de maŝino liveranta laboron sen ekvivalenta enmeto de aliforma energio. Ĝi estas pruvita pri la mekanika, kalora kaj elektra formoj energiaj. Pri ĥemia kaj optika formoj ĝi ne estas ankoraŭ pruvita, ĉar ĝis nun oni ne sukcesis mezuri tiujn formojn de energio, sed oni pro prava eksterenmeto supozas validon de la leĝo ankaŭ pri tiuj energiformoj. Vitalismo supozas iam specialan vivenergion, iam oni supozigas specialan psikan energion kiel kaŭzon de la psikaj fenomenoj; ĉiuj provoj iel ajn mezuri efikojn de ili restis ĝisnun senrezultaj. Mezurado pri enirado kaj elirado de energioj en vivantan korpon plurfoje tre zorge aranĝita montris la postulatan energian ekvilibron de energio tre precize, tial oni povas konjekti, ke la propozicio pri sinkonservado de energio ne necesas validi ankaŭ pri fenomenoj de la vivo kaj de psiko. La transformo de la kalora energio en alian formon diferencas de la ceteraj energiaj transformoj tiel, ke la kaloro neniam transiĝas en alian formon komplete, sed ĉiam restas iu kvanto netransformita en speciala formo kalora nomata entropio, kiu ne estas plu transformebla en alian energiformon. Tiu ĉi leĝo estas nomata ankaŭ dua termodinamika propozicio (principo de Carnot-Clausius). Oni povas ĝin esprimi ankaŭ tiel: Se oni kalkulas la enmetatan kaloron pozitiva kaj la elmetatan negativa, tiam sumo de ĉiuj senfine malgrandaj kalorkvantoj dividitaj ĉiuj per siaj koncernaj temperaturoj ĉe inversebla cirkla procedo egalas nulon. El tiu propozicio sekvas neebleco de  perpetuum mobile“ de dua grado, t. e. maŝino, kiu ŝanĝus kaloron en mekanikan laboron suprenigante ĝin sur pli altan temperaturon.

**Enteleĥio** *a. entelechy, č. entelechie, etitelechia, f. entelechie, g. Entelechie*.
Aristotela termino por nomigi la aktivan principon de naturo; ĝi estas tio,  per kio materio eniĝas jen en formon de vitroida kvarco, jen en formon de leono, jen en formon de homo" *(Liebmann).* Principo, kiu estigas el la eblo la efektivan aĵon kaj efikas, ke ĝi perfektiĝadu ĝis kiam ĝi atingos la plej altan gradon de perfekteco kaj plenumos per tio sian celon. La terminon reprenis *Leibniz* por apliki ĝin por monadoj:  Oni povus doni nomon de enteleĥioj al ĉiuj kreitaj substancoj simplaj aŭ monadoj, ĉar ili posedas en si certan perfektecon; enestas en ili sufiĉeco por si mem, kiu igas ilin fonto de iliaj agoj internaj kaj por tiel diri aŭtomatoj senkorpaj." (Monadologio). En samtempa filozofio uzis tiun terminon *H. Driesch* por nomigi la supozatan specialan forton de vivaj fenomenoj, volante anstataŭi per ĝi la klasikan nomon de la viveca forto. E. efikas je materia korpo nedifektante la principon pri konservo de energio. V. Vitalismo.
**Ento** *a. entity, č. entita, f entité, g. Entität*.
En esperanto devus esti uzata sole por redoni la skolastikan terminon (latinan) *Entitas* en signifo de substanco, esto, estaĵo.

**Epifenomeno** *a. Epiphenomenon, č. epifenomenon, f. épiphénomčne, g, Begleiterscheinung.*
Akcesora fenomeno, kiu estas koncerne la observaton sekundara, negrava, netuŝanta la esencon de la fenomeno pritraktate. Certe estas preferinde diri en esp-o akcesora fenomeno, sed la origina vorto e. estas uzinda precipe, se temas pri *Epifenomena teorio* pri rilato inter menso kaj korpo. Laŭ ĝi estas konscio sole epifenomeno de cerbo kaj nervoj respektive de nervaj procedoj,  fajrero elĵetita de la maŝino", nepovanta afekcii la nervajn reakciojn pli ol ombro paŝojn de pilgrimanto".  Aligo de konscio al vivantaj korpoj ne donas

argumenton por supozo, ke konscio havas sian propran kaŭzecon aŭ afekcias organismon, en kiu ĝi aperas.“ (*Hodgson*). Ĉefaj reprezentantoj de la epifenomena teorio estas: *Maudsley, Clifford, Huxley, Hodgson* k. a.

**Epistemologio** *a. epistemology, č. epistemologie; epistemologia, f. épistemologie, g. Erkenntnislehre.*
Teorio pri origino, esenco kaj limoj de la kono. Ĝi estas l o g i k o, se ĝi esploras formojn kaj normojn de la ekkonanta pensado, n o e t i k o, se ĝi esploras enhavon de kono, ĝiajn estiĝon, disvolvon, kondiĉojn, certecon kaj limojn, m e t o d o l o g i o, se ĝi aplikas observojn kaj spekulaciojn pri kono al diversaj sciencoj. Ĝenerale ne estas uzo de la termino e. tre preciza. Kelkaj volus doni al la logiko pli ampleksan kampon tiel, ke e. estus parto de logiko, kontraŭe al supra klarigo. De la noetiko e. estas dislingebla pro tio, ke ĝi estas sole enkonduko en ĝin studante la konon aposteriore en difinitaj kazoj ĉe diversaj sciencoj, dum noetiko volas doni bildon kaj klarigon de la homa kono en ĝia kompleteco.

**Epikurismo**
Origine filozofia instruo de greka filozofo Epikuro (341-270) kaj de lia skolo, pli poste ekskluzive lia etika tendencaro, kiu vidas la plej altan bonon en ĝuo, sed ne en ekskluzive korpa ĝuo, kiel malĝuste iam estas pensata, ĉar epikurismo elektas inter la diversaj eblaj ĝuoj kaj preferas la ĝuojn spiritajn, kiel la pli daŭrajn kaj malpli trompajn. Epikuro volis liberigi homon de la jugo de pasioj kaj de tiraneco de dioj, doni al ĝia koro la neforigeblan liberecon kaj nesubigeblecon al iu ajn ekstera potenco. La homo estas laŭ li subigita al superatiĉoj, kun kiuj ligas ĝin triobla timo: pro morto, pro dioj, pro infero. Tial Epikura fiziko, materialisma pro principo, prenas al dioj regadon de la mondo. La dioj estas malproksimaj kaj neniel

interesas pri tiu-ĉi mondo. La naturo estas la unusolo, kiu rilatas kun la homo, la naturo sen iu ajn dio. El tiu-ĉi konstato metas sin la etika demando, kiu estis por Epikuro ĉefaĵo, jene: kio estas en la naturo la plej alta bono? Kaj li respondas: la plezuro; ĉar la fizikaj propozicioj instruis nin, ke la solaj iloj, kiujn ni posedas por distingi inter la bono kaj malbono, inter dezirindo kaj maldezirindo, inter serĉindo kaj malserĉindo, estas nia kapablo esti afekciataj, tio estas ricevi impresojn de plezuro aŭ doloro; krom tio la observo montras al ni, ke ĉiuj animaloj depost ilia naskiĝo serĉas la plezuron kaj forkuras de la doloro. Tial estas la ĉefprincipo de la epikura etiko: eviti la doloron, serĉi la plezuron. Sed estas bezone distingi inter du specoj de la ĝuo: unu kvieta, persista kaj daŭra, volupto en ripozo, la dua viva, rapida kaj sendaŭra, la volupto en movo. La unua estas liberigo de ĉiuj doloroj, de ĉia malkvieto; la dua estiĝas per ia tiklado de la korpo, ĝi estas sole invito de la naturo satigi korpajn bezonojn. Ĉar korpo ĉiam povas suferi per diversaj doloroj kaj malkvietigoj, estas la sola vojo por veni al daŭra feliĉo la klopodado de spirito; ĝi posedas en la memoro la rimedon venki la doloran estantecon rememorante dum doloraj impresoj pri plezuroj estintaj kaj esperante pri plezuroj estontaj. La animo kapablas eviti la doloron tiamaniere, ke ĝi trovas rimedojn esti kiom eble plej malmulte afekciata de la korpa mondo, ke ĝi malkonsilas al la homo eviti publikan vivon, celadon por potenco publika, por regado, por riĉeco, ja plej utile estus laŭ epikurismo, se la homo sukcesus estiĝi punkto en spaco kaj universo por esti plej malmulte atakata de ebleco de la doloro. En tio videbliĝas la plej malforta flanko de epikurismo: se oni atingus ĝian etikan idealon, ĉiu homa agado ekmalmoviĝus.

**Esto** *a. bein,g, č. bytí, bytie, f. ętre, g. Sein.*

Havas pro sia fundamenteco preskaŭ tiom da signifoj, kiom estas da filozofioj. 1. Ĝi estas la plej ĝenerala predikato, kiu estas ebla, povante esti asertata pri io ajn. Tial diro de Hegel: Esto egalas nenio. 2. Ĝi signifas aserton, ke io ekzistas aŭ eblas ekzisti. Tiu signifo ĉiam enhavas iom da ideo de unueco aŭ determineco en la ekzistantaĵo. Tiel enestas en la Arislotelaj ideoj "Esse in potentia" (Esti en poveblo) kaj "Esse in actu" (Esti en ago). 3. Ekzisto en spaco aŭ tempo kontraŭita al ideo aŭ imago. El tiu vidmaniero naskiĝis demando, kiom la estaĵo korespondas kun imagaĵo pri ĝi, t. e. ĉu ideo ekzistas aŭ ne. - Materialistoj egaligas eston kun la materio, idealistoj kun la spirito. Laŭ *Herbart* al rilatoj ne apartenas signo de esto, laŭ *Lotze* esti signifas esti en rilaloj.

**Eskatologio** *a. escatology, č. eschatologie, eschatologia, f. escatologie, g. Eschatelogie*.
Doktrino pri la lastaj finoj de universo kaj de homaro. Precipe uzata de teologiistoj pri "la lasta tago", "la lasta juĝa tribunalo", pri la poste venonta stato de la mondo.

**Etika**
1. Rilatanta etikon. - 2. Morale bona, konforma al etikaj normoj.

**Etiko** *a. etics, č. etika, f étique, g. Ethik.*
Scienco pri morala volado kaj agado. E m p i r i a e. en pli ampleksa senco estas psikologio kaj sociologio de la morala konduto kaj historio de ĝia evoluo. Ĝi priskribas laŭ psikologia kaj sociologia vidmanieroj la staton de moralaj ideoj, sentoj, juĝoj, agoj, analizas ilin kaj volas ilin dedukti el biologiaj, psikologiaj kaj sociaj faktoroj. E. f i l o z o f i a volas trovi principojn de moraleco, tio signifas starigi idealajn leĝojn, kiuj regas 1a homajn farojn. Tiuj leĝoj estas starigotaj

por ebligi al homoj, decidi pri farota ago, sed ili ne enestas ie en la naturo kaŝitaj por esti trovataj. La e. filozofia do ne serĉas, kio estas vero, sed kio devus esti vero. Tiaj idealaj leĝoj, kiuj devas estri homan agadon, estas nomataj normoj kaj e. apartenas inter sciencojn normigajn (ne kaŭzecajn). *E.* konstatas valoron de homaj volado kaj agado koncerne enhavon, celon kaj idealon de la morala volo. Problemo de filozofia etiko povas esti reduktita al du demandoj: l. Ĉu la homo havas ian la plej altan bonon, la plej lastan celon, kiun ĝi devas atingi kaj kio estas tiu ĉi celo? En aliaj vortoj: en kio konsistas por la homo la bono kaj la devo. 2. Kiamaniere estri la agojn de homo atentante tiun ĉi celon? Kiamaniere apliki la normojn al diversaj situacioj de la vivo? En aliaj vortoj: kiuj estas la diversaj devoj de la homo? La unua demando estas pli teoria, pli spekulacia. . Ĝi koncernas la esencajn kondiĉojn kaj konsekvencojn de la moraleco; ĝin penas respondi etiko ĝ e n e r a l a (teoria, formala). La dua demando estas pli praktika; ĝi aspiras je respondo per delala klarigo de devoj, instruoj, kiamaniere agi en diversaj konkretaj situacioj de la vivo. Tian respondon donas *e*. p r a k t i k a aŭ delala. La plej alta bono, al kiu celas ĉiuj normoj, povas esti kondiĉita aŭ per iu aganto metafizika (Dio fiksanta aŭ fiksinta la moralan idealon) aŭ per tuto de la ekstera kaj interna mondo. Laŭ tio estas distingataj *e*. h e t e r o n o m i a (havanta sian plej altan aŭtoritaton ekster la kontrolebla mondo) kaj *e*. a ŭ t o n o m i a derivanta siajn normojn el faktoj alireblaj al nia esploro. Etiko estas iam rigardata kiel memstara scienco (almenaŭ laŭ ĝia empiria konceptado), iam kiel fako de filozofio (necese tiam, se ĝi prenas kiel sia bazo metafizikon), iam kiel esenca parto de filozofio, kiu atingas en etiko sian plej noblan celon (precipe kiel ĝenerala esplorado pri valoroj).

**Etiologio** *a. etiology, č. etiologie, etiologia, f. étiologie, g. Aetiologie*.
Scienco pri kaŭzoj de fenomenoj el difinita klaso. Speciale: En biologio studo pri deveno de organoj, funkcioj, kapabloj. En patologio studo pri kaŭzoj de malsanoj kaj nenormalaĵoj. En historio analizo de kaŭzoj aŭ kunligo de kaŭzoj, kiuj produktis okazintaĵojn priskribatajn.

**Etologio** *a. ethology, č. etologie. etologia, f. éthologie. g. Ethologie*.
Tiel nomas J. St. *Mill* karakterologion, sciencon pri karakteroj de individuoj kaj nacioj. *Wundt* nomigis tiel specialan sciencon, kiu studas historian evoluon de moroj kaj moraj ideoj.

**Eŭdaimonismo** *a. eudaemonism, č. eudaimonizmus, f. eudémonisme, g. Eudaemonismus*.
Etika tendenco, kiu vidas celon de la socia organizo en homa feliĉo, en homa bonfarto. Eŭdaimonisma estas en esenco de sia celo preskaŭ ĉia etiko. Ĉar homo per sia tuta agado volas nenion alian akiri ol la feliĉon. Eĉ se li elektas malplezuron (asketismo), li elektas ĝin sole por akiri per ĝi la pli altan bonstaton, ĉu surteran ĉu postmortan. La demando naskiĝas el malfacileco trovi, kio estas la efektiva feliĉo. En sia plej ĝenerala koncepto feliĉo neniel taŭgas por esti la plej alta etika mezurilo, ĉar ĝi estas valoro tro subjektiva.

**Evidenteco** *a. evidence* (uzata angle en multe pli larĝa senco ol en esperanto), *č. evidentnost, f. évidence, g. Evidenz.*
Memkomprenebleco de juĝoj bazita aŭ sur propra sperto, percepto, travivo (e. i n t e r n a, p e r c e p t i t a) aŭ sur pensado kondukanta ĝis logikaj principoj. "Nocio estas ĝusta, propozicio vera, korpo reala, rilato evidenta" *(Schopenhauer).*

"Evidenteco, tio estas intua certeco, povas neniam deveni el aprioraj nocioj. (Kant.)

**Evoluo** *a. evolution, č. evoluce, evolucia, f. évolution, g. Evolution.*
En biologio: iompostioma transformo de unu speco animala aŭ vegetala en la alian konforme al *teorio pri deveno de la specoj*, laŭ kiu ĉiuj animalaj kaj vegetalaj formoj estas kunigitaj pro sia origino el la antaŭaj formoj, kaj la organika mondo disvolviĝas kontinue. Tiu ĉi teorio estis ĝenerale akceptita de biologio depost apero de la verko "Origino de specoj" (Origin of Species) de Charles Robert *Darvin* en 1859. Li uzis terminon "deveno kun modifoj" por karakterizi sian teorion pri evoluo. Darvin vidigis ke: 1. samtempaj kaj fosiliaj specoj estas pli malpli izolaj formoj, sur kiuj estas efektivaj kontinuaj trajtoj de disvolvo. Ĉesigoj de la kontinueco estas klarigeblaj per nesufiĉa kvanto da observoj. 2. Natura selektiveco estas kaŭzo, pro kiu la adaptiĝintaj organismoj vivas pli longe kaj transdonas siajn adaptaĵojn progresie al la novaj formoj kaj donas akcepteblan klarigon por observoj pri faktoj de geografia distribuo, klasifiko, morfologio, embriologio, rudimentaj organoj. 3. Elimino de formoj starontaj inter relative stabilaj formoj apudaj en kontinuaj linioj estas klarigebla per videbla izoliteco de tiuj ĉi transiraj formoj koncerne la variantajn kaj diverĝantajn liniojn de kontinua evoluado. 4. Diverĝeco unufoje komencita povas naski sendependajn liniojn de deveno. 5. Homo sukcesis ricevi grandajn rezultojn en hejma bredado de animaloj sur la principo de selektiveco efikanta pro heredeco kaj variado. En la principo de natura selektiveco estis trovita precipe post verkoj de Herbert *Spencer* treege taŭga labora hipotezo por sukcesa apliko de la evoluo al ĉiuj problemoj biologiaj. Post disvolvo de teorio pri ĉelo estis la evolua teorio metita ekster dubon

koncerne la samtempajn formojn de la vivo kaj estis rigardata tre probabla koncerne formojn de la pasinteco. Ĉefaj problemoj nuntempe diskutataj estas: Amplekso de la natura selektiveco. Esenco kaj limoj de la hereda transigo de ecoj. Origino, kvanto, direkto, distribuo de variado ĉe ecoj. Ĉu la teorio de evoluo en la nuntempa formo sufiĉas per ĉiuj siaj faktoroj klarigi ĉiujn formojn de adaptado, specajn diferencojn, videblajn ĉenojn en kontinueco de specaj formoj samtempaj kaj pasintaj? En la lasta lempo provas kelkaj, precipe *Pearson*, esplori per statistika kalkulo variadon, selektivecon kaj heredecon por kontroli taŭgecon de la teorio de evoluo kaj ebligi pli da ekzakteco en ĝi.

**Fantazio** *a. fancy, č. fantazie, fantazia, f. fantasie, g. Phantasie.*

Imagado, kiu estas nek kontrolata de la subjekta elektado nek estrata laŭ iu plano por atingi volatan celojn sed dependas nur de la nedaŭra kaj hazarda asociado kaj disociado de ideoj. Ofle oni nomas fanlazion pasiva imagado. Per ĝi estiĝas novaj kompleksoj el imagoj enestantaj en nia konscio. Nek arto, nek scienco, nek ĝiaj aplikoj povas disvolvi sen fantazio. En arto estas la krea povo de f. limigata de nenio krom esprimaj eblecoj, en scienco ĝi estas limigita per objektiva efektivebleco, povebleco de kreitaĵoj. La hazardeco aŭ senplaneco de fantazio signifas, ne ke ĝi havas nenian celon, sed ke tiu celo povas esti konceptata sen ia ajn certeco pri ĝia efektivebleco.

**Fatalismo** *a. fatalism, č. fatalizmus, f. fatalisme, g. Fatalismus.*

Kredo, ke estonta sorto de homo kiel individuo kaj kiel sociano estas neŝanĝeble destinila de metafizika potenco (de *Fatum* = fatalo). F. povas eliri el dolorplena rezigno, sed ankaŭ simple el maldiligenteco. Ĝi malatentas la fakton, ke la

volo de la homo estas ĉiam komponanto de la monda okazado, kaj ke la volo povas fariĝi des pli ĉefa komponanto, ju pli ĝi estas ligata kun kompreno de kondiĉoj de la okazado. "Neniu neceso en la naturo estas blinda, sed kondiĉita neceso, sekve komprenebla neceso: ekzistas neniu Fatum" (Kant). "Mia Formulo por grandeco de la homo estas *amor fati* (amo de la sorto): ke oni nenion alian havi volas, antaŭen ne, malantaŭen ne. eternen ne. La neceson ne sole trasuferi, nek kaŝi - ĉiu idealismo estas mensogemaĵo rilale neceson - sed ami ĝin." (Nietzsche en Ecce homo.) Tion kontraŭas iom la aliaj vortoj de la sama aŭtoro. "Fatalismo, nia nuna formo de filozofia delikatsentado, estas ankoraŭ formo de tiu antikva kredo je dia destino, iu senkonscia konsekvenco: nome kvazaŭ dependus neniel de ni, kiamaniere ĉio iras, kvazaŭ ni estus devigitaj lasi ĉion kuri, kiel ĝi kuras: ĉiu individuo sole modo de absoluta realeco" *(Nietzsche* en Volo al potenco). Islamo estas religio bazita sur fatalisma konvinko.

**Fetiĉismo** *a. fetichism, č. fetišizmus, f. fetichisme, g. Fetischismus.*
Antaŭŝtupo de la religio. Anim-similaj spiritoj loĝas en certaj objektoj (fetiĉoj), kiuj estas pro tio respektegataj aŭ adorataj.

**Filozofio** a. philosophy, č. filozofie, filozofia, f. philosophie, g. Philosophie.
Laŭvorta traduko de la origine greka vorto estas amo de saĝeco. Unuan fojon ĝi estis uzita en tiu ĉi senco en Sokrata skolo. La vorto "filozofos" unuan fojon estas uzita ĉe Herakleito en senco: serĉanta esencon de la aĵoj. Celo kaj enhavo de f. estis de diversaj filozofoj diversmaniere difinita. Laŭ *Platono* ĝi estas kono de tio, kio ekzistas, kio estas eterna kaj nepereebla; laŭ Aristotelo esplorado pri kaŭzo kaj principoj de aĵoj; laŭ stoikuloj klopodado por teoria kaj prak-

tika kapableco; laŭ *epikuranoj* ebleco estiĝi feliĉa per intelekta rezonado. En la mezepoko estis f. metata en kontrastan kontraŭon al teologio; dum ilo de f. estas natura lumo de la homa intelekto, ricevas teologio siajn pli altajn verojn per supernatura revelacio. Francis Bacon kaj Descartes vidas en f. tutecan sciencon, kiu donas scion pri ĉio en formo de logikaj konceptaĵoj. Al ĝenerale akceptata difino pri temo de f. oni neniam venis, kiel atestas ekz. Th. Jouffroy, dirante, ke f. estas sccinco, kies temo ne estas ĝis nun fiksita. Tamen diversaj pensuloj diversmaniere ĝin difinis aŭ imagis kvazaŭ ilia difino estus definitiva. Okazis eĉ, ke iuj trovis filozofion tute ne esti scienco kaj okupo inda de pensa laboro. La pensuloj pozitivismaj estas fieraj pri tio, ke ili ne estas filozofoj. La filozofio perdis laŭ ili ĉiun kaŭzon por ekzisti, ĉar ĉiuj problemoj, kiuj povus interesi la homaron, estas nun jam dividitaj inter la diversaj fakaj sciencoj. Ili donas sole partajn respondojn al partaj demandoj, sed tiuj respondoj estas science ekzaktaj kaj tial multe pli ĝojas kaj utilas al la homo ol Fantaziaj konceptoj de ia senbaza meditado, kiu volas uzi sciencan esprimmanieron, sed fakte ne estas io pli ol ludo de la fantazio, kiu neniel povas helpi al pli bona ekkono de ia ajn vero. Nenion plu povas sukceae fari la filozofio nun, en epoko de la specialiĝinta sciencaro, ol esti klasiganto de la ceteraj sciencoj. Auguste Comte (1798-1857) estas kreinto de tiu ĉi neado de filozofio. La homo per ekzaktaj sciencoj instruita pri la neebleco ricevi absolutajn ideojn rezignas serĉi originon kaj destinon de la universo kaj koni la plej profundajn kaŭzojn de la fenomenoj por dediĉi sin ekskluzive per meditado kaj observado al serĉado de efektivaj leĝoj naturaj, t. e. rilatoj neŝanĝeblaj de la sinsekvo kaj simileco. Sed kvankam tiu instruo trovis multan kaj bruan aprobon precipe ĉe la natursciencistoj, tamen ĝi neniel malgrandigis la bezonon kaj ĝuon filozofi. Ĉar ju pli alta estas progreso de la sciencoj, des pli mirinda estas la

fakto, ke la scienco estas ebla, ke la subjekto (la primeditanta homo) estas kapabla sistematigi siajn perceptaĵojn, ke la mondo povas esti pensata. Serĉi respondon al tiuj demandoj neniam ĉesos la homaro kaj neniam tedos ĝin aŭskulti tiajn respondojn. Kaj neniam ĝi estos kontenta kun tiaj respondoj, eĉ estu ili elpensitaj per la plej sagaca intelekto kaj diritaj en la plej plaĉaj vortoj. Tial neniam la filozofio perdos sian kaŭzon de ekzisto kaj eterne ĝi konsolos la homajn korojn, kaj eterne ilin turmentos. Kaj eterne la filozofoj disputos, ĉu ilia temo estas ontologia aŭ fiktiva. Ĉar filozofio neniam estas sole jesado, el kiu sekvas plezuro kaj ĝojo. En tio ĝi esence diferencas de la religio. La religio respondas je la samaj demandoj kiel la filozofio. Sed dum la religio daŭre scias ĉion, la filozofio estas daŭre skeptiko; dum la religio atendas veron de la revelacio Dia, esperas savon de la supernatura potenco kaj enigas homon en decidon de la Dia graco, la filozofio volas trovi la veron mem aŭ per meditado aŭ per intuicio, savon esperas de la homara moraleco edukebla kaj volas organizi la homaron tiel, ke la sorto de individuo estu kiom kaj kiel ajn eble pli milda. Ĝenerale oni konsentas, ke f. disiĝis en diversajn specialajn sciencojn, kiujn oni nomas filozofiaj, sed kiuj kreis aŭ kreas por siaj taskoj specialajn metodojn kaj volas kun pli malpli da sukceco simili al ceteraj natursciencoj. Ili estas: psikologio, sociologio, estetiko, etiko, logiko, noetiko, metafiziko.

**Formala** *a. formal, č. formální, formálny, f. formel, g. formal*

estas nomataj: formo, eksterajo metata kontraŭ materio; rilataro, skemo kontraŭ objekto; realo kontraŭ poveblo; reciproka rilato inler partoj de tuto.

**Formalismo** *a. formalism, č. formalizmus, f. formalisme, g. Formalismus.*

1. Doktrino, ke veroj de iu scienco (precipe matematiko) estas pure formalaj, bazitaj ekskluzive sur difinoj kreitaj pro aŭ laŭ konvenciaj bezonoj. 2. Neado de ekzisto aŭ graveco de substanco aŭ materio pro konvinko, ke gravas sole aŭ plejparte konsidero de fenomenoj laŭ la formala vidmaniero. Tiun vidpunkton havas iam en estetiko doktrino pri "arto por arto". En etiko ĝi estas enhavita en morala konsilo de Kant en "Kritiko de praktika intelekto": "Se rezonkapabla estaĵo devas prezenti al si siajn maksimojn kiel ĝenerale validantajn leĝojn, ĝi povas ilin prezenti al si sole kiel tiaj principoj, kiuj enhavas decidargumenton por la volo sole laŭ la formo, ne laŭ materio." Tiu kondiĉo estas plenumita en la morala leĝo donita sur la sama loko: "Agu tiel, ke maksimo de via volo povu ĉiam validi kiel principo de ĝenerala leĝaro."

**Genoj** *č. geny, g. Gene.*

Determinantaj eroj en organismoj, hipotezataj en ĝermplasmo de ovaj kaj semaj ĉeloj. Ili laŭ supozo kondiĉas la kvalitojn de la kreskantaj organismoj (*Johannsen*, Principoj de la ekzakla doktrino pri heredo, 1923).

**Gnostikismo** *a. gnosticism, č. gnosticizmus, f. gnosticisme, g. Gnostizismus.*

Unua provo de ia kristiana religia filozofio. Sed la gnostikuloj anstataŭ pensi en la difinitaj nocioj kreadisa fantlaziajn imagaĵojn kaj estigis tiamaniere duonkristanan mitologion, kiu kvazaŭ alegorie prezentis ĝermojn de la kristana mondkompreno. Estis multaj gnostikaj skoloj. Komuna preskaŭ al ĉiuj estis: dualismo inter Dio kaj materio, kunigo de tiuj du profunde diferencaj nocioj per vico de mezestaĵoj; ideo pri emano kaj pri reveno de ĉiu vivantaĵo al sia origino per la savo. Ofte ĝi bazas sur novoplatonismo, aldonante al ĝia doktrinaro multajn elementojn teozofiajn kaj

mistikajn. En la nova tempo oni uzas tiun ĉi vorton pri filozofia konvinko, ke la homo povas ekkoni la absolutan esencon de la esto. La ago de kono konsistas laŭ ĝi ne en la intelekla rezonado, sed en senpera intuicio; tiu ago estas nomata per specifa vorto gnostiko.

**Hedonismo** *a. hedonism, č. hedonizmus, f. hedonisme, g. Hedonismus.*

Etika tendencaro, kiu vidas celon kaj motivon de la homa agado en dolĉeco kaj volupteco sensaj. La sola malbono estas laboro kaj sufero. Ĝi originas de *Aristipo* (435-355 a. K.) el Kyrene. Virto estas ĝuokapablo; sed sole homo klera, prudenta, saĝa scias bone ĝui; li ne obeas ĉiun deziron kaj, se li ĝuas, li ne malaperas en la volupla ĝuo, sed estras ĝin. *Teodoro Atheos* trovis, ke la plej alta bono enestas en gaja humoro kaj ne en momenta ĝuo. *Annikeris* venis al konvinko, ke pli alta ĝuo estus trovebla en spiritaj ĝojoj de la homa komuneco, amikeco, familieco ol en korpaj ĝuoj. *Hegesias* konkludis, ke jam tiu meritas esti nomata feliĉa, kiu estas senigita de malgajo kaj doloroj. Hedonisma estis ankaŭ filozofio de *Epikuro*, poste de *Helvetius, Holbach, Lamettrie.*

**Heterogena** *a. heterogeneous, č. heterogenní, heterogenný, f. heterogene, g. heterogen.*

Kies partoj montras diferencojn diversspecajn, precipe koncerne strukturon kaj funkcion.

**Heterogeeneco de celoj.**

Leĝo pri ŝanĝo de celoj nomigita de W. Wundt: La celo, kiun volis la homa agado atingi, estas atingata aŭ ne, sed la efiko de koncerna homa agado igas sin super la originan celon; tiu ĉi povas iam eĉ malaperi kaj la kromaj celoj

anstataŭas ĝin. Tiu ĉi leĝo estas iam nomata ankaŭ leĝo de neintencataj efikoj *(Jellinek*) aŭ de anstataŭiĝantaj motivoj (*Höffding*).

**Heteronomio** *a. Heteronomy, č. heteronomie, heteronomia, f. hétéronomie, g. Heteronomie.*

Situacio de persono aŭ de kolektivo, kiu ricevas la leĝojn obeatajn kaj obeotajn el ekstero. Kontraŭo: Aŭtonomio.

**Heuristiko** *č. heuristika, f. heuristique, euristique, g. Heuristik.*

Parto de logiko traktanta pri metodoj de esplorado. En historio: traserĉado de dokumentoj. - H e u r i s t i k a m e t o d o en pedagogio igas la lernanton trovi mem tion, kion oni volas al li instrui.

**Hilozoismo** *a. hylozoism, č. hylozoismus, f. hylozoďsme, g. Hylozoismus.*

Opinio, ke la materio estas elorigine vivigita, ke ĝi enhavas spiriton, ke ĝi posedas aktivecon kaj perceptkapablon. V. Animismo.

**Hipotezo** *a. hypothesis, č. hypotéza, f. hypothese, g. Hypothese.*

En logiko supozo klariganta grandan grupon de faktoj, ne plene pruvita, nur versimila; se la amplekso de hipotezo estas tre granda, ĝi estas nomata teorio.

**Historiismo** *č. historizmus, g. Historismus.*

Scienca kaj filozofia tendenco. precipe en la 19-a jarcento, komprenadi kaj klarigadi aferojn kaj konceptojn laŭ vidmaniero historia: el ilia evoluo, estintaj medio, situacio kaj kuniĝo, atenti pli la laŭepokan evoluon de ideo ol ĝian

enhavon. Pro troa atento pri ŝanĝoj ĝi ne vidas la aferon mem. Kontraŭaj terminoj: realismo, dogmismo, sistemismo.

**Homaranismo.**

Instruo de Zamenhof, laŭ kiu estus rilatoj inter homoj plibonigitaj, se la homoj interkonsentus akcepti neŭtralan religion enhavantan principojn komunajn al ĉiuj religioj kaj se ili interkonsentus ne altrudi al si perforte siajn personajn gentajn, naciajn kaj rasajn diferencojn kaj preferojn. Zamenhof publikigis tiun instruon unuan fojon en anonima broŝuro titolita Homaranismo aperinta en 1906 en Leningrad. En antaŭparolo li klarigas jene: "La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religianaro, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco." Nur kiam en 1912 Zamenhof formetis de si ĉiun oficialan rolon en esperantismo, li deklaris sin publike aŭtoro de homaranismo. Plej grava dokumento el tiu Zamenhofa klopodado povas esti rigardata lia "Letero al diplomatio", publikigita en 1915 en esperantaj gazetoj. Plej bone kompilis informon pri tiu ĉi celado de Zamenhof Ed. *Privat en* sia "Vivo de Zamenhof".

**Homo** *a. man, č. člověk, f. homme, g. Mensch.*

Laŭ zoologia sistemigo apartenas homo en la grupon de primatoj el mamuloj, en kiun grupon apartenas krom ĝi ankoraŭ simioj kaj duonsimioj; pli detale apartenas homo en subgrupon antropoidan konsistantan krom ĝi el gorilo, orangutano, ĉimpanzo, gibono. Argumentojn por tia envicigo de la homo liveras ĝia korpstrukturo, ĝia evoluo, kemia konsisto, ĝiaj korppartoj. Laŭ ĝenerala evoluisma teorio

devenas la homo el la sama radikformo, el kiu devenas ankaŭ antropoidaj simioj. La diferenciĝo de la radikformo okazis versimile en terciara epoko. Pri specialaj kaŭzoj de estiĝo de la homo estas eblaj sole hipotezoj. Sed esploroj de kompara anatomio, historio de evoluo kaj paleontologio donas ĉiam pli da scio pri vojoj, per kiuj homo evoluiĝis al speco de nuntempa historia homo nomata por zoologia sistemo: *homo sapiens*. La homo de la diluvia epoko, la *prahomo*, latine *Homo primigenius*, havis oblikvan frunton, tre evoluintajn brovojn, malgrande evoluintan suban makzekon, tre fortajn dentojn; per ĉiuj tiuj signoj la prahomo pli similis al simioj. Fosiliaj restaĵoj de ĝi estis trovitaj en Neandertal (1856), La Neulette (1866), Spy en Belgio (I887), Taubach apud Weimar (1895), Krapina en Jugoslavio (l899), La Chapelle kaj Le Moustier en Francio (1908), Mauer apud Heidelberg (1908), Pittdown en Britlando (1912), Broken Hill en Rhodesio (1920), Peking (1927).

**Homogena** *a. homogeneous, č. homogenní, homogenný, f. homogene, g. homogen.*

Kies ĉiuj partoj havas saman naturon sen individuaj diferencoj. Oni uzas specife kiel atributon de nombro kaj de spaco. Ĉiuj unuoj konsistigantaj nombron estas reciproke homogenaj. Ĉiuj partoj de spaco estas tute similaj unu al la alia. En homogena spaco oni povas translokigi ĉiun figuron sen ĝia deformo. - En matematiko: funkcio f (s, y, z) estas nomata homogena, se validas rilato $f(ks, ky, kz) = k^m f(s, y, z)$. Esponanto m estas nomata grado de homogeneco de la funkcio.

**Homologeco** *a. homology, č. homologie, homologia, f. homologie, g. Homologie*.

Ĉe stoikuloj koincido de raciaj juĝoj, konvinko kaj vivmaniero. - En biologio: egala deveno de la organoj, eĉ se ili poste diferenciĝis; estas ekz. homologaj flugiloj birdaj kaj brakoj homaj, sed ne flugiloj insektaj; tiuj ĉi estas sole analogiaj al birdaj flugiloj plenumante sole saman fiziologian funkcion, sed ne estante deriveblaj de la samaj organoj. - *Spengler* en sia libro "Pereo de la okcidentlando" parolas pri kulturaj homologecoj ekz. inter greka plastiko kaj la norda instrumentmuziko; ili estas laŭ li esprimo de egala grado en evoluo de spiritvivo de diversaj kulturmondoj. - En matematiko korespondaj partoj de similaj figuroj estas nomataj homologaj. - En ĥemio estas nomata homologa serio sinsekvo de kombinaĵoj diferencantaj per la sama atoma grupo kaj posedantaj similajn ecojn ŝanĝantajn laŭgrade. (Ekz. metana homologa serio).

**Humanismo** *a. humanism, č. humanizmus, f. humanisme, g. Humanismus.*

Movado celanta en komenco de la novepoko ricevi idealon de homa aŭ tuthomara eduko el studo de antika kulturo. Ĝi enkondukas epokon de renesanco; ĝia fondanto estas rigardata greko Manuel Chrysoloras, vivinta kaj instruinta grekan lingvon en Firenze depost 1396. La plej grandaj verkantoj en unua periodo humanisma estis *Dante, Petrarca, Boccacio*. Aliaj eminentaj humanistoj estis: italoj kardinalo *Bessarion*, Georgios Gemisthos *Plethon*, Eneo Silvio *Piccolomini* (posta papo Pius II.), Pietro *Bembo*; hispano *Vives*, franco instruita presisto Robert *Etienne,* brito Thomas *Morus*, nederlandano Desiderius *Erasmus*, germanoj Rudolf *Agricola*, Johannes *Reuchlin*, Ulrich *Hutten.* En Germanujo *h.* fine transiĝis en eklezian reformismon. - 2. Nomo donita de F. C. S. *Schiller* el Oxford al lia kompreno kaj adapto de pragmatismo, kiun li klarigis precipe en siaj verkoj

Humanism, philosophical Essays 1903 kaj Studies in Humanism, l907. Ĝi estas noetika doktrino, ke ĉiu nia kono en siaj motivoj, amplekso kaj celoj estas ĉiam homa kaj elhoma, ne povas transpasi homajn poveblojn, estas naskata kaj kondiĉata de la homaj bezonoj. Propozicioj esprimantaj homajn juĝojn estas veraj aŭ malveraj laŭ tio, ĉu iliaj konsekvencoj havas aŭ malhavas praktikan valoron. Do la vereco kaj malvereco dependas de tio, kion oni celas: ĉiu pensa vivo supozas celojn. Ĉar tiuj celoj ne povas por ni, kiuj ni estas, esti aliaj ol ni estas, ĉiu nia kono necese estas subigita al homa naturo kaj al ĝiaj bezonoj. "Humanismo estas simple konsciiĝo, ke filozofia problemo koncernas homajn estaĵojn klopodantajn kompreni mondon de homaj spertoj per iloj de la homa menso." *(Schiller.)*

**I.** En logiko simbolo de propozicio parta, jesa, laŭ mnemonika versoparo. - V. A.

**Idealismo** *a. idealism, č. idealizmus, f. idealisme, g. Idealismus.*
Termino tre ampleksa kun tre diversaj signifoj.
Metafizike: Aserto, ke objektoj ne estas io alia ol niaj pensoj. Ne ekzistas ekstera mondo en ni imagata. La mondo estas nur kaj ekskluzive tiu nia imagado. Reala estas sole la pensaĵoj, realeco de objektoj konsistas sole en tio, ke ili estas pensataj de la subjektoj. Ekzisti estas esti preceptata *(Esse est percipi, Berkeley*). La plej konsekvenca formo de tiu *i.* estas sol-ipsismo. /. metafizika (ankaŭ nomata ontologio) estas spiritualisma. La postsekvintoj de *Kant*, precipe *Fichte, Schelling, Hegel* provis eligi ideon de noumeno, de aĵo en si mem, el siaj doktrinoj kaj ricevadis nomon de i. a b s o l u t a. Malgraŭ gravaj diferencoj, ili ĉiuj tri konsideras la distingon inter subjekto kaj objekto, mi kaj ne-mi, tiun distingon, en kiu

konsistas la konscio, kiel derivitan kaj ne principan. Esto antaŭanta la konscion, absoluto antaŭanta relativon signifas identecon de subjekto kaj objekto.
*Noetika*: Konvinko, ke kono ne atingas aliajn realaĵon ol la pensaĵojn mem. Laŭ *Descertes, Malbranche, Leibnitz* estas la vera rilato inter objektoj de ekkonado kaj nia kono, tio signifas laŭvera rilato inter la realaĵoj kaj pensaĵoj, garantiita de vereco Dia per la antaŭdestinita harmonio. Laŭ *Kant* ekzistas noumeno. "Por ke ekzistu aspekto, necesas, ke ekzistu aĵo, kiu aspektas." Sed la noumeno ne estas konebla. Fenomenoj de nia konscio, kiuj estas niaj propraj modifaĵoj aŭ afekciaĵoj ne povas esti alimaniere pensataj ol en certaj formoj kaj laŭ certaj reguloj. Tiuj formoj kaj tiuj reguloj apartenas al la natura esenco de la spirito, ne al esenco de la aĵoj, kaj kondiĉas eblecon de esto. Tiun ĉi doktrinon de Kant oni nomas ofte i. subjektiva. I. transcenda estas iam nomata tiu de Leibniz. Nun estas relative ofte nomataj idealismo ĉiuj konvinkoj, ke estas ebla ia ekkono pri absoluto aŭ transcendo; en tiu senco ĝi estas kontraŭa al pozitivismo.
Etika en populara senco de la termino: ĉia tendenco vidanta celon de la homa klopodado en idealaj valoroj, ekz. en vero, bono, belo, ĉiam en io pli alta ol estigo de la sensa ĝuo kaj egoistaj postuloj.
Estetika: postulas, kontraŭe al realismo, ke la artisato korektu la naturon, transformiĝu ĝin, uzu ĝin sole por esprimi sian idealon, aŭ eĉ malatentu la naturaĵojn komplete. La arto devas serĉi la belon en revo, forgesigi nin pri la realo, konsoli nin en malbonhumoro naskata per observado de la naturo.

**Ideologio** *a. ideology. č. ideologie, ideologia. f. ideologie, g. Ideologie.*
Origine intenco analizi homan spiriton per studado de "ideoj" en la senco kiel faktoj de la konscio. La vorto en tiu senco

devenas de *Destutt de Tracy* (l796). Li kaj ceteraj ideologietoj de lia tempo volis per detala kono de fiziologia kaj psikologia organizo de eksteraj kaj internaj fenomenoj veni al praktikaj reguloj por eduko, etiko kaj politiko. K. Mars nomas ideologia tian klarigadon de sociologiaj fenomenoj, kiu uzas imagojn, ideojn, kredojn anstataŭ ekonomiaj faktoj. Nune oni uzas la vorton en senco iom malŝatiga pri sistemigoj de senenhavaj nocioj kaj pri filozofiaj spekulacioj; precipe en polemikoj oni nomas la kontraŭan deduktadon ideologio.

**Idolo** *a. idol, č. modla, idol, f. idole, g. Idol.*
l. Bildo de diaĵo adorata per religia kulto. - 2. Falsa bildo, antaŭjuĝo, erara aŭ erariga idealo. Laŭ Francis Bacon estaj idoloj (latine: idola) antaŭjuĝoj malhelpantaj ĝustan homan konon. Estas kvar specoj de ili: Idola tribus: tendenco atenti sole la kazojn por ni favorajn, preferi klarigon pli simplan, juĝi laŭ homa analogio. Idola apecus: eraroj de kono devenantaj de temperamento, eduko, medio, aŭtoritato, humoro. Idola fori: devenantaj el vulgarecoj de la lingvo, malprofunda divido, sur kiu bazas la lingvo, manko de vortoj taŭgaj por esprimo de realecoj kaj ekzisto de vortoj ŝajnigantaj elpensaĵojn kvazaŭ realaĵojn. Idola teatri: filozofado pure per vortoj, sofismado, filozofado superatiĉa k. s.

**Ignorabimus** (latine = ni ne konos).
Esprimo, per kiu E. *Dubois-Reymond* resumas konkludon de sia germanlingva verketo "Pri limoj de ekkono de la naturo" (l872). Li metas per tiu vorto la definitivan neeblecon koni la metafizikajn principojn de la natura okazado kontraŭ ignoramus (= ni ne konas) la leĝojn naturajn, kiuj validas kaj kiuj estas daŭre pli kaj pli ekkonataj de la homo.

**Imagaĵo** *a. imagination, idea, č. představa, predstava, f, imagé, idée, g. Vorstellung.*
Bildo de objektoj aŭ de procedoj de la ekstera mondo aperanta en nia konscio. Imagaĵo devenas al la perceptaĵo, estas rememoraĵo pri ĝi, ĉiam distingebla de ĝi pro tio, ke imagaĵo havas malpli da signoj ol perceptaĵo. Se mi tenas en mia mano rozon, mi ĝin perceptas per diversaj miaj sensoj: vido, palpo, flaro. Mi havas perceptaĵon de la rozo. Kiam mi venontan tagon rememoras pri ĝi, mi havas imagaĵon de tiu rozo. La imagaĵo posedas certe malpli da signoj ol posedis la hieraŭa perceptaĵo, sed tamen ĝi estas kunmetita de kelkaj el signoj tiam perceptataj kaj tre versimile el kelkaj poste aldonitaj. Mi ekz. jam ne plu rememoros pri freŝeco de la rozo kaj versimile mi eĉ ne ekkonus la rozon hieraŭan, se mi ree ĝin perceptus. Sed la signoj, el kiuj konsistas la imagata rozo, estas parte la samaj, kiujn mi estas perceptinta. Tial David Hume konstatis, ke perceptaĵo diferencas de la imagaĵo ne laŭ kvalito, sed la kvanteco. Sole escepte povas okazi, ke imago estas tiom riĉa je signoj, ke ni trompiĝas supozante, ke imago estas percepto. Ĝi okazas preskaŭ ekskluzive en statoj patologiaj kiel halucinacio. Imagaĵo estas ĉiam fenomeno kombina, ĉiam disigebla je eroj. Se ni imagas sensacon, ĝi estas jam produkto artefarita, rezultato de abstraktiga pensado. Ni povas ekz. imagi verdan koloron, kvankam ni neniam povas percepti verdan koloron kiel unusolan perceptaĵon. Sed tio jam ne plu estas imago, sed jam nocio artefarita, logika. Ĝenerale la imagoj konsistas el eroj devenitaj de perceptoj el diversaj sensoj, sed ofte superas en imagaĵoj eroj el tiu aŭ el alia senso. Plej bone estas ĝis nun esplorataj imagoj vidaj kaj palpaj. Pri vidaj ekz. oni trovis, ke post forigo de klare kolora percepto aperas en konacio imago de komplementa koloro.

**Imanenta** *a. immanent, č. imanentní, imanentný, f. immanent, g. immanent.*
Kio daŭre enestas en io, kio estas en limoj de io precipe en limoj de niaj kono, konscio, aperto, kio ne superas nek transpaŝas limojn kaj eblecojn de tiu ĉi mondo, kontraŭo al transcenda. Imanentaj estas metodo destinata sole de objekto de esplorado, kritiko prijuĝanta iun pensaron el propraj supozoj de tiu ĉi pensaro mem. En noetiko signifas imanenta: daŭre enestanta en sfero de ebla sperto (*Kant*); daŭre enestanta en sfero de konscio (*Fichte*). Laŭ Spinoza estas Dio imanenta kaŭzo de la mondo; lia dio do ne estas ia ideo metafizika sed la mondo mem: dio identas kun naturo (Deus sive natura). - Imanenta justeco, imanentaj sankcioj estas tiaj, kiuj rezultas el natura disvolvo de aferoj sen efiko de iu faktoro de ili distinga. - Filozofio de imanenteco, idealisma filozofio eliranta el konvinko, ke ĉiu sperto estas imanenta en nia konscio, ke sperto estas scio, sperto estas ebla nur en la konscio, ĉio reala estas enhavo de universala konscio. Ĉefaj reprezentantoj de tiu ĉi filozofio de *i. estas Schuppe, SchubertSoldern, Ziehen.*

**Impresionismo** *a. impresionism, č. impresionizmus, f. impressionisme, g. Impresionismus.*

En arto klopodas redoni la purajn sensajn perceptojn aŭ sensacojn sen iaj ajn aligoj. En muziko estas ĝiaj elementoj troveblaj jam en la 16-a jarcento, sed konscie impresionisma muziko estas nur de Debussy. En pentrarto ĝi komenciĝis ĉ.1870 de Cl. *Monet en* Paris kaj fariĝis tre disvastigita pentromaniero. Preskaŭ samtempe ĝi fariĝis ankaŭ moda metodo en poezio, kie ĝi signifas redonon de psika stato de poeto simple, precipe sen cerbumado.

**Individuismo** *a., f. individualisme, č. individualizmus, g. Individualismus.*
Doktrino, ke aplikado de individua iniciatemo kaj klopodado pri la propra intereso devas esti de la ŝtato limigata malmulte eĉ nule kaj ke funkcioj de la regado devas esti reduktataj al minimumo. I. estas produkto de mezo de la 19-a jarcento. Opinioj de *Bentham, Ricardo* kaj James *Mill* devenas de Adam *Smith* kaj de francaj enciklopediistoj kaj estis konvinke kaj kvazaŭ definitive formulitaj de John Stuart *Mill* en la verko "Pri libereco" (1859) kaj *Spencer en* Socia statiko (1850). Tiuj du verkoj estas ĉefaj bazoj de i., kiu diferencas de anarkismo esence en tio, ke anarkismo volas, ke rega potenco posedu rajton kaj plenan povon devigi homojn al egaleco kaj libereco kaj aranĝi per tiaspeca devigado ordon de la socio. Spencer defendas individuismon per argumento, ke individua iniciato estas normala faktoro en socia evoluo dume ŝtata ago aŭ sinenmikso estas en multaj situacioj faktoro artefarita.

**Individuo** *a. individual, č. individuum, jedinec. f. individu. g. Individuum.*

Nocio vaste uzata kaj malfacile difinebla same en vulgara kiom en filozofia lingvoj. Ĝenerale oni konceptas, ke estaĵoj vivantaj kaj ne vivantaj trovataj en la mondo, materiaj aŭ psikaj, estas individuaj, t. e. reciproke distingeblaj, singularaj, unikaj. Sed en kio konsistas tiu individueco aŭ kio estas ĝia principo, estas temo de disputo same en sfero de specialsci-encoj kiel en afero de logiko kaj metafiziko. En logiko estas individuo metata kontraŭ diversaj ĝeneralaj nocioj ekz. kontraŭ genro, speco, kvalito, akcidenco. En psikologio oni ofte asertis, ke individuaj objektoj estas aĵoj de nia perceptado; laŭ tio estus koncepto pri individueco derivita senpere el nia sperto kaj nereduktebla al pli simplaj ideoj. Kontraŭ tio oni

montris, ke ni perceptas ĉiam kompleksajn vicojn de kvalitoj, karakteroj, rilatoj kaj kondutoj de la objektoj.

**Instinktoj** *a. instincts, č. instinkt, pudy, f. instincts, g. Instinkte.*
Kompleksoj de eksteraj, heredataj, determinitaj reakcioj komunaj al ĉiuj individuoj de la sama speco animala adaptitaj por atingi celon ĝenerale nekonsciatan de la aganta individuo. Ekz. persekutado de kaptoto, nestado movoj dum defendado k. a. Instinktoj karakterizas ankaŭ la homan genton, sur kiu ajn civilizacia ŝtupo ĝi staras. Tiuj ĉi hereditaj tendencoj estas esenca fonto aŭ moviga forto de ĉiu pensado kaj agado individuaj aŭ kolektivaj. Ili estas bazo, el kiu evoluiĝis homaj karaktero kaj volo, reakcioj instinktaj estas ĉe homo elirpunkto por la mensa vivo; sed tiuj ĉi instinktoj ne similas blindajn fortojn analogiajn al forloj en sciencoj pri malviva naturo, sed diferencas esence de ili pro tio, ke ili estas daŭre gvidataj de homaj kapabloj intelektaj, de kiuj la instinktoj estas estreblaj kaj estrataj. Sed la instinktoj ne estas iaj neŝanĝeblaj agmanieroj, kiuj rezistus al eduko; male la korpaj movoj, per kiuj la instinktoj aperas, estas modifeblaj en rimarkinda grado, kiel montris *James* kaj *Tborndike.* Instinktoj estas "blindaj" sole en komenco de la evoluo kaj ĉe la malpli altaj beataj tipoj; ili ne eligas konscion kaj racion. Intelekto instinktojn ne kontraŭas, sed estas ilia instrumento; la grado de konscio akompananta la instinktan agadon ne estas alta, sed, se la plenumo de la instinkta deziro estas malhelpata, tiam ĝi vekas konscion tre vivan. Vekiĝo de la instinktoj kaj ilia funkcio dependas de la ĉirkaŭanta medio, sen ĝiaj stimuloj ĝi ne disvolviĝus; ilia disvolvo estas laŭgrada kaj nur la matura individuo posedas ĉiujn instinktojn de sia speco kaj eĉ tiam ne ĉiujn en la sama grado, se la medio ne estis liverinta taŭgajn kaj plenajn stimulojn por ilia plena disvolviĝo. Laŭ Thorndike

kelkaj instinktoj povas eĉ tute foresti; pro komplikeco de imagoj ekmovigantaj la instinktojn, estas kelkaj instinktoj stimulataj samtempe, kaj kelkaj instinktaj tendencoj grupiĝas pli aŭ malpli sisteme ĉirkaŭ certaj objektoj kaj ideoj. Klasigi la instinktojn kaj doni ilian kompletan nomaron oni ne sukcesis ĝis nun. N. R. *Marshall* dividas ilin jene: l. instinktoj konservantaj vivon de individuo; 2. instinktoj konservantaj vivon de gento; 3. instinktoj konservantaj vivon de grupoj aŭ de socio. *Ch. Ellwood* dividas jene: 1. instinkto nutra, 2. reprodukta, 3. defenda, 4. asocia, 5. imita, 6. akira, 7. sinsubiganta aŭ sinsupreniganta, 8. konstruema, 9. luda, kiu ne estas aparta instinkto, sed prezentas liberan funkciadon de pluraj tendencoj instinktaj. Simile dividas instinktojn *James, De Bancels, Mac Dougal. Ribot, Thorndihe.* Kelkaj psikologoj malgrandigas ilian nombron, iam ekstreme reduktante ĉiujn je unu, fundamenta, ekz. *Freud* je seksa. Watson kaj Morgan trovis, ke per observo estas ĉe naskiĝintaj infanoj konstateblaj sole tri instinktoj: timo, kolero, amo; sed eĉ ili ne devas esti nomataj instinktoj, ĉar ili ne estas heredaj kapablecoj, sed aro de kondutmanieroj, kun kiuj la homo naskiĝas.

**Intelektismo** *a., f. intellectualisme, č. intelektualizmus, g. Intellektualismus.*
P s i k o l o g i a doktrino, ke la bazaj psikaj statoj estas imagoj, tio estas ideoj rezultintaj el agoj de la inielekto, el pensado, kaj ke la ceteraj psikaj fenomenoj estiĝas el reciproka interago de la imagaj elementoj. Malpli konsekvenca intelektismo instruas, ke la imagoj estas almenaŭ la plej ĉefaj elementoj de la psika vivo. *I. metafizika* vidas la veran realon, la efektivan esencon, de la objektoj sole en la ideoj kreitaj de intelekto per rezonado. *I. etika* rigardas kiel bona sole tian agadon, kiu rezultas el intelekta meditado kaj

racia konvinko, virton ĝi rigardas kiel perfektan scion. *I. n o e t i k a* estas sinonima kun racionalismo.

**Intelekto** *a. intellect, understending, č. rozum, f. intellect, entendement, g. Verstend.*
Kapablo koni, kompreni, koncepti, juĝi, konkludi. I. estas kapablo "pensi konceptaĵojn kaj rilatojn inter ili" (W. Wundt), "la plej mirinda, la plej granda, eĉ absoluta potenco" *(Hegel).* Ofte kontraŭata al sensaco. Laŭ *Locke* sensacoj estas materialo, kiuj i. prilaboras. De dua flanko estas kontraŭo al i. racio.

**Introjekcio** *č. introjekce, introjekcia, g. Introjektion.*

Enmeto de propraj animaj statoj (perceptaĵoj, pensoj, emocioj, volaĵoj) en objektojn de la ekstera mondo kaj enmeto de pensado de ceteraj homaj individuoj en ilian internon. Pro i. disiĝis laŭnatura unueco de la empiria mondo en mondon eksteran kaj internan, en objekton kaj subjekton. Ĝusta pritrakto de la mondo, la scienco, devas forigi tiun ĉi introjekcion kaj renovigi la laŭnaturan konceptadon de la mondo. Ideo pri i. plurfoje uzata, ricevis nomon kaj difinon de Avenerius.

**Introspekto** *a. introspection, č. introspekce, introspekcia, f. introspection, g. Introspektion, Selbstbeobachtung.*

Observado de siaj propraj internaj fenomenoj psikaj, konsciiĝado de tio, kio okazas en nia menso, imagoj, Pensoj, sentoj, tendencoj. De klasika psikologio rigardata kiel la sola metodo psikologia, de behaviorisma skolo deklarata kiel

metodo tute neuzebla por scienca esploro, de la plimulto de psikologoj samtempaj uzata kiel unu el la plej ĉefaj metodoj.

**Intuicio** a. intuition, č. intuice, intuicia, jasnozření, f. intuition, g, Intuition.
Ekkonado senpera, sen efiko de la racio, sen kutima sperto empiria, per speciala sperto spirita, per subita apero, per eniro en ekstazon. Tiuj, kiuj kredas tian konon ebla, asertas pri ĝi, ke intuicia kono estas pli alta, tio signifas pli proksima al vero, al efektiva ekzisto, ke ĝi estas kono neefekciata de sensaj trompoj. Ofte oni asertas pri intuicio, ke ĝi estas graco de Dio aŭ escepta okazaĵo de supernaturaj fortoj. Ĝi estas donaco ne al ĉiu sed al elektitaj individuoj, kiuj volonte akceptis taskon la veron al ili revelaciitan transdoni al la ceteraj homoj nekapablaj por tiu supernatura kaj superracia kono. Oni povas distingi precipe du specojn de intuicio. La mistikan, kiu deklaras kiel sia kaŭzo la Dian gracon, revelacion, kaj la filozofian, kiu deklaras sin kompletigo de la ekkonado racia, kiu ebligas en unusola koncept-ago vidi la realon pli bone ol per konceptaĵoj derivataj el empiria travivaĵo. Sed la limlinio inter tiuj du konceptoj ne estas akra. Iam estas i. rigardata kvazaŭ krea principo, per kiu nur estiĝas realo.

**Intuiciismo** *a. intuinionalism, č. intuicionizmus, f. intuitionisme, g. Intuitionismus.*
E t i k a : doktrino pri senpera, intuicia, certeco de la etikaj ideoj kaj normoj. La konscienco estas denaska origina aktiveco intuicia. Aŭ emociokapablo decidas pri moraleco de ago pro senpera evidenteco. Estas nomataj per tiu termino Skota skolo, Hamilton kaj liaj disĉiploj kaj la francaj Eklektikuloj. "I. estas bazo de racia skolo en epistemologio kaj en etiko, metate kontraŭ sensualismo kaj utilismo" *(Fleming haj Galder*mood).

**Intuismo** a., i., f., g. kiel ĉe intuiciismo.
1. Intua voluntarismo: Esencon de sia propra esto la homo konsciigas per intua introspekto trovante, ke la esenco enestas en tio, ke li volas, ke volo estas la praesenco de lia ekzisto. El tio transmetas la homo la
voladon en ĉiun ceteran eston kiel ĝian substancon. 2. Psikologia iniuismo rigardas spacon kaj tempon objektoj de la empirio.

**Intuo** *a. intuition, č. názor, f. intuition (intelectuelle), g. Anschauung.*

Senpera preno en la konscion de iu objekto en ĝia kompleto, kiel ĝi afekcias ĉiujn sensojn kiel kompleta tuto (*i. ekstera*) aŭ de iu sperto psika kiel kompleta iravivaĵo (*i. interna*). Oni havas intuaĵon ekz. pri la tilio floranta antaŭ mia fenestro, se oni vidis ĝiajn koloron kaj formon, sentis malmolecon de ĝia ligno, malglatecon de la ŝelo, flaris la odoron de ĝiaj floroj. Dum estas la tilio antaŭ la sensoj efikante je ili, la intuaĵo similas perceptaĵon, se la efikado ĉesis, similas imaĝaĵon. Sed diferencas de ambaŭ per tio, ke intuo estas akompanata de pli streĉita atento, el kiu sekvas pli viglaj analizado kaj aperceptado. *Empiria* nomas *Kant* intuon, en kiu enestas percepto supozanta realan ĉeeston de la objekto; *pura*, se ne estas kunmiksita kun ĝi ia perceptero; pura percepto enhavas ekskluzive formon, en kiu estas io intuata. "Ne en abstrakta scio, sed en ĝuata kaj profunda intua konceptado de la mondo enestas fonto de la efektiva saĝo" (*Schopenhauer).* La intuaĵo ne estiĝas nur el la perceptaĵoj, sed ĝi estas ankaŭ kreata de la fantazio per kunmetado de diversaj imag- kaj intueroj: Subjektivaj intuaĵoj, inventitaj, revitaj. Instruado devas esti intua, t. e. doni plej kompletan bildon pri la instruata objekto.

**Irito** *a., f. irritation, č. vzruch, g. Erregung.*
En psikologio: Aliiĝo, per kiu reakcias vivaj organoj, precipe nervoj, je ekscito kaj kiu en nervocentro transformiĝas en sensacon. Ĝi estas fiziologia intermembro inter fizika ekscito kaj psikologia sensaco.

**Juĝo** *a. judgment, č. soud, súd, f. jugement, g. Urteil.*
Mensa decido, per kiu ni konstatas konvinkon kaj deklaras ĝin ĝusta. Ĝi do signifas jesi aŭ nei ian opinion. Ĉia alia difino estas tro malvasta. Juĝo estas esenca parto de nia pensado. Pensante ni ĉiam kunigas niajn imagojn, tutajn aŭ iliajn partojn. Tial oni ankaŭ povas difini juĝon kiel kunigon de ideoj (en psikologio), aŭ de nocioj (en logiko). Pri esenco de juĝo estas diversaj teorioj. Laŭ teorio metafizika de *Platono* kaj *Aristotelo* la juĝo reproduktas la laŭveran rilaton inter konceptaĵoj tian, kia ĝi efektive ekzistas inter konceptataj realaĵoj. Laŭ teorio nominalisma de Hobbes la juĝo estas nura esprimo de rilato inter du vortoj laŭ esprimmaniero kutimiĝinta en la lingvo. Diri, ke "la homo estas mortonta" signifas simple, ke "homo" kaj "mortonta" estas nomoj de la sama aĵo. Simile se oni diras "oro", oni diras samtempe "specifa pezo 19'4" aŭ "flava". Laŭ teorio empiriisma de J. St. Mill la juĝo ne esprimas sole la raporton inter la vortoj, sed ankaŭ inter la fenomenoj. La fenomenaro estas en la vortoj koncentrita, ĝi eniĝis en la vortojn, kiel rezultas de niaj spertaĵoj. Dirante pri la homo, ke li estas mortonta, oni konstatas rilaton inter du vicoj de spertaĵoj: unua pri la homo, dua pri la mortado. Laŭ teorio logikisma nomata konceptisma la juĝo konstatas efektivan rilaton inter niaj ideoj. Laŭ ĝi enhavas nia konscio ĝeneralajn ideojn, kiuj estas diversgrade ampleksaj kaj pro tio povas esti komparataj. La juĝo vidigas, kiel rilatas ampleksoj de diverasj ideoj, ekz. kiel amplekso de

ideo "homo" estas enhavita en amplekso de la ideo "mortonta." Al tiaj logikaj ideoj, kiuj estiĝas logikaj nocioj, necese apartenas ia grado de ekzisto. Laŭ teorio kritikisma de I. *Kant* la juĝo estas funkcio de la homa intelekto. Ĝia esenco estas en aplikado de aprioraj formoj al perceptaĵoj ricevitaj per sensoj. Tiuj logikaj formoj estas manieroj de homa pensado esprimantaj funkcion de la intelekto. La juĝo ne esprimas rilaton inter metafizikaj estaĵoj, sed ĝi ankaŭ ne koncernas ekskluzive fenomenojn kaj aliajn empiriajn rilaiojn. La juĝo esprimas rilaton inter necesaj leĝoj de pensado kaj fenomenaro. - La samtempaj filozofoj pragmatismaj precipe J. *Deweg* en sia klopodado apogi ankaŭ logikon sur fundamento plene empiria enkondukas en difinon de la juĝo kiel ĝian esencan signon, ke ĝi estas *laŭcela* kunigo de du ideoj, ĉar escepte instruanton de logiko neniu iam povas krei ian juĝon, se li ne bezonas ĝin por agado. Ekz. la juĝon "La akvo estas malvarma" mi kreos nur en tia situacio, se mi ial bezonas la akvon kaj ĝian malvarmecon, ekz. se mi intencas la akvon trinki, aŭ bani, aŭ lavi min, aŭ se mi fuĝas ŝprucantan akvon aŭ alimaniere. Sed sen tia bezono de agado mi neniam kreos ian juĝon pri "la akvo" kaj "malvarma". Ĉu necesas por ĉiu juĝo, ke ĝi estu esprimita per vortoj, ne estas decidite. Sed certe por povi esti objekto de ia ajn esploro psikologia aŭ logika la juĝo necese devas esti eldirita. Tiam oni nomas ĝin propozicio. V. t.

**Justeco** *a., f. justice, č. spravedlnost, spravodlivosť, g. Gerechtigkeit.*

Virto konsistanta en laŭrajte konduti kaj daŭre voli rajton. Laŭ jura senco estas justa tio, kio respondas al pozitiva jura volo; laŭ jurfilozofia senco tio, kio respondas al jura idealo, al juro, kia ĝi devas eati kiel kondiĉo de perfekta komuneco. Postulato de formala justeco estas, ke ĉiu ŝtatano estu

egalmaniere traktata laŭ la leĝo, respektive laŭ intenco de la leĝo. Justeco en pli alta senco postulas, ke ĉiu homo estu traktata en la sama maniero, kiun li rajtas postuli kiel membro de socia komuno kaj tiel, kiel tion la ideala komuna volo kondiĉas. La idealo de socijura justeco povas efektiviĝi ĉiam sole proksimume per influo je la pozitiva juro kaj je la leĝodona potenco. Al tio apartenas ankoraŭ, ke ĉiu homo estu traktata laŭ sia digneco kiel homo, kiel ano de homaro, kaj laŭ sia individua valoro, laŭ siaj faroj, kapabloj kaj oferemo. Platono takass justecon kiel la plej ĝeneralan virton, kies esenco estas en laŭnatura funkciado de ĉiuj animaj partoj; la asmon signifas j. laŭ li ankaŭ en la ŝtato. Laŭ *Aristotelo j.* estas la plej alia el la etikaj virtoj, ĝi signifas apliki la virton rilate la aliulojn. En la moderna filozofio oni difinas justecon kiel virto donanta al ĉiu, kio al li apartenas. *Spencer* difinas ĝin jene: "Estas permesite al ĉiu fari, kion li volas, ĝis kiam li ne tuŝas la saman liberecon de la alia." Paulsen: "Justeco estas direkto de la volo kaj sintenado, kiu atentas ne enpenetri rompe en vivon kaj interesaron de la aliaj kaj laŭ ebleco malebligas ankaŭ al aliaj tian enpenetradon."

**Kinestetikaj** a. *kinaesthetic, č.* kinestetické, f. cinésthetiques, g. kinästhetisch
estas nomataj sensacoj kaj sentoj de korpa movo, streĉo, uzo de korpforto koncernantaj la internon de la korpo.

**Kolektivismo** *a. collectivism, č. kolektivizmus,* F. *colectivisme, g. Kolektivismus.*

Vidmaniero en sociologio, historio, etiko, psikologio, kiu akcentas la signifon de la kolektivo, tuto, grupo, societo kontraŭ individuo. Ĉefajn movajn fortojn sociajn kaj historiajn ĝi vidas en kunesto supozante specialajn spiriton, penskapablon, menson de la socio. Kolektivismo politika

klopodas en pli malpli alta grado anstataŭi la posedon individuan per psaedo kolektiva (komuniamo). La termino estis kreita en j. 1869 en la kongreso en Basel por meti kontraŭ la ŝtata socialismo reprezentata de la precipe germanaj marksistoj socialismon ne-ŝtateman, ne-centralisman, reprezentatan tiam de delegitoj francaj, svisaj, belgaj kaj aliaj.

**Komplekso** *a. comples, ĉ., g. Komplex, f. complese.*
Sistemo de disaj eroj kunmetita laŭ difinitaj rilatoj. En psikoanalizo de S. *Freud* speciale: "Grupo de imagaj al si apartenantaj elementoj posedantaj emociigan povon, kiu pro repuŝado akiris specon de aŭtonomio kaj decidan influon ĉe sciigo de revoj, neŭrozoj k. s." En objektiva psikologio oni nomas kompleksaj tiajn fenomenojn, kiujn oni estas devigata observi neanalizitajn, ĉar oni ne povas disigi ilin en partojn observeblajn.

**Koncepti** a. concept, č. chápati, pochopovať, f. conceivoir, *g. begreifen.*
Per intelekto abstrakti kaj ĝeneraligi la ecojn de la observataj objektoj kaj formi tiamaniere difinatajn klasojn. Plej ĝenerale: pensi pri la objektoj laŭ la kapabloj de la homa intelekto. Formigi nociojn aŭ ideojn per intelekta kapablo.

*Konceptaĵo*, ĉia rezulto de la konceptado. Konceptaĵoj estas aŭ ĝeneralaj imaĝaĵoj psikologiaj aŭ nocioj logikaj, sed ankaŭ ĉiu nepreciza imagaĵo aŭ ideo, kiun ni havas pri la objektoj.

**Konkludo** *a. conclusion, č. závěr, záver, f. conclusion, g. Schluss, Schlussatz.*
Propozicio, kies vereco rezultas el vereco de aliaj propozicioj nomataj premisoj tiamaniere, ke la premisoj ne povas esti

veraj, se la konkludo ne estas vera. Speciale uzata en silogismo.

**Kono** *a. knowlegge, č. poznání, poznanie, f. connaissance, g. Erkenntniss.*
Ago de la penso, kiu l. penetras kaj difinas konataĵojn, 2. kiu trovas en kioma grado la objektoj estas efektive objektoj realaj. *Subjektive perfekta* estas tia kono, kiu ne lasas ion neklara aŭ konfuza en la konata objekto, objektive perfekta estas tia kono, kiu rilatas la konatajn objektojn en ilia tuteco. Kiel plej dezirinda kono estis de filozofoj rigardata kono adekvata, tia, kiu plene redonas la esencan realon. La gradon de la adekvateco de la homa kono kaj ilojn, per kiuj ni ĝin atingas, klopodas spekulative trovi Teorio de kono = noetiko. Eblecon de certa kono kontestas la skeptikismo. Subjektivismo supozas, ke k. estas nur subjektiva, relativismo, ke ĝi estas nur relativa. Empiriismo rigardas kiel la solan aŭ la ĉefan fonton de la k. la sperton, racionalismo derivas ĉiun konon aŭ almenaŭ ĉiun ĝian valoran enhavon el la racio aŭ el la racia funkciado, el la pensado. Realismo kredas posedi en la k. la realecon, fenomenalismo, ke ni konas nur eksteran flankon de la realo, la fenomenojn. Kritikismo ekzamenas kaj esploras la konan funkcion kaj ĝian signifon sen decidi sin por ia dogma aserto.

**Konscio** *a. consciousness, č. vědomí, vedomie, f. conscience, g. Bewustsein.*
1. Ĉiu fenomeno psika tute ĝenerale. Konscii signifas do havi psikajn travivaĵojn, sensaci, senti, imagi, voli. Io estas en mia konscio signifas: ĝi estas de mi travivata, estas imagaia, volata, sentata. Laŭ tiu signifo ne povas ekzisti iaj "nekonsciataj" psikaj procedoj, ĉar psika kaj konsciata estas la samo. 2. Konscio estas specifa parto de psikaj travivaĵoj. Ju pli

fikse, pli proksime, pli intime apartenas tiu ĉi ero en la ceteran psikan travivaĵon, despli alta estas tiu konscio. Io estas en la konscio signifas tiam: ĝi apartenas inter partojn de la psika travivaĵo. 3. Konscio ne signifas sole la travivitaĵon kaj travivataĵon, ĝi signifas krome ankoraŭ observadon kaj atenton de la subjekto pri objektaj travivaĵoj. Al tiu observado respondas diversa grado de klareco kaj certeco tiel, ke la travivaĵoj estas relative nekonsciaiaj, nesciataj, neatentataj, prijuĝataj. Iun aferon konscii signifas tiam: ĉion, kio al la afero apartenas, pli malpli klare imagi, kompreni, prijuĝi. - La konscieco mem estas nedifinebla; ĝi estas io origina, nederivebla, sed iamen ĝi estas iel kunligita kun iaj empiriaj kondiĉoj rilate ĝian intensecon, direktecon, enhavon, manieron. La konscio havas ĉiam du flankojn; ĉiam io konsciata konsciiĝas dum la konsciado, la konscio estas samtempe aktiva kaj pasiva, ago kaj fiksebla enhavo. Ĉu la konscio estas la origina aŭ derivita parto de la homa psiko, estas daŭra problemo psikologia. Nun tempe oni provas derivi ĝin el la volo. Ĝi povis naskiĝi el la volo kaj por servi al la volo. Ĝi aperis en la mondo, kiam la vegetaloj permesis al la volo krei pli perfektajn vojojn por kresko kaj disvolvo. Asimila funkcio de vegetalo ne bezonas movon nek ebligas ĝin. Sed apero de bestoj signifas evoluon laŭ direkto de la mova aktiveco kaj al iom-post-iom pli klara konscio. Konscio supreniĝas el movado por biologia celo de memkonservo per laŭcela estrado de la movoj. Se estas ebla nur unusola ago, la konscio estas nur kaŝa, neaperanta, nevidiganta sin, sed tie, kie la faro kunpuŝiĝas kun rezisto, la konscio aperas. La konscio vekiĝas en batalo kun materio. Ĝi estas kapablo konkiri la materion, kapti, estri, regi ĝin. Labori kun materio signifas elekton inter la diversaj movoj kaj komprenon de rilatoj. Kiam la homo komencis konstrui al si loĝejon, ne interesis lin demando, ĉu la materialo efektive ekzistas, sed kia estas ĝia

firmeco kaj aliaj rilatoj inter tiu materialo. Konscio evoluadis el kono pri rilatoj. - Celo de tiu ĉi klarigo estas montri, kiamaniere oni povus klarigi la naskiĝon de la konscio. Kompreneble la klarigo estas hipoteza, kiel estis ĉiuj plifruaj klarigoj pri deveno kaj esenco de la konscio.

**Kontingenteco** *a. contingencic, č. nahodilost, contingence, kontingencia, f. kontingence, g. Kontingenz, Zufälligkeit.*
Kontingenta estas tio, kio okazas aŭ ekzistas pro hazardo, sen kaŭzo en senco kontraŭita al necesa. Kontingenta estas laŭ s-a Tomaso el Akvino, "kio eblas esti kaj neesti" (quod potest esse et ne esse), laŭ Chr. Wolf "kies kontraŭo enhavas neniun kontraŭon forigan, sed kio ne estas necesa" (cuius opositum nullan contradictionen involvit,sed quod necesarium non est). *Arisfotelo*, *Cicero,* skolastikuloj, *Descartes, Leibnitz, Chr. Wolf* trovas, ke la fenomenoj de la mondo ne ĉiam rilatas reciproke kiel kaŭzoj kaj efikoj, ke precipe la fenomenaro de ekstera kaj interna mondo konceptata kiel tutaĵoj ne povas esti komprenataj alimaniere ol sen ia ajn lasta kaŭzo. Se oni ĉiujn fenomenojn klasifikas kiel kaŭzojn kaj efikojn, ĉiam restas la plej ĝeneralaj propozicioj, la plej ĝeneralaj veroj, kiuj restas sen kaŭzo, sen argumento, sen pruvo. Ili estas kontingentaj kaj el ilia ekzisto sekvas kontingenteco de la mondo. La kosmologia pruvo pri ekzisto de Dio argumentas ekziston de Dio el postulo, ke la kontingenta mondo havu ian absolute necesan estaĵon kiel prakaŭzon (argumentum el contingentia mundi). En individua *psikologio* oni nomas kontingenteco gradon, laŭ kiu kovras sin du psikaj signoj, kies variantsistemoj estas klasigitaj en laŭkvalitajn grupojn.

**Kontingentismo.**
Doktrino pri kontingentecoj de fenomenoj kaj kontingenteco de iliaj transformiĝoj. En la mondo estas laŭ ĝi multaj

nedifinitaĵoj, hazardaĵoj, malnecesaĵoj, la mondon oni povas transformi laŭ niaj deziroj kaj plibonigi ĝin laŭkvalite kaj laŭkvantece, sed tiuj ŝanĝoj ne rezultas ekskluzive el estintaj okazaĵoj kiel kaŭzoj. La kontingentismo preferas principon teleologian al la kaŭzeca. En la nova franca filozofio aliĝas problemo pri kontingenteco al la problemo pri libereco. (*Renouvier, Boussines, Delboeuf.)* Laŭ *Boutroux* ekzistas en la mondo krom la kaŭzeco ankaŭ kontingenteco. La naturleĝoj validas sole proksimume kaj lasas poveblon al variado, unikeco de okazado, estiĝado de novaj ekzistformoj nederiveblaj de la pli malaltaj. Laŭ *Troeltsch* estas problemo pri kontingenteco demando pri rilato inter racionalo kaj neracionalo, inter realo kaj ideo,inter kreo kaj eterneco (do neceseco) de la mondo.

**Korolario** *a. corollary, č. korolar, f. corollaire, g. Corollar.*
Propozicio, kiu deriviĝas de la alia senpere, per logikaj leĝoj. Alia termino: formala konsekvenco. Kontraŭo: *Teoremo.*

**Kriterio** *a. criterion, č. kriterium, f. criterium, g. Kriterium.*
Signo de nocio aŭ ideo, kiu povebligas distingi ĝin de la alia. Kriterion de la vero klopodis trovi jam la stoikuloj. Laŭ skeptikuloj ĝi absolute ne ekzistas. La "instruo pri kriterioj" esploras, kiuj empiriaj signoj posedas valoron de senriproĉaj noetikaj kriterioj.

**Kritiko** *a. critique, criticism, č. kritika, f. critique, g. Kritik.*
Arto distingi laŭ sia propra juĝo falson kaj ĝuston, valoron kaj senvaloron, ekzameni ian faron laŭ raciaj normoj aŭ laŭ estetikaj postuloj aŭ laŭ celata efiko. *Kritika spirito* estas nomata tiu, kiu ne akceptas iun aserton sen informo pri ĝia valoro aŭ koncerne ĝian enhavon aŭ koncerne ĝian originon.

**Laceco** *a. fatique, č. únava, f. fatique, g. Ermŭdung.*
Mensa stato sekvanta daŭran kaj intensan psikan aktivecon. Estas konstateblaj diversaj gradoj de laceco kaj ĝia diversgrada apero ĉe diversaj psikaj funkcioj. Gradon de laceco oni sukcese provas mezuri. La mezurado konsistas en observado de serio de sinsekvantaj kazoj, kiuj ĉiam vidigas daŭran malgrandiĝadon de precizeco en perceptado kaj en facileco de juĝado. Tio estas konstatebla laŭ malfortiĝo de atentemo, malgrandiĝo de kapablo reprodukti, elstareco de certaj organismaj sencacoj en la konscio. Laceco estas konstatebla ankaŭ sur nervaro, kie ĉeloj post troa streĉado ŝanĝiĝas laŭ siaj grandeco kaj histologia aspekto. Ekz. nukleolo en la nukleo komence grandiĝas kaj poste malgrandiĝas.

**Lernado** *a. learning, č. učení se, učenie sa, f. etude, g. Lernen.*
Por trovi taŭgecon de metodoj por instruado E. L. *Thorndike* studis ĝis nun en plej granda amplekso kaj profundeco, kiel lernas animaloj kaj homoj kaj venis al kelkaj ĝeneralaj konkludoj, kiujn li nomas principoj de lernado. Estas sume kvin: l. *Principo de multobla respondo*, alie dirite de diversmaniera reakcio, diras, ke je la sama ekstera situacio reakcias animalo diversmaniere. Tiu principo validas en 90% da ĉia lernado animala kaj homa. 2. *Principo de inklino (determiniteco) de la lernanto* diras, ke ĉiu lernado estas kondiĉata per adaptiteco de la menso de la lernanto en la donita tempo. 3. *Principo de parta aktiveco* diras, ke unu aŭ alia parto de la situacio povas fariĝi decida por reakcio; tiu principo estas tre grava precipe por lernado homa. 4. *Principo de asimilo* (alie dirite *analogio*) diras, ke animalo respondas je situacio malhavanta stimuligon per reakcio kunigita kun

situacio simila. 5. *Principo de asociigo* diras, ke se ni asocie kunigas kun iu stimulo, je kiu la animalo reakcias certa-maniere, alian stimulon, sufiĉas post certa tempo tiu dua stimulo por elvoki la originan reakcion. Tiuj ĉi principoj estas bazo de ĉiu lernado, sen ili ne estas laŭ *Thorndike* eble kompreni procedon de lernado ĉe homo. En la homa lernado oni trovas kvar elementojn: estigo de kunigoj de la ĝenerale animala tipo; estigo de kunigoj, en kiuj partoprenas ideoj; analizado aŭ abatraktado; selektiva pensado aŭ juĝado. La plej simpla maniero lerni estas estigado de kunigoj; ĝi estas la sola en la plej juna aĝo.

**Letargio** *a. lethargy, č. letargie,* letargia, *f. léthargie,*g. Lethargie.
Patologia stato de psika pasiveco, precipe dormosimila stato dum hipnoto.

**Libido** (latina).

Origine: seksa deziro. En psikoanalizo ricevis ĝi centran intereson. Sed jam ĉe *Sigmund Freud* kaj precipe ĉe liaj disĉiploj plivastiĝis ĝia enhavo tiom, ke ĝi kvazaŭ egalvaloras kun ideo de "psika energio". (*C. G. Jung*, Transformoj kaj simboloj de la libido,1925.)

**Logikismo** *a. logicism, č. logicizmus, f. logicisme, g. Logicismus.*
Tendenco fari logikon bazo aŭ principo de la tuta filozofio. Baldwin karakterizas per tiu ĉi termino filozofion *de Hegel, ne* tute trafe, ĉar rezonado Hegela ne estas logiko en ĝenerala senco de la vorto. J. E. *Erdman* nomigis Hegelan filozofion *panlogismo*, ĉar "ĝi starigis kiel ekzistanta sole la racion; ĉion neracian ĝi signas kiel nedaŭran, kun ekzisto sin mem nuliganta." La nomon panlogismo uzas ankaŭ *Couturat* per

metafiziko de *Leibnitz*. La signifo de la termino estas ĝenerale ne tro preciza. Speciale oni uzas ĝin por filozofio de *Edmund Husserl* (* 1859). Laŭ li estas logiko apriora, de ĉiu psikologio tute sendependa scienco, kiu laboras ekskluzive kun absoluta supertempa vero. Tiel estas l. kontraŭo de psikologismo. Ĝi povas esti rigardata ĝis certa grado sinonima kun racionalismo.

**Logiko** *a. logic, č. logika, f. logique, g. Logik.*
Filozofia scienco, kies tasko estas sistema studado de ĝeneralaj kondiĉoj de la valida rezonado; ĝia celo estus trovi idealajn leĝojn de pensado kaj lernigi arton ĝuste tiujn leĝojn apliki por serĉado kaj pruvado de la vero. La eraroj povas ĉe tio naskiĝadi el du kaŭzoj; aŭ oni rezonas per malbonaj procedoj aŭ oni rezonas pri malĝuste donitaj statoj. Tial la l. devas determini unue regulojn uzeblajn dum rezonado, due regulojn ebligantajn ĝustan konon de objektoj. La unuan problemon solvas *l. formala* (aŭ ĝenerala), la duan *l. speciala* (aŭ *aplikita, konkreta, metodologio*). Al tiuj du ĉefaj partoj oni ofte aldonas logikon *kritikan*, kiu traktas pri la vero, ĝiaj signoj kaj kriterio kaj pri eraro, ĝiaj kaŭzoj kaj malhelpiloj. L. formala estas scienco pri reguloj, kiujn devas atenti homa spirito por eviti la kontraŭdiron al si mem kaj resti konsekvenca al si mem dum siaj diversaj agadoj. Tri bazaj agoj de la spirito estas: koncepti, juĝi, rezoni. Tial ankaŭ formala logiko estas dividata je tri fakoj traktantaj: konceptaĵon, juĝon, rezonadon. L. aplikita klopodas trovi procedojn, per kiuj la homa pensado venas al laŭvera kono de realeco. Tiuj procedoj estas metodoj; tial oni nomas l. aplikitan ankaŭ metodologio. "Dum la psikologio nin instruas, kiamaniere nia pensado efektive okazas, volas la l. trovi, kiamaniere ĝi devas okazi por atingi sciencan konon; kaj dum la sciencoj ĉiu en sia propra teritorio klopodas ricevi

ĝeneralajn rezultojn, penas la logiko trovi ĝeneralajn regulojn por la metodoj de pensado uzataj por tiuj esploradoj." (W. Wundt.) Fondinto de l. kiel memstara scienco estas Aristotelo. Skolastiko tre disvolvis la formalan logikon kaj fiksis ĝiajn simbolojn kaj formuladojn. La nuntempa logiko estas tre disigita laŭ opinioj eĉ laŭ metodoj. Iuj metas kiel bazan principon de siaj esploradoj propozicion (tio estas juĝon formulitan en vorta frazo), la aliaj forigas tiun formuladon laŭ predikato en gramatikon. Kelkaj kunigas noetikon kaj la logikon en unu tuton, la aliaj volas permesi sole puran logikon kiel analogian al matematiko. Kelkaj volas nenion scii pri ago kaj aktiveco aŭ aktualeco en logiko, la aliaj volas vidi celon de l. ĝuste en konstato de uzebleco de metodoj. Iuj pensas ke l. kaj psikologio estas disigotaj pro kontraŭo inter pensa procedo kaj logika rilaio, la aliaj pensas, ke bazo de logiko kreskas el psikologia esplorado de pensaj agoj (laŭ *Riefert*).

**Maksimo** *a. maxim, č. maxima, f. maxime, g. Maxime.*
Morala principo, praktika normo, laŭ kiu la homo agas. En pli malvasta senco ĝi signifas laŭ *Kant* individuan regulon kontraŭe la ĝenerale valida morala imperativo.

**Materialismo** (= materiismo), *a. meterialism, č. materializmus, f materialisme, g. Materialismus.*
En metafiziko: Doktrinoj, laŭ kiuj materio estas la sola reale ekzistanta subsianco. Ĉar ili el diversaj ecoj de la materio rigardas ne la saman kiel la esencan, estas diversaj maieriismoj, sed ĉiuj kredas, ke maierio estas perceptata kiel aro de objektoj disaj, imageblaj, transigeblaj, el kiuj ĉiu okupas fiksan parton de la spaco. Spirito, spiriteco, spite sian diferencecon, dependas de la materio estante ĝia kvalito, stato, efikaĵo, kreitaĵo, funkcio, plej delikata speco. La antikvaj materialistoj (*Demokrito*, *Epikuro)* estis dualismaj supozante,

ke ekzistas du specoj de materio, pli delikata por fenomenoj psikaj kaj pli maldelikata por fenomenoj korpaj. La modernaj (*Hobbes, Lamettrie, Vogt, Moleschott, Büchner*) estas monismaj supozante, ke ekzistas sole unu speco de materio. Manieroj per kiuj m. klarigas estigon de fenomenoj psikaj el la materiaj estas klasigeblaj en kvar grupojn: Atribua formo, laŭ kiu la psiko estas eco de materio; kaŭzeca formo, laŭ kiu maierio estas kaŭzo de psikaj fenomenoj; formo egaleca rigardas la psikaĵojn kiel samspecaj kaj egalvaloraj kun la materiaj; epifenomena formo, kiu rigardas la psikaĵojn kiel enestantajn en la materiaj procedoj sed tiel, ke la psikaĵoj okazas kaj ekzistas estante la "esenco" de la procedoj materiaj, estas sole en ili eblaj kaj sen ili neniiĝas. En psikologio: Doktrino, ke la solaj science esploreblaj fenomenaĵoj estas tiuj fenomenaĵoj, kiuj havas substraton materian kaj ke sekve oni povas esplori fenomenaĵojn de konscio sole tiamaniere, ke oni serĉas iliajn rilatojn kun la fenomenoj fiziologiaj, ekz. nervaj, organaj kaj simile. - *En etiko:* Praktika instruo, laŭ kiu fundamentaj interesoj de la homa vivo estas sano, riĉeco, bonfarto, plezuro, kiuj estas la solaj instigiloj de la homa agado. Materiismo etika ne estas senpera konsekvenco de materiismo metafizika kaj ankaŭ ne estas ĉe filozofoj ambaŭ materiismoj kunigitaj. En sociologio: Materialismo historia: Termino kreita de *Engels* por nomi doktrinon de Karl Marx, laŭ kiu ekonomiaj fenomenoj estas bazo kaj kaŭzo determinantaj ĉiujn historiajn okazaĵojn. "Ekonomia strukturo de socio estas reala bazo, sur kiu leviĝas jura kaj politika konstruitaĵo, kaj al kiu respondas fiksitaj formoj de la socia konscio. . . La produkta maniero de la materia vivo kondiĉas entute la socian, politikan kaj spiritan vivadon." (K. Marx.) - Materialisto, partiano de la materialismo. Materiulo, homo aganta laŭ devizoj de la etika materialismo.

**Materio** *a. matter, e. hmota, f. matičre, g. Materie.*
En la natursciencoj (fiziko, kemio, biologio) substrato de ĉiuj fenomenoj percepteblaj per sensoj, ilia plej universala nocio, kiu kunigas la kvalitojn komunajn al ĉiuj fenomenaĵoj. Tiuj komunaj kvalitoj estas: pezo, inerteco, netraigebleco; la pezo estas el ĉiuj fenomenoj plej precize mezurebla. Kvanto de la materio estas mezurata laŭ ĝia efiko statika (tio estas laŭ ĝia pezo) aŭ laŭ ĝia efiko dinamika (tio estas laŭ akcelo, kiun difinita forto donas al la mezurata materio). Mezurado statika kaj dinamika donas egalajn rezultojn: pezeco kaj inerteco de la materio estas proporciaj. Kvanto de materio restas ĉe ĉiuj reakcioj senŝanĝa, la kvalitoj de la reakciantaj ŝtofoj ŝanĝu kiom ajn, la sumo de pezoj de la reakciantaj ŝtofoj antaŭ la reakcio kaj post la reakcio restas la sama. (Leĝo pri konservo de materio, Lomonosov, 1750, Lavoisier, 1777). Laŭ sia formo la materio estas malkontinua, konsistanta el malgrandaj eretoj nomataj molekuloj, kiuj konsistas el nemultaj atomoj, ne plu divideblaj; do la materio ne estas dividebla senfine. Atomoj kaj molekuloj estis en j. 1804 hipotezitaj de Dalton. En j. 1918 iliaj pezoj kaj grandoj estis mezuritaj de Perin kun tioma precizeco, ke ilia ekzisto estas tiom certa, kiom ekzistoj kaj dimensioj de ĉielaj korpoj. La malplej peza inter ĉiuj atomoj, atomo de hidrogeno, pezas $1.47x10^{-24}$ gramojn kaj havas volumenajn dimensiojn da $10^{-8}$ cm. Laboroj komencitaj de Rutherford kaj Soddy finis en starigo de hipotezo, ke la atomoj estas kunmetitaj de elektronoj; elektrono pezas dumilonon da hidrogena atomo. El tio sekvas, ke en realo la korpoj enhavas tre malmulte da materio pleniganta spacon; homa korpo konsistus, se ni eliminus ĉiun neplenigitan spacon kaj kunigus ĉiujn ĝiajn elektronojn kaj protonojn en unu tutaĵon, sole el ero da materio malfacile videbla per grandiga vitro. - En *psikologio* la materio signifas la substraton de ĉiuj fenomenoj korpaj, kontraŭmetitan al fenomenoj animaj. Ĉia

dualisma psikologio diferencigas laŭ povebleco plej subtile inter fenomenaĵoj korpaj (okazantaj per ŝanĝoj en stato de materio) kaj inter fenomenaĵoj animaj (okazantaj per ŝanĝoj en stato de konscio). Laŭ senco Aristotela kaj skolastika materio estas ĉio korpa aŭ mensa, kio estas donita al ia aktiveco por plua prilaboro. En tiu senco materio estas ĉiam kontraŭmetaia al formo.

**Mediumo** *č. medium:, f. medium, g. Medium.*
En spiritismo persono, kiu peras kontakton inter la mortintoj kaj la vivantaj partoprenantoj de la "kunsido", aŭ kiu posedas potencon aperigi la ceterajn spiritismajn fenomenojn, ekz. ektoplasmon, telekinezon k. a.

**Meliorismo** *a. meliorism, č. meliorizmus, f. méliorisme, g. Meliorismus.*
Konvinko, ke estas eble plibonigi staton de la mondo; pli humoro ol parto de doktrino; tial estas ĝia amplekso kaj enhavo ne tute precizaj kaj ne unusencaj. Pragmatistoj kaj instrumentalistoj uzas ĝin kiel termino, sed ne tro ofte. W. James parolas pri meliorismo kiel pri mezo inter optimismo kaj pesimismo, kiu rilatante religion "supozas pri savo nek necesecon nek neeblecon." Simile *ĉe Ward* kaj *J. Dewey* signifas meliorismo konvinkon, ke estas eble plibonigi mizeron de la homa vivo precipe koncerne ĝian socian flankon. Ĝi estas "konvinko, ke specifaj kondiĉoj daŭrantaj en unu momento, estu ili relative malbonaj aŭ relative bonaj, estas ĉiel kaj ĉial ŝanĝeblaj." Ofte ĝi signifas simplan konvinkon pri "ebleco regi la homajn aferojn per la homoj mem" (Dewey). E. L. *Tborndike* provis "pruvi, ke konduto de la homaj estaĵoj transformigas la mondon al pli bona por ili mem kaj por la homoj estontaj." Se la transformiĝo al pli bona stato estis pli frue eksplikata per la libera volo, Thorndikea

meliorismo klopodas derivi, simile kiel determinismo, ĉiujn plibonigojn de la mondo el regulecoj de la vivo mem kaj el la konduto ĝenerale: "Dum konduto de speco funkcias de komenco ĝis fino, ĝi efikas transformiĝon de la mondo en pli bonan por utilo de la speco kiel tuto. . . Meliorismo estas funkcio ne de ia mistika certaĵo, volo, sed simple funkcio de inteligenteco." Ideo de meliorismo enhavas en si krom elemento socia gravan elementon de nereligieco, de scienceco, fidon al evolucio. - Iuj etikistoj uzas pro tio la terminon de m. en pli malpli malŝatiga senco. Kontraŭo: optimismo, pesimismo.

**Menso** *a. mind, č. mysl, f. intelligence, esprit, g. Gemüf.*
Ĝenerala nomo por ĉiuj psikaj kapabloj de la homo. Ofte oni parolas en psikologio pri strukturo de la menso. La plej malnova metodo priskribi tiun strukturon estis supozado de animaj fakultatoj; ĉiu el la mensaj funkcioj tiam distingataj estis aligita al fakultato kun la sama nomo; estis fakultatoj percepta, koncepta, imaga, juĝa, rezona, vola, memora; tiu ĉi estis kun la ceteraj fakultatoj kunigita per mistera maniero. Alia metodo klarigadis strukturon de la menso kiel aregon de imagoj estiĝintaj el perceptaĵoj kaj ekzistantaj sub sojlo de la konscio diversmaniere asociiĝintaj kaj enirantaj en konscion laŭ la asociaj leĝoj. Tria metodo koncepti la mensan strukturon estis ĝia identigado kun strukturo de la nerva sistemo; ĝi supozis, ke ĉiu sensaco estas ligita kun ia ero de nerva sistemo. La kvara metodo, en la samtempa psikologio la plej ŝatata, estas, ke la menso konsistas el mensaj (psikaj) adaptiĝoj, kiuj naskiĝis per ekzercado kaj alkutimiĝado de la menso dum pensado. Tasko de psikologio estus trovadi, konservadi, disvolvadi kaj utiligadi tiujn adaptiĝojn, el kiuj konsistas la menso.

**Metafiziko** *a. metaphysics, č. metafyzika, f. metaphysique, g. Metaphysik*

(origine el la greka: ta meta ta fysika, libroj metitaj en kolekto de verkaro de Aristotelo post la libroj traktantaj pri la fiziko; nur pli poste signifas la vorto tion, kio superas la naturon aŭ la sensan sperton, ekz. *ĉe Heremius).*

Parto de la filozofio, kiu esploras la principojn de ekzisto kaj okazado kaj penas liveri sisteman kaj kompletan klarigon de ĉio, kio estas kaj okazas. Fina ĝia celo estas konceptado unueca kaj harmonia de la tuta universo. La plej baza kondiĉo por entrepreno de metafizikaj meditadoj estas ia kredo, ke sub la fenomenaro de tiu ĉi mondo ekzistas ia reala fundamento, ia principo posedanta ontologian, ne ŝajnan, ekziston. Metodoj de m. eliras el du bazoj. La unua volas finkoni la lastajn principojn de la efektiva vero per intuicio, per ia mirakla kompreno de rilatoj objektaj kaj subjektaj, kiu en ia momento plenigita per transcenda Dia graco donas koncepton pri absoluta vero per maniero diferenca de la racia meditado. La dua volas procedi per la samaj metodoj kiel la sciencoj, kunigadi la plej ĝeneralajn ideojn kaj nociojn sciencajn (ekz. forto, kaŭzo, materio, psiko) kaj la plej ĝeneralajn leĝojn logikajn por indukti el ili la plej altajn leĝojn pri la universo. M. uzanta ekskluzive la intuician metodon venas ofte al mistikismo, tiu uzanta ekskluzive la duan metodon nomas sin ofte m. kritikisma kaj malakceptas tute la intuicion; ĝi venas ofte kiel al la lasta konsekvenco al neo de si mem. Ĉefaj problemoj metafizikaj estas: 1. Demando pri ĝenerala esenco de ekzistantaro; respondas al ĝi: materialismo, spiritualismo (idealismo), filozofio pri identeco (monismo), dualismo, fenomenismo. 2. Demando pri nombro de ekzistaj principoj; respondas al ĝi singularismo kaj pluralismo (atomismo, monadismo. ) 3. Demando pri ekzisto de Dio kaj ĝia rilato al la mondo; respondas al ĝi teismo, panteismo, ateismo. Sed la

plej ĉefa problemo estas, ĉu m. entute ĝenerale estas ebla. Ĉu la homo povas akiri ian certan scion pri absoluta bazo de la fenomenaro? Jese respondis tiun demandon *Demokrito, Platono, Aristotelo, Augustino, Anselmo, Tomaso el Akvino, Giordano Bruno, Descartes* (dualismo), *Spinoza* (panteismo), *Leibniz* (monadoj), *Holbach* (materialismo.) Oni dividas ordinare metafizikon je: 1. m. ĝenerala aŭ ontologio, scienco pri universalaj nocioj, pri principoj konsistigantaj la eston, pri la plej ĝeneralaj universalaj kondiĉoj de ĉia realeco. Tiaj ideoj estas: vero, bono, belo, kaŭzo, celo, substanco, akcidenco, kontingenteco, neceso, fina kaj senfina, relativa kaj absoluta. 2. M. speciala; ĝi ne pritraktas jam eston sole kiel esto sed laŭ ĝiaj tri formoj kiel esto materia i. e. korpoj, esto spirita i. e. animo, esto absoluta t. e. Dio; ĝi enhavas tial tri grandajn partojn: kosmologion, psikologion, racian teologion.

**Moduso** *a. mode, mood, č. modus, f. mode (masc.), g. Modus.* Ĉia difino de iu aĵo por ia teknika uzo. Maniero, per kiu vidigas sin esto aŭ okazado. Descartes difinas iom neprecize: "Kiam mi diras ĉi tie maniero aŭ moduso, ni ne intencas diri ion alian ol kion mi aliloke nomas atributo aŭ kvalito. Sed kiam mi konsideras, ke substanco estas en koncerna stato alimaniere diversigita, mi uzas prefere la nomon moduso aŭ maniero kaj kiam pro tiu ĉi ŝanĝado ĝi povas esti tiel nomata, mi nomas kvalito la diversajn manierojn, pro kiuj ĝi estas tiel nomata; finfine kiam mi pensas pli ĝenerale, ke tiuj modusoj enestas en la substanco ne konsiderante ilin alimaniere ol kiel dependantaj de tiu substanco, mi nomas ilin atributoj. Kaj ĉar mi ne rajtas koncepti en Dio iun variadon aŭ ŝanĝadon, mi ne diras, ke en li enestas modusoj aŭ kvalitoj, sed mi preferas diri atributoj." El tiu signifo rezultas uzo de tiu termino ĉe Spinoza, por kiu modusoj estas izolaj aĵoj aŭ ideoj, do fenomenoj, en kiuj sin la substanco aperigas. "Kiel moduso mi

komprenas afekciaĵojn de la substanco aŭ se estas io alia, per kio ĝi ankaŭ estas konceptata." Ekz. ideo de justeco, rememoro pri ama aventuro, peceto de granito estas diversaj modusoj de la sama substanco. M. tiel difinata kontraŭas al atributo. - En *logiko:* formoj, kiujn povas havi silogismo koncerne kvaliion kaj kvantecon de siaj propozicioj.

**Molekulo** *a. molecule, č. molekula, f. molécule, g. Molekule.* La plej malgranda parteto, je kiu oni povas dividi ŝtofon fizike t. e. neŝanĝante ĝian kvalitaron kemian; ekz. per solvado, vaporigado k. a. La molekuloj persistas el atomoj. Eĉ molekuloj de kemiaj elementoj estas pluratomaj, plej ofte duatomaj. La absolutaj pezoj kaj dimensioj de molekuloj estas konataj. V. Materio.

**Monismo** *a. monism, č. monizmus, f. monisme, g. Monismus.* Filozofia vidpunkto, kiu reduktas la diversecon de ĉiuj korpaj kaj animaj fenomenoj je unu baza principo, supozas aŭ akceptas sole unu specon de realo (aŭ materian aŭ spiritan) aŭ akceptas materion kaj psikon kiel esence diferencajn sed egale valorantajn aperaĵojn, atributojn, flankojn de la sama realo. Se oni deklaras pri realo, ke ĝi estas nekonebla, ni parolas pri m. *agnostikisma.* Se estas akcentata plena paraleleco inter la reakcioj materiaj kaj psikaj sen ia ajn reciproka afekciado, oni parolas pri m. *paralelisma.* Se oni supozas kiel tiun unusolan realon la senkonscion, ni parolas pri m. senkonsciisma. Ankaŭ filozofio de identeco estas monisma. La terminon kreis Ch. Wolff (1673-1754). Kontraŭo: pluralismo, dualismo. La nuntempa m. estas materialisma aŭ energiisma, ĉar ĝi vidas la unuecan substancon aŭ en materio aŭ en energio. Precipe Ernst Haeckel kaj W. Ostwald provis popularigi la energiisman monismon kiel religian konvinkon anstataŭontan

la popolan religion. Monista Ligo (Monisten-Bund) estis fondita 1906. Ĝia celo estas "klopodi por libera, laika klerigo, kiu ne bazas sur dogmo sed sur (nedogme komprenata) scienco, kiu havas siajn celojn ne en la supernatura mondo sed sur tiu ĉi tero, la mondon ne neas askete, sed volas ĝin harmonie disvolvi." Por tiu ĉi celo m. estas pli elirpunkto kaj komuna bazo ol metafizika sistemo. Same la angla revuo The Monist propagandas ĉiujn doktrinojn iel ajn monismajn. Celo de monisma movado estas apliki monismajn dokirinojn por starigo de etikaj normoj. Certe estas grandn morala valoro en firma tendenco ĉiam kaj en ĉiu situacio pensi kaj rezoni klare laŭ sciencaj principoj, neniam malatenti la faktojn kaj fiksi siajn celojn laŭ la plej klara kono pri tio, kio ekzistas kaj kio povas ekzisti.

**Moralo** *a. morality, č. mravnost, f morale, g. Sitte, Sitten, Sittlichkeit.*
Aro de reguloj pri ĝusta vivmaniero, kiel ili rezultis el evoluo de homa socio, subjektivaj kaj objektivaj, kiuj validas aŭ subjektive aŭ objektive. "Ĉiu popolo havas sian moralon, kiu estis fiksita per kondiĉoj, sub kiuj ĝi vivis. Oni ne povas subigi ĝin al iu alia moralo, kiom ajn alta, sen meti tiun popolon en malordon." (Durkheim.) "Ekspliki la malbonon estus absurda kaj metafiziko ne rajtas ekspliki tion, kion moralo kondamnas." (*J. Lachelier*).

**Nihilismo** *a. nihilism, č. nihilizmus, f. nihilisme, g. Nihilismus.*
En noetiko doktrino, laŭ kiu ne ekzistas ia ajn ebleco koni ian universalan, firman veron. En metafiziko neado de ĉiu realeeo de la ekstera mondo, de la multeco de la aĵoj. Rusa nihilismo estas nomo, kiun donadis al si rusaj progresemaj kaj revoluciaj politikistoj. Unuan fojon uzis tiun nomon Turgenev en la romano Patroj kaj infanoj (1862). Ĝi signifis pesimisman individualisman kaj naturalisman kritikon de la socia organizo,

kaj pravigadis rnalaprobon de ĉia devigado socia koncerne individuon. Parto de tiu grupo fariĝis pli poste terorista, sed oni ankaŭ tiam nomis ĝin nihilistoj.

**Nimfomanio** *a. nymphomania, č. nymfomanie, nymfomania, f. nymphomanie, g. Nymphomanie.*
Malsaneca nesubpremebla seksa deziro ĉe virino. Ĉe viro estas nomata *Satiriazo*. Ĝi aperas kiel simptomo ĉe diversaj psikaj malordoj, sed precipe kiel akuta manio, estante iam komenca simptomo de tia malordo. Nimfomanio koncernas precipe malsanan pasion por seksa kuniĝo. Erotomanio koncernas eksterordinaran konceniriĝon de la menso al amo kaj amindumado.

**Nocio** *a. notion, č. pojem, f. notion, g. Begriff.*
Baza ideo de la formala logiko: ideo posedanta ĉiujn signojn bezonajn por esti bone priskribata kaj ekskluzive tiujn ĉi signojn. Alivorte: ideo difinita laŭ logikaj reguloj. Komparata kun la ideo aŭ imagaĵo la nocio estas artefarita, dum la imagaĵo estas natura fakto. Ju malpli da signoj posedas la nocio, despli ĝenerala ĝi estas; ju pli da signoj ĝi posedas, despli ĝi estas speciala; unikaj (konsciate) nocioj ne diferencas de unikaj imagaĵoj. Oni nomas *enhavo* de nocio tuton de ĝiaj signoj kaj *amplekso* de nocio la tuton de nocioj malpli ĝeneralaj al ĝi subordigitaj kaj de ĝi entenataj. Sekve ju malpli granda estas la enhavo, despli granda estas la amplekso de la nocio kaj inverse. Ekz. "Pura kemia ŝtofo" estas nocio tre ĝenerala; ĝiaj signoj estas: ĉiuj universalaj fizikaj signoj de la materio kaj krom ili nur, ke pri ĝiaj komponantoj validas la leĝo pri konstantaj kaj oblaj proporcioj laŭpezaj. Do enhavo tre malvasta; kontraŭe ĝia amplekso estas ĉiuj ĥemiaj ŝtofoj jam preparitaj kaj ankoraŭ preparotaj. Oni distingas ankaŭ inter nocioj konkretaj, kiuj estas imageblaj, ekz. "diamanto",

kaj abstraktaj ekz. "justeco." El la konkretaj estas per plua abstraktado derivataj nocioj genraj ekz.: "juvelŝtono." - La estiĝon de la nocioj klarigas logikistaj skoloj diversmaniere. Oni diferencigas tiurilate nociojn apriorajn aŭ purajn i. e. tiujn, kiuj ne devenas el la sperto, kaj nociojn aposteriorajn aŭ empiriajn, kiuj estas entenataj en diversaj unuopaj objektoj povante esti devenigataj de ili. Ekz. nocio de vertebrulo estas entenata en la nocioj de ĉiuj klasoj de la animaloj havantaj vertebrojn. Laŭ empiriismo ne ekzistas nocioj aprioraj. Laŭ apriorismo la unusolaj efektivaj nocioj estas la aprioraj; ĉiu aposteriora nocio bazus sole sur simileco ne sur identeco.

**Nominalismo** *a. nominalism, č. nominalizmus, f. nominalisme, g. Nominalismus.*
Mezepoka nomo por doktrino, ke ĝeneralaj ideoj, "universalaĵoj" (universalia) ne posedas ian ajn realan ekziston estante ekskluzive nomoj genraj, nuraj ĝeneralaj signoj de la realaj opaj aĵoj. Unua nominalisto mezepoka estis Johano Roscellinus el Compiegne (1050-1120). Kontraŭa doktrino estis tiam nomigita *realismo*; laŭ ĝi la ĝeneralaj ideoj efektive ekzistas, estas realaj, ili ja ekzistis eĉ antaŭ la opaj aĵoj. (Vilhelmo el Champaus, 1070-1121, Anselmo el Canterbury, 1033-1109). Laŭ nominalismo do ekzistas reale ekz. ĉiu unuopa ĉevalo, pri kiu ni spertas; laŭ realismo tiuj de ni spertataj ĉevaloj ne ekzistas reale; kio reale ekzistas antaŭ, en kaj post tiuj opaj ĉevaloj, tio estas ia ĉevaleco, ideo de genro-ĉevalo. N. estis kondamnita pro religiaj argumentoj en Soisson 1092. En 14-a jarcento renoviĝis la disputo pri universalaĵoj, kiam Vilhelmo el Occam (1270-1347) restarigis per ekstreme efika kaj trapenetra dialektiko la nominalismajn tezojn; ĉiun konon li derivas el sperto (ekstera kaj interna). Nominalismo iom post iom forigadis la realisman konceptadon; ĝi signifis

kritikismon kontraŭ la ontologia metodo mezepoka kaj ebligis al filozofado ekiron al pli libera pensado.

**Normo** *a. norm, č. norma, f. norme, g. Norm.*
Principa regulo, kiu regas niajn pensadon, sentadon kaj voladon, se ili estas atingontaj ian specialan celon. Normo por pensado estas vero; por sentado belo; por volado bono: Oni povas do diri pri tiuj ĉi konceptaĵoj, ke ili estas normigaj (normative, *normativní)* principoj kaj ke ili respondas al la tri filozofiaj sciencoj: logiko, estetiko, etiko. Tiujn filozofiajn sciencojn oni ofte nomas *normecaj* diferencigante ilin de la natursciencoj, kiuj estas kaŭzecaj. La kaŭzecaj sciencoj esploras la mondon, kia ĝi estas, trovante la leĝojn ĝin regantajn, dum tiuj tri filozofiaj sciencoj intencas trovi, kia la mondo devas esti. Laŭ tiu vidmaniero la normo estas celo metita anstataŭ la leĝo. La normo estas mezurilo por valoroj. Deveno de normoj povas verŝajne esti sole ĝenerala interkonsento. La normecaj sciencoj, pli bone dirite, geniaj homoj, elpensas ilin kaj starigas ilin montrante konvinke ilian uzeblecon por atingo de celoj ĝenerale volataj kaj aprobataj. Tial oni iam diras, ke la sciencoj normecaj ne estas sciencoj, ĉar scienco ne devas starigi la normojn sed sole observi kaj ekspliki iajn rilatojn. Oni ankaŭ provas anstataŭi la logikon, estetikon kaj etikon normecajn per "eksperimentaj." Nune daŭre estas pligraviĝanta la opinio, ke ankaŭ la leĝoj de la natursciencoj ne estas realaj faktoj, sed konvenciaj elpensaĵoj, kreitaj por difinita celo.

**Noumenon** *a. noumenon, č. noumenon, f. noumene, g. Noumenon, Ding an sich. (Greka vorto: io konata.)*
Objekto de pura pensado aŭ de racia intuo, senigita de ĉiuj sensaj elementoj. *Platono* uzas plurfoje tiun terminon en senco pensa aĵo, kompreneblaĵo. Kant uzas ĝin ĝenerale kiel

ekvivalentan por aĵo en si mem; tio estas kiel aĵo neestanta objekto de sensoj, do io, kio estas ekskluzive sole pensebla. Sed en sia dialektiko li atribuas al penso estanta super sensaj skemoj specialajn funkciojn. Ĝi unue limigas la fenomenan mondon de sensoj kaj igas nin konscii mondon kiel realon ekzistantan sub ĝi. Due ĝi donas ideon de tuteco, kiu povas, kvankam ĝi neniam estas efektivigebla, servi kiel normo ebliganta plej grandan kompletecon de sperto. Kvankam do noumenon signifas "nenion", objekton malhavantan ĉiun econ de fenomeno, ĝi povas esti grava en etiko. Ĉar praktika intelekto trovas mondon de noumen-oj, mondon de teoriaj eblaĵoj, la plej taŭga praktika realeco en konscio pri devo.

**O** En logiko simbolo de propozicio parta, nea, laŭ mnemonika versoparo. V. A.

**Objektivismo** *a. objectivism, čč. objektivizmus, f. objectivisme, g. Objektivismus.*
l. Doktrino atribuanta al niaj ideoj objektivan validecon kaj tial supozanta, ke nia penso kapablas atingi realan veron. Ĝi kontraŭas skeptikismon kaj fenomenismon. - 2. Doktrino tendencanta malatenti mensan kaj spiritan flankojn en la teorio pri realeco. 3. En etiko konvinko, ke la celo de moralo estas atingi objektivan staton de moraleco, kiu estas konstatebla pro ekzisto de objektivaj mezuriloj kaj celoj de morala agado. Kontraŭo: Subjektivismo.

**Ontologio** a. ontology, č. ontologie, ontologia, f. ontologie, g. Ontologie.
Parto de filozofio traktanta pri efektiva, absoluta, ekzisto, pri "esto kiom ĝi estas esto" (Aristotelo). Ĝi estas parto de metafiziko aŭ la metafiziko mem, se ĝi postulas ontologian ekziston de iaj substancoj. Tiam oni nomas ontologion

ĝenerala metafiziko. Oni dividas ĝin je iri fakoj: l. Pri esto studata laŭ ĝia enhavo, i. e. pri ĝia difino kaj ĝia esenca konsisto. 2. Pri divido de la nocio "esto" laŭ ĝia amplekso. 3. Pri la kaŭzoj, t. e. pri atentinda esto de diversaj estoj, kiel ili diversmaniere inflluas unu la alian.

**Optimismo** *a. optimism, č. optimizmus, f. opfimisme, g. Optimismus.*
Konvinko aŭ nura humoro, elirpunkto aŭ konsekvenco de diversaj doktrinoj etikaj aŭ metafizikaj, kiu kredigas, ke la sumo da bono kaj plezuro en la mondo superas la sumon de malbono kaj doloro. Ĝi respondas jese al demando pri pozitiva valoro de vivo kaj de la mondo. "Kio ajn estas, estas bona" (Pope). Origine ĝi estas nomo por doktrino *de Leibniz,* kiu volis pruvi per sia glora trilemo, ke la ekzistanta mondo estas la plej bona el ĉiuj eblaj mondoj. Lia pruvo estas ofte citata ekzemplo de pruvo nedirekta: Se la ekzistanta mondo ne estus la plej bona el ĉiuj eblaj, ni estus devigataj supozi, ke Dio la plej bonan mondon krei aŭ ne kapablis, aŭ ne volis, aŭ ne povis. Sed la unua supozo kontraŭas Dian ĉionsciecon, la dua lian plej altan bonecon, la tria lian ĉionpovecon. Inter modernaj metafizikoj ofte estas optimismo la suba humoro ĉe vitalismaj iam eĉ ĉe mekanismaj doktrinoj. O. bazas sur la spekulacio pli ol pesimismo kaj ne estas tiom facile refutebla, sed certe mankas ankaŭ por ĝi objektiva mezurilo por valoroj kaj kia ajn scio pri celo de la mondo. Optimismaj estis krom la *Leibniza* la filozofioj de *Platono*, stoikuloj, *Hegel.*

**Panlogismo** *a. panlogism, pallogism, č. panlogizmus, f panlogisme, g. Pnnlogismus.* Vidu: Logikismo.

**Panpsikismo** *a. panpsychism, č. panpsychizmus, f. panpsychisme, g. Panpsychismus.*

Konvinko, ke ĉia materio estas ne sole vivanta (hilozoismo), sed ke ĝi enhavas ian specon de animo analogia al individua animo homa. "Oni devas supozi, ke kiel la korpo aŭ cerbo de homa estaĵo estas videbla manifestiĝo de konscio de la homa estaĵo, ankaŭ ĉiu alia materia aperaĵo kaŝas post si iun fakton psikan, kies manifestiĝo ĝi estas kaj kiu estas pli simpla ol nia konscio, taksante tion laŭ tio, ke ankaŭ la koncerna materia fakto estas pli simpla ol nia cerbo." (*Th. Flournoy* 1904). Ĝi estas nura hipotezo, por kies pruvado mankas kiel ajn fakto.

**Panteismo** *a. pantheism, č. panteizmus, f. pantheisme, g. Pantheismus.*
Metafizika klarigo de ekzisto kaj organizo de universo per supozo, ke ĝi estas manifestiĝo de Dio, ke la mondo kaj la Dio estas la samo, ke la korpo kaj animo estas du flankoj de la sama eterna ekzistaĵo. Ĝia principo estas tre malnova. La penso, ke la mondo kaj Dio estas la samo, altrudadis sin ĉiam al ĉiuj spiritoj, kiuj konceptis la organizecon de la mondo, sed rigardis abaurda ideon, ke la mondo estis kreita. En la aniikva epoko tiaj eatis stoikuloj kaj la novplatonano Plotino. Dum renesanc-epoko eatis multaj panteismaj spiritoj, la plej brila inter ili Giordano Bruno (1548-1600). Sed la plej konsekvencan kaj vastan panteismon ellaboris *Benedikto Spinoza* (l632-1677). Tio, kio laŭvere ekzistas, estas laŭ li substanco. Substanco li nomas "tion, kio ekzistas samo per si mem kaj konsciigas sin mem al si, t. e. tion, kies nocio ne bezonas nocion de iu alia aĵo por esti konceptata." La substanco estas necesa, eterna, perfekta, senfina, kaj pro tio ankaŭ unusola, ĉar du senfinaĵoj ne povas ekzisti en la sama spaco aŭ en la sama tempo. La senfineco povas ja laŭ logiko esti sole unu. La substanco posedas sole la kvaliton de ekzisto. Ĉio, kio estas limigita kaj malnecesa (kontingenta), kio ne havas sian kaŭzon en si mem, ĉio, kion oni povas koncepti

ekskluzive per alia aĵo, pri tio oni neniam povas diri, ke ĝi efektive ekzistas; tio estas sole moduso de tiu unusola substanco. La substanco havas sennombre multajn atributojn, el kiuj ĉiu esprimas ĝian eternan kaj senfinan esencon, kaj estas nekondiĉita enhavante sian kaŭzon en si mem. Ĝi estas la Dio. Do Dio ekzistas reale, ĝi estas ekzistaĵo necesa, ĉar la neceseco devas aparteni inter kvalitojn de la senfina substanco. Sed Dio ne povas ion krei; tio kontraŭus al nocio de substanco, kiu estas la perfekta kaj senfina. La mondo materia kaj psika estas la solaj du el sennombraj atributoj, kiujn ni povas percepti. Ĉiu el tiuj du atributoj vidigas sin en diversaj modusoj, kiuj ĉiuj estas kunigitaj laŭkaŭze. Tiu ordo reganta inter fenomenoj de spaco kaj de penso estas konsekvenco de ilia komuna esenco, de la eterna, necesa Dio. Tial estas fiksaj rilatoj inter fenomenoj materiaj kaj animaj "ordo kaj rilato de konceptaĵoj estas la sama kiel ordo kaj rilato de objektoj" (*ordo et connesio idearum idem est alque ordo et connesio rerum*). La karakterizo de pensa atributo estas, ke la penso mem konsciiĝas. En ĝi do konsciiĝas Dio mem. Sed neniel komplete, sole parteto, kiu povas konsciiĝi en la homa animo laŭ leĝoj en eterna substanco eterne validantaj. La eroj de la mondo ne estas la Dio mem, sed ili partoprenas en la dieco. - La vorto p. estis uzita la unuan fojon de *Fai* 1709, antaŭ li "panteisto" de J. Toland 1705. Kp. Substanco, monismo, mistikismo.

**Pararelismo psikofizika** *a. psychophysical parallelism, č. psychofyzický paralelizmus, f. parallélIisme psycho-physique, g. psychophysischer Parallelismus.*

Hipotezo de pozitivisma psikologio, laŭ kiu al ĉiu fenomeno psika korespondas iu fenomeno fiziologia (plej ofte en la cerbo aŭ nervaro). La ambaŭ fenomenoj korespondaj ne estas reciproke kaŭzo aŭ rezulto unu de la alia, sed iras sole

"paralele." Tasko de pozitivisma psikologio estas trovi la fiziologiajn fenomenojn korespondantajn kun la psikaj. Ĉar inversa valideco de tiu hipotezo ne estas nek povas esti supozata, la termino mem ne estas tro taŭga, kvankam ĝi estas uzata de eminentaj verkistoj. - Laŭ *Spinoza* kaj *Leibniz* korespondas al ĉiu fenomeno materia iu fenomeno psika kaj inverse. Por tia hipotezo la termino p. taŭgas pli, sed nun ne estas uzata.

**Paralogismo** *a. paralogism, č. paralogizmus, f. paralogisme, g. Paralogismus.*

Erariga konkludado, al kiu oni venis sen trompiga intenco. Tial ne estas en ĝi la malŝatiga nuanco kiel en sofismo. Kant nomigas *p. de la pura racio* konkludadon, ke el unueco kaj stabileco de la konscio sekvas simpleco kaj nemortebleco de la animo.

**Parapsikologi**o č. parapsychologie, parapsychologia, f. parapsychologie, g. Parapsychologie.

Laŭ *E. Boirac* kaj *K. Oestereich* parto de psikologio esploranta fenomenojn "okultajn": telepation, spiritismon, telekineson kaj simile.

**Pasio** *a. passion, č. vášeň, f. passion, g. Leidenschaft.*

Emocio, ĉe kiu la vola elemento fariĝis tiom forta deziro, ke ĝi superas ĉiujn ideojn kaj tendencojn serĉante kaj trovante kun granda sagaceco rimedojn por plenumi la dezirataĵon ofte sen ia ajn atento pri la konsekvencoj. Tiamaniere p. malgrandigas la liberecon kaj plimalvastigas la konscion preferigante ideojn al ĝi favorajn kaj subpremante ĉion alian. Sed la efiko de la pasioj ne estas necese malbona. Kontraŭe: ilia koncentriga kaj impulsa efikoj povas ofte konduki al bona farado kaj pasio povas tiamaniere esti valora ilo. Estas korpaj kaj spiritaj

pasioj. Ĉiu deziro povas fariĝi pasio. La pli malnova psikologio ne distingis inter sentafekcio kaj pasio. Tion ekfaris nur Kant. Laŭ li pasio estas tendenco malebliganta regadon pri si mem aŭ "tendenco, kiu malhelpas al la racio kompari ĝin kun la sumo de ĉiuj tendencoj."

**Patristiko** *a. patristic philosoplsy, č. patristika, f. philosophie patristique, g. Patristik.*
Filozofio de la unuaj kristanaj pensuloj, "sanktaj patroj" kaj "sanktaj doktoroj" en la unuaj jarcentoj post Kristo. Ĝi diferencas de la filozofio mezepoka kaj moderna per tio, ke ĝi estas neniel dividita de la kristana teologio. La kristana religio estas en tiu epoko rigardais kiel la plej vera filozofio. Antikaj filozofiaj sistemoj kaj ideoj estas prenataj por defendi la religion kaj por konstrui ĝian instruon, plenigi ĝian doktrinaron. En la unua periodo (ĝis ĉirkaŭ la 200-a jaro) superas intereso defenda kontraŭ la paganismo kaj gnostikismo, en la dua periodo (200-450) superas la tendenco uzi filozofion por formuli la kristanan doktrinaron. Post la jaro 450 komencas superi tendenco, sistemigi kaj profundigi la akiritajn doktrinojn. La tiamaj verkistoj verkis latine aŭ greke. Patristiko daŭras ĝis ĉirkaŭ la 9-a jarcento. Tiam komenciĝas "antaŭskolastiko". Filozofia prilaboro de la novaj religiaj elementoj komenciĝas jam en la apostola epoko kaj ĝiaj rezultatoj estas trovataj precipe en la leteroj de s-ta Paŭlo kaj en la verkaĵoj de s-ta Johano. La apologiistoj plej proksimaj laŭtempe al la apostola epoko estas nomataj "apostolaj patroj." Ili redonas en siaj verkoj, preskaŭ ĉiam laŭokazaj, unuopajn kristanajn doktrinojn. Sed iliaj verkoj estante tre signifaj por evoluo de la religio havas por filozofio preskaŭ nulan signifon. Sed en la dua jarcento komenciĝas jam filozofie grava batalo de la apologiistoj kontraŭ du frontoj. Unue kontraŭ la paganistaj riproĉoj kaj kritikoj pri la kristanismo, due kontraŭ la

religi-filozofia spekulacio penetranta el la propraj kristanaj vicoj en la originan kredenhavon kaj difektanta ĝin sub la nomo de gnostikismo. La apologiistoj estis viroj bone edukitaj en la grekaj literaturo kaj filozofio kaj iliaj apologioj bazis sur la iliatempaj religiaj kaj etikaj ideoj. Tiel ili kunigadis la doktrinaron kristanan kun la idearo de la klera paganismo kaj klopodis akiri la superajn klasojn por kristanismo. En la instruo de Kristo ili vidis la unusole savantan filozofion, kiu bazas sur la firma fundamento de la Dia revelacio. La verko de la unua apologiisto Quadratus estas perdita escepte malgrand-an fragmenton. La plej ĉefa reprezentanto de tiu ĉi skolo estas *Flavius Justinus* (ĉirkaŭ 150 p. K.). Li kredis, ke preskaŭ ĉio el kristanismo estas en eretoj enhavita en la instruoj de antikaj filozofoj kaj en paganisma mitologio. Sed la kristanismo kunigas ĉiujn veraĵerojn en unusolan tuton. Kontraŭulo de gnostikuloj estis episkopo en Lyon *Ireneus* (mortis č. 202). En la vicon de malamikoj de gnostikuloj apartenas ankaŭ Q. F. S. *Tertullianus* (č. 160). Li estas kreinto de la latina teologia terminologio kaj signifas la unuan klasikulon de la latinlingva eklezia literaturo. El la dua epoko precipe notindaj estas F. F. *Clemens* el Aleksandrio (I50-216) kaj Origenes (185-255). Ili reprezentas gnostikon, kiu scie volas resti netuŝita de la herezo kaj konservi la universalan (katolikan) kredon. Ili ŝatas la Helenan sciencon kaj precipe la Helenan filozofion kaj volas ilin uzi por pruvi kaj disvolvi la krisianan ieologion. Unuecon inier judaismo kaj kristanismo ili volas konservi. En la kvara jarcento estis la granda temo de la kristana spekulacio la de-mando pri egala rangeco de la Filo kaj de la Patro. Arius reprezenlas la opinion, ke la Filo, la Logos, aperinta en Kristo sur la mondo, estis kreita de la patro kaj tial estas Dio kvazaŭ de dua, suba rango. Per tio elvokis Arius la reviviĝon de la origina kredo, ke Krislo estas Dio neniel subordigita kaj ke pro tio lia rilato al la Patro ne estas laŭracie klarigebla. La plej

granda reprezentanto de la skolo de Origenes en la 4-a jarcento estas Gregoro el Nyssa (331-394). Li estas la unua, kiu volas devenigi la tuton de la oriodoksa doktrinaro el la inteleklo. La plej brila genio de la tuta epoko estas Aurelius Angustinus (354-430). Kontraŭ la skeptikismo li asertas, ke la homo bezonas por sia feliĉo konon de la vero, nura esplorado kaj dubado ne sufiĉas. Fundamenton de ĉiu kono, certan kontraŭ ĉiu dubo, li trovas en konscio pri niaj sentado, perceptado, volado, pensado, entute en ĉiuj psikaj fenomenoj. El la nerefutebla ekzisto de ia vero li konkludas pri ekzisto de Dio, kiel vero en si mem.

**Pensado** *a. thinking, č. myšlení, myslenie, f. pensée, g. Denken.*
En la plej populara senco filozofia devenanta de Platono kaj Aristotelo unu el la tri bazaj kapabloj "fakultatoj" de la homa psiko: pensado, sentado, volado. En senco pli ampleksa: ĉia konsciata aŭ nekonsciata psika prilaborado de imagoj kaj ceteraj psikaĵ travivaĵoĵ. En senco malpli ampleksa: spirita laboro pri nocio, do temo de la logiko. Dividata estas pensado diversmaniere. Ekz.: nelaŭnocia kaj laŭnocia, nekonsciata kaj konsciata, nescienca kaj scienca k. s. Psikologio nomas pensado ĉiujn pli altajn funkciojn konajn kaj distingas ĝin de intua perceptado kaj de imagado. Ĉiuj pens-procedoj distingiĝas de pasivaj donitaĵoj de la intua perceptado per signo de aktiveco. Kiam tiaj aktivaj procedoj enestas en la perceptado, oni parolas pri elementaj pens-funkcioj (komparado, rilatado). Pli altajn pens-procedojn oni nomas abstrakigan kreadon de nocioj, juĝoj kaj konkludoj. La mal-nova psikologio klarigadis ĉiujn tiajn procedojn per intuaj imagaĵoj kaj ilia asociado. La nova psikologio pli akcentas la esencon de la pensado mem, kiel fenomenon ne plu deriveblan. - Ĉefaj problemoj pri p. estas: l. *Rilato inter*

*pensado kaj imagado.* Ĉe ĉiu pensado ekzistas ne-intuaj pensaj procedoj, kiuj plej ofte ne koincidas kun intuaj imagaĵoj. Imagaĵoj enhavas multe malpli ol la pensoj. Pensoj estas skemoj por imagaĵoj, ni laboras ofte per tiaj skemoj dum rapida pensado. La samaj imagaj skemoj povas esti bazoj por tre diversaj pensoj. 2. *Direkto de pensado.* La asociada psikologio supozas, ke pensado estas plej influata de la plej forta potenca asociiĝo de imagoj. Nuntempa psikologio kredas, ke ne gravas la nura asociiĝo de elementoj, sed ilia strukturo en la menso. Direkto kaj ordo de la pensado vidigas sin precipe en la produktanta pensado, i. e. en pensado servanta por plenumotaj taskoj. Tial direkton de la pensado fiksas taskoj, imagoj pri celo, faktoroj volaj. Nur se tiuj ĉi mankas, ekvalidas kunligoj asociaj. 3. *Pensado kaj lingvo.* Grava apogilo de pensado estas la lingvo. Ankaŭ silente pensante ni interne parolas. Sed ĝi ne ŝajnas ĉiam necesa. Penso enhavas pli ol ĝia lingva esprimo. Per vortoj estas esprimataj sole eroj de pensado, sed tamen la aŭdanto pensas tuton alpensante tion, kio mankas.

**Pesimismo** *a. pessimism, č. pesimizmus, f. pessimisme, g. Pessimismus.*
Konvinko, ke la sumo de malbono en la mondo superas la sumon de bono, ke estas en ĝi pli da doloro ol da plezuro, ke la homa naturo estas pro sia esenco malbona, plena de difektoj kaj neperfektecoj. La vivo ne valoras por esti vivata. Plej glora argumentado por pesimismo estas tiu de Arthur Schopenhauer (1788-1860). Li konkludas en sia fama dilemo jene: La vivo estas tiom mizera, ke ne valoras ĝin vivi. Esenco de vivo estas volado: tiu ĉi volado estas en sia fina celo aŭ neplenumebla aŭ plenumebla; se ĝi estas neplenumebla, tiam signifas esenco de la vivo daŭran doloron pro neplenumataj deziroj; se ĝi estas plenumebla tiam signifas esenco de la vivo ĝian nuligon, ĉar

plenumita deziro ĉesas esti deziro kaj kun deziro ĉesas ĉiu ajn vivo; vivo sen deziroj, sen volado ne valoras esti vivata, ĝi estus enua, sensignifa. Do en ambaŭ kazoj la vivo kondukas al doloro. Kompare kun sia kontraŭo, optimismo, estas pesimismo malpli forta spekulacie, sed bazas pli sur empirio. Ĝiaj konsekvencoj estas memmortigo kaj senedzeco. Rimarkinde estas, ke la plej famaj pesimistoj ne dokumentis sian konvinkon en sia vivmaniero per malŝato de la donacoj de la vivo, Ekz. la plej fama pesimisto Schopenhauer mem tre ŝatis siajn vivrimedojn el rentumoj kaj tre dolorigis lin nesufiĉa ŝato de lia verkaro en taksado de liaj samtempuloj.

**Percepto** *a. perception, č. vnímání, vnímanie, f. perception, g. Wahrnehmung.*
Preno de plua enhavo en la konscion. Ĝi estas kvazaŭsintezo de pluraj sensacoj, kunigado de ili en ian tuton. P. do estas psika procedo, kies rezultato estas *perceptaĵoj*. Percepti ne estas pasive lasi, ke sumiĝu sensacaĵoj; tuj dum perceptado de almenaŭ du apudaj aŭ sinsekvaj senascoj ekiĝas reflekta psika agado, kiu tuj modifate per pluraj aliaj sensacoj modifiĝas mem kaj turnas sin al aliaj sensacoj kaj tiel plu ĝis rezultas perceptaĵo; ĝi donas al ni koncepton pri la kaŭzoj de niaj sensacoj. Perceptaĵo estas rigardata kiel io havanta signifon objektan, ĉar ĝi vidigas al ni, ke kaŭzoj de sensacoj estas distingaj de nia propra persono. Perceptaĵoj liveras al ni vulgaran koncepton de la mondo. Ili ne estas klare diferencitaj. Kion ili donas al ni, estas ia bildo de realo. Fari tiun bildon pli preciza kaj trovi, kiom la bildo en diverasj partoj respondas al vera realo, tio estas tasko de la scienca pensado. Por la scienco estas la perceptaĵoj simboloj, sub kiuj ĝi serĉas veran ekziston kaj verajn rilatojn. Sed oni povas percepti ne sole la eksteran mondon, sed ankaŭ okazaĵojn internajn okazantajn en nia animo. Tia perceptado de psika okazado estas nomata *p.*

*senpera*, ĉar ĝi okazas sen perado de sensoj; malpli taŭge oni nomas ĝin ankaŭ *p. interna*. Substrato de tiu ĉi perceptado, la psiko, havas realon senperan, ne estas rigardata kiel apero de ia nekonata realo. Kompreneble dum la scienca esplorado kaj klasigado ankaŭ ĝi ne povas esti pripensata kaj pritraktata alie ol per homaj mensaj kategorioj. La antika filozofio klarigis eblon de perceptado per kvazaŭ mekanika enigo de sensacaĵoj en animon. Laŭ Aristotelo enprenas la perceptanto en sian animon la
"formon" (gr. eidon) de la perceptata objekto sen ĝia materio (gr. hylé); la povebleco de tia "similigo" enestas kaŝe en la animo kaj en la objekto ankaŭ. La moderna psikologio rigardas percepton kiel senperan rilaton inter objekto kaj ŝtato vekita de ĝi en la animo respektive en la cerbo (Vilhelmo de *Occam*, *Descartes, Loche, Kant*). Aliaj vidas en la percepto ian kaŝitan juĝon (ekzistan), ekz. Nicolaus *Cusanus*, *Maine de Biren, Spencer, Fichte, Schopenhauer, Bergson*. Laŭ Locke estas perceptado komenco de ĉia kono. Leibnitz atribuas al ĉiuj monadoj perceptojn (spegulan bildon de la ekstero) diversgrade klarajn, de la plej malklara ĝis la konscia ideo. La percepto estas esprimo de la multeco per unueco. Kant vidas en percepto "imagon kun konscio". Inter percepto kaj apercepto diferencigas precipe *Herbart* kaj *Wundt.*

**Pluralismo** *a. pluralism, č. pluralizmus, f. pluralisme, g. Pluralismus.*
Filozofia vidmaniero, laŭ kiu la universo konsistas el multaj individuaj estaĵoj, sendependaj reciproke, kiuj ne povas esti traktataj kiel aperaĵoj de ia singulara substanco, sed kiuj estas mem substancoj siaspecaj. Se ili estas sole du, temas pri dualismo. Se tiuj substancaj elementoj estas materiaj, nomiĝas tiu p. atomismo, se ili estas spiritaj, monadismo, se ili estas "realoj", realismo respektive ideal-realismo. Do p. povas esti

aŭ materialisma aŭ spiritualisma. Unua uzis la terminon verŝajne *Lotze* en sia Metafiziko (1844). Oni signas ofte per tiu ĉi termino filozofion de *Herbart ("realoj"),* kontraŭigante al ĝi filozofiojn de *Schelling* kaj *Hegel* kiel singularismajn, kaj filozofiojn de *Charles Renouvier*, de *W. James* kaj *F. C. Schiller*. Laŭ W. James en "Pluralisma universo" (1909) la realo vidigas al ni ĉiam kaj daŭre novajn flankojn tiel, ke la unueco de ĉio ekzistanta ne estas observata ĉe komenco, sed estas trovata en la fino kiel celo de estiĝado kaj okazado. Kontraŭo: Singularismo. La malfacilaĵo de p. estas analogia al tiu de singularismo: kiamaniere derivi el diversaj sendependaj estaĵoj la unuecon.

**Pozitivismo** *a. positivism, č. pozitivizmus, f. positivisme, g. Positivismus.*
Origine nomo donita al la "Pozitiva filozofio" de Auguste Comte (1798-1857), kiu pretendis esti trovinta solvon de filozofiaj problemoj en pozitivaj, t. e. sur kontroleblaj faktoj bazitaj, sciencoj, kaj forĵetis kiel nesolveblaj ĉiujn tiujn, kiuj transpasas sferon de la pozitivaj sciencoj. Ne ekzistas laŭ li aliaj veroj ol tiuj de pozitivaj sciencoj kaj la koncepto pri la universo devenas ekskluzive el sumo de tiuj sciencoj. Ĉia metafiziko estas kondamninda kaj forigenda. La homaro evoluadis el stadio teologia tra stadio metafizika en la hodiaŭan siadion pozitivisman, en kiu destinas la tutan vivon la scienco. La scienco pri la socio, sociologio, estas la plej alta sur skalo de sciencoj kaj ĝi anstataŭos la ĝistiaman filozofion. Nun oni atribuas la nomon de p. al diversaj relative tre diferencantaj filozofioj parolante ekz. pri p. angla (J. St. Mill) aŭ pri p. de *Taine,* pri p. de *T. G. Masaryk*, sed tiuj ĉiuj havas komunan tendencon eviti ĉian metafizikon kaj limigi konon je tio, kio estas donata aŭ donebla per sensoj kaj per empirio. Tiuj pozitivismoj observas fenomenojn, kiel ili aperas, kaj

serĉas leĝojn, t. e. regulecojn de sinsekvo, regulajn rilatojn de samtempo, simileco kaj postsekvo, alie dirite laŭ reĝula ligiteco de la fenomenoj, malvolante serĉi la unuajn kaŭzojn kaj la lastajn celojn de la aĵoj. Tial filozofio signifas por p. nur reorganizadon de la scienca kono; la unusolaj metodoj filozofiaj estas por ĝi la metodoj sciencaj. Pozitivismaj do estas sensualismo, empiriismo, agnostikismo, empiriokritikismo, filozofio de imanenteco. *Etika p.* observas kaj priskribas moralan vivon de la homaro en diversaj epokoj, lokoj, klasoj, gentoj, profesioj, okupoj kaj konstatas la regulojn, kiujn ĝi sekvas. Ĝi malakceptas ĝenerale validantajn aŭ absolutajn normojn. Moralajn farojn ĝi konceptas kiel historiajn kaj sociajn faktojn, kiel nurajn fenomenojn, malvolante eventuale eĉ taksi ilin.

**Pragmatikismo** v. *Pragmatismo.*

**Pragmatismo** *a. pragmatism, č. pragmatizmus, f. pragmatisme, g. Pragmatismus.*

Genra nomo por doktrinoj de samtempaj filozofoj, precipe usonaj, kiuj akcentas aktivecon kaj celecon de la homa agado. Tiu vidmaniero (ne la vorto mem) estis proponita la unuan fojon de la amerika matematikisto kaj logikisto *Ch. S. Peirce* en la artikolo "Kiel igi niajn ideojn klaraj" en Popular Scientific Montly, 1876. Ĝia kerno estas en konvinko, ke signifo de ideo aŭ de iu ajn koncepto estas en sekvoj elirantaj el tiu ero de ekzistaĵo, kiu posedas la priparolatan signifon. Tial la metodo, per kiu oni venas al klara konceptaĵo, estas primedito de diferencoj, kiuj estiĝus, se tiu ideo efektive estus vera aŭ valida. Peirce uzadis terminon pragmatismo en interparoloj por nomigi tiun ĉi opinion pri esenco de la nociaj signifoj. Post proksimume dudeko da jaroj Wiliam James proponis, ke oni uzu tiun ĉi ideon por kontrolo de signifo kaj

valoro de diversaj konceptoj specife filozofiaj. Li konkludadis, ke la kerno de ĉiu filozofia doktrino estas en specifaj diferencoj, kiuj aperus, se la koncerna ideo estus vera aŭ ne, kaj se oni ne povas trovi iajn diferencojn, estas la doktrino aŭ problemo komplete nur laŭvorta. Tiu ĉi teorio estas ekskluzive metodo por difini signifon de la nocioj. Ĝi ne estas teorio pri ilia vereco nek pri ilia rilato al realo. Pragmatismon en tiu ĉi malampleksa senco volis Peirce nomi *pragmatikismo*. W. James atentigis en sia "Psikologio" (1890) kaj en sia "Volo kredi" (1897), kiel influas intereso, elekto, sentaj faktoroj je niaj konvinkoj kaj li postulis, ke valideco de tiuj ĉi faktoroj estu rekonata dum certaj kondiĉoj. F. C. Schiller klopodis, ke logiko fariĝu pli konkreta kaj pli utila tiamaniere, ke ĝi konsentu pri tasko, kiun havas ĉe pensado sentaj kaj volaj faktoroj; tiun ĉi suban ideon li ĝeneraligis tiel, ke naskiĝis el tio teorio, ke ĉiu scio estas cela (teleologia). Tiun ĉi opinion akceptis James kiel komponanton de la pragmatisma konceptado. Ĉar en kono estas enhavitaj intereso, elekto, klopodo, estas la kono en sia esenco prova (eksperimenta) kaj ĝi estas daŭre farata. Ĉar vero estas, kiel oni ĝenerale konsentas, celo, en kiu la propra efektiva kono finiĝas, sekvas el tio, ke vero ne estas io, kio estas antaŭ niaj intelektaj agoj, sed kio iras post ili, estas de ili kreata. Ĉar vero enhavas en si rilaton de objektoj al pensado, estas logika konsekvenco el tiu ĉi farado de vero, farado de realo. Tiel pragmatismo per natura pliampleksiĝo estiĝis el nura teorio pri celeco de kono kaj el teorio pri vero naskiĝinta el kono, kiu akiris sukceson, teorio, ke realo mem estas formebla kaj ke klopodado por kono kunlaboras pri ĝia konstruado. Tiun ĉi flankon de pragmatismo nomigis Schiller *humanismo*. - John *Dewey* prenis ideon de James, ke inteligenteco aŭ kona kapablo de homo naskiĝis kaj disvolviĝis kiel ilo de adaptiĝema respondo al impulsoj. Li derivis el ĝi ideon, ke pensado aŭ meditanta

atento estas kontraŭo kaj kompletigo de alkutimiĝo. Alkutimiĝo esprimas manieron de respondo tie, kie temas pri respondoj malnovaj kaj tre konstantiĝintaj; pensado esprimas tiun manieron, per kiu oni respondas al impulsoj, kiuj estas pleje karakterizataj per noveco aŭ per iu faktoro duba aŭ timiga. Tiun ĉi pensmanieron oni ankaŭ uzis pli malpli sisteme por renovigo de la tradicia logika teorio. Oni komencis trakti logikon kiel sistemigita klarigo de pensaj procedoj dum adaptiĝado de vivantaj estaĵoj en socia medio por kontrolo de novaj kaj necertaj trajtoj de la ekzisto, kaj oni rigardis tiujn trajtojn kvazaŭ ili posedus objektivan karakteron. Laŭ la morala vidpunkto oni pliampleksigis tiun ĉi koncepton en teorio, ke moralaj normoj kaj idealoj ne estas firmaj kaj aprioraj, sed daŭre transformiĝantaj, estante kondiĉe konstruataj kaj provataj per tio, ke oni aplikas ilin por kontrolo de specifaj situacioj. Tiu ĝenerala logika kaj etika doktrino estas nomata *instrumentalismo* kaj estis ankaŭ akceptita de James.

**Preĝo** *a. prayer, č. modlitba, f. priere, g. Gebet.*
Natura esprimo de rilato inter la animo kaj Dio, laŭ sia esenco la plej religia ago, en kiu enestas la tuta Dia kulto. Oni difinas ĝin jene: Leviĝo de animo al Dio por lin adori, lin danki, peti lian pardonon. S-a Aŭgusteno: "Kiam Vi preĝas, vi interparolas kun Dio." J. Amos Comenius alte taksis signifon de la p. , la pietistoj ankoraŭ pli multe: ili vidis en p. rimedon por okupigi menson de infanoj kaj por forigi el ĝi lacecon, pekajn dezirojn kaj malbonajn pensojn. La teistoj malakceptas preĝon petantan ion de Dio. "Mi adoras Dion, sed mi nenion petas de li. Tio signifus dubi pri liaj prudenteco kaj boneco" (J. J. Rousseau).

**Premisoj** *a. premisses, č. premisy, f. premisses, g. Prämissen.*
Antaŭaj propozicioj de rezonado, el kiuj rezultas konkludo. Speciale uzata por la du antaŭaj propozicioj en silogismo: *supera* (l. maĵor) kaj *suba* (1. minor) premiso.

**Primatoj** *č. primáti, g. Primaten.*
Ordo de manuloj enhavanta duonsimiojn, simiojn, homon.

**Principo** *a. principle, č. princip, f. principe, g. Prinzip, Grund, Grundsatz.*
Unu el la plej oflaj terminoj uzataj en filozofio. - 1. Laŭ vidmaniero ontologia: Eliro aŭ kaŭzo de ago, kiom la kaŭzo estas origino de la rezultato. Ofte uzata en tiu signifo por la plej lasta kaŭzo de la ekzisto de objektoj "Estas neeble, ke Dio estu iam la celo, se li ne estas principo. . . Se estas unu sola principo de ĉio, estas do unu sola celo de ĉio; ĉio per li, kaj ĉio por li." (Pascal, Pensoj). Ankoraŭ pli ĝenerale: Kio entenas aŭ komprenigas la plej ĉefajn kvalitojn de aĵoj, ekz. "principo de ŝtato." Iam oni ankaŭ konkretigas ĝin kvazaŭ principoj estus partoj, el kiuj konsistas la aĵoj. Ekz. Lavoisier nomis principoj la kemiajn elementojn. - 2. Laŭ vidpunkto *logika*: Propozicio metita komence de dedukto; ĝi mem en la konsiderata sistemo ne deduktiĝas de iu alia propozicio estante ekster ia ajn diskuto samtempa. "Kiam iu leĝo estis sufiĉe konfirmita per la sperto. . . , oni povas meti ĝin kiel principon interkonsentante kredi, kvazaŭ tiu propozicio estus certe vera. Por tio oni procedas ĉiam sammaniere." (Poincaré, La valoro de la scienco). Pli ĝenerale oni nomas "principoj" de iu scienco ĝiajn ĉefajn propoziciojn, al kiuj ĉiu plua disvolvo devas esti submetata. En tiu senco signifas principo kaj principa tio, kio estas la plej grava, la plej unua, koncerne gravecon laŭ komuna interkonsento, kio estas la plej "fundamenta". Tre ofta en titoloj de la filozofiaj verkoj. - 3. En senco *normiga*:

Regulo aŭ normo por agado, klare montrita al la spirito, esprimita en la frazo. "Principoj de arto."

**Propedeŭtiko** *a. propaedeutics, č. propedeutika, f. propedeutique, g. Propädeutik.*
Scienco, kies studo estas necesa preparo por studo de iu alia scienco. Iam ankaŭ enkonduko en sciencon, preparo por profunda studo de iu scienco; sed tiu ĉi uzo ne estas tro internacia. *P. filozofia* signifas laŭkutime psikologion kaj logikon.

**Propozicio** *a. proposition, č. poučka, soud, súd, f. proposition, g. Lehrsatz, Urteil.*
Juĝo esprimita per vortoj, se ĝi estas objekto de logika atento aŭ esploro. Ĝi konstatas el subjekto kaj predikato kunigitaj per kunigilo (1. *copula*). Sed ambaŭ tiuj partoj estas nocioj laŭ logika vidmaniero, ne esprimoj laŭ vidmaniero gramatika; tial ili povas esti ne unuopaj vortoj sed plurvortaj esprimoj de nocio. Por ke la propozicio estu logike kiom eble plej uzebla, devus esti ambaŭ ĝiaj membroj nocioj kiom eble plej precize difinitaj. La rilaton inter subjekto kaj predikato indikas la kunigilo. Laŭ rilato de enhavoj de nocioj subjekta kaj predikata oni distingas propozicion sintezan kaj analizan. En la sinteza aldonas la predikato al la subjekto novan signon. Ekz. en p. "Kristo estas savinto de la mondo" oni diras, ke nocio Kristo (subjekto) kaj nocio "savinto de la mondo" (predikato) apartenas al si tiel, ke la predikato estas plua signo de subjekto, kies apartenon en ĝian enhavon oni asertas. En la analiza propozicio oni konstatas, ke subjekto enhavas iun signon. Ekz. en "Simio estas vertebrulo" oni el multaj signoj de simio elprenas unu por ĝin konstati. Sed la analizeco aŭ sintezeco de la propozicio ne estas absolutaj, ili dependas de la interesanto pri la propozicio. Por studanto ekz., kiu unuan

fojon aŭdas ĝin, estas la formulo $(a+b)^2 = a^2 +2ab +b^2$ propozicio sinteza, sed por matematikisto ĝi estas analiza, ĉar li bone scias, kiel la rezulto de potencigo estas enhavita en la komenca simbolo. Ambaŭ specoj de propozicioj kondukas al kreado de nocioj. Kiel tio okazas, oni klarigas ĉe juĝo, konservante tiun nomon por fakto psikologia. Por celoj de formala logiko oni enkondukis simbolan skribadon de propozicioj simbolante per S. la subjekton kaj per P la predikaton. La kunigilo estas verbo "esti". Ĝi estas laŭ la logika vidmaniero unusola verbo vidiganta per siaj diversaj formoj (ankaŭ la nea) rilaton inter la pritraktataj nocioj. Ĉiuj ceteraj verboj enhavas en sia enhavo ankaŭ atributon kaj ili per tio formas parton de predikato (logika). La verbo *esti* uzata kiel kunigilo ne signifas ekzisti, sed ekskluzive la rilaton inter la ambaŭ partoj de la propozicio. Se ĝi devas signifi ekziston, oni estas devigata konsideri ĝin atribute. Ekz.: "Dio estas" devus teksti: "Dio estas ekzistania". La rilato de subjekto kaj predikato distingiĝas laŭ kvanto kaj kvalito; el tio sekvas jena divido de propozicioj: Laŭ kvanteco ili estas ĝeneralaj kaj partaj laŭ tio, se oni metas la subjekton aŭ en ĝia plena amplekso aŭ en amplekso neprecize limigita. Ekz.: "Ĉiuj homoj estas mortontaj", "Ĉiu objekto falas sur teron" estas propozicioj ĝeneralaj. "Multaj homoj estas honestaj", "Kelkaj miaj amikoj trompis min", estas propozicioj partaj. Propozicioj singularaj apartenas al ĝeneralaj. Se mi asertas, ke "Platono estis disĉiplo de Sokrato", mi certe metas la singularan subjekton en ĝia kompleta amplekso, ĉar io alia ne eblas pro ĝia unikeco. Laŭ kvalito estas la propozicioj jesaj kaj neaj. Ekz.: "Dio estas la kreinto de la mondo" aŭ "Dio ne estas la kreinto de la mondo". Kombinante dividon laŭkvalitan kaj laŭkvantecan oni ricevas 4 specojn, kiujn la skolastikuloj simboligis per jenaj kvar vokaloj:

Propozicio *ĝenerala jesa* a

| | | | |
|---|---|---|---|
| " | " | *nea* | e |
| " | *parta* | *jesa* | i |
| " | " | *nea* | o |

Por uzo en silogismoj oni simboligis la propoziciojn jene:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| S a P | legu: | ĉiuj | S | estas | P |
| S e P | " | neniu | S | estas | P |
| S i P | " | kelkaj | S | estas | P |
| S e P | " | kelkaj | S | ne estas | P |

Simpla estas la propozicio, kiu esprimas apartenon de sole unu predikato al unu subjekto. *Kombinita* ĝi povas esti aŭ laŭ la materialo aŭ laŭ la formo. Laŭ la materialo ĝi estas kombinita, se ĝi enhavas plurajn subjektojn aŭ predikatojn. Laŭ la formo ĝi povas esti supoza, modusa kaj rilata. La supoza propozicio nek jesas nek neas absolutmaniere, sed nur kun supozo; ĝi povas esti kondiĉa, disiga kaj kuniga. La kondiĉa p. jesas aŭ neas sub kondiĉo. Ekz.: "Se vi kredos al mi, vi estos savita." P. disiga proponas elekton inter pluraj eblecoj: "La kompanio aŭ likvidos aŭ bankrotos." P. kuniga neas samtempan eblecon de pluraj nocioj: "La sama aĵo ne povas samtempe ekzisti kaj ne ekzisti." La modusaj propozicioj havas kunigilon determinitan per esprimoj de neceso, ebleco aŭ kontingenteco; estas kvar specoj da ili: *Necesa*, kies foriga kontraŭo ne estas ebla. "S necesas esti P, ĉar ĝi ne povas esti ne-P." "Dek kaj dek estas dudek." "Sumo de anguloj en triangulo estas 180°." "Ĉio reala estas ebla, sed ne inverse." *Problema*, kiu ne kontraŭas al tio, kio estas konata: "Sur iu planedo verŝajne estas loĝantoj." "Eble ie ekpluvis." *Aserta*, kiu konsentas kun la donita scio aŭ konitaĵo. "Sankta Paŭlo predikis en Ateno. " "Descartes estis en junaĝo militista oficiro." *Rilata*, kiu eldiras manieron, laŭ kiu predikato rilatas al subjekto: "Paris estas pli granda ol Praha."

**Psika** *a. psychical, č. psychický, f. psychique, g. psychisch.*
Kio koncernas fenomenojn ne-materiajn, fenomenojn de la interna mondo en la plej vasta senco. Substantive *psiko*, substrato de ĉiuj internaj fenomenoj de la interna mondo; ĝi ne entenas iajn ajn teorion aŭ aserton pri esenco de la fenomenoj, kiujn observas psikologio. En tiu senco psiko estas ideo analogia al materio, kiu same povas esti rigardata substrato de fenomenoj de ekstera mondo, de la mondo fizika. Psikologion laŭ tiu vidmaniero neniel interesas esenco de psiko, sed sole la psikaj fenomenoj analogie kiel fizikon kaj ĥemion ne interesas esenco de la materio, sed sole la fenomenoj materiaj.

**Psikoanalizo** *a. psycho-analysis, č. psychoanalýza. f. psychoanalyse, g. Psychoanalyse.*
Psikologia klinika metodo, kiu profundiĝis kaj disvastiĝis en teorion iom fantazian kaj mitan, sed tre ŝatatan kaj influan precipe pro ĝia uzebleco psikologia kaj terapia. Ĝia fondinto estas Wiena kuracisto Sigmund *Freud (** 1856). Laŭ ĝi la homa psiko estas kunmetita el du specoj de ideoj. Unuaj estas ideoj konsciaj, la duaj subkonsciaj. La ideoj konsciaj estas tiuj, kiuj kreas tutan nian konscion; ili ne estas ĉiuj samtempe konsciataj, la plej multaj el ili daŭras sub la sojlo de konscio, kaj supreniras super ĝin laŭ asociaj leĝoj dum la plej diversaj okazoj. Sed krom tiu ĉi konscia parto de la psiko ekzistas ankoraŭ ĝia dua, pli ampleksa parto, en kiu estas ideoj tute forgesitaj, kiuj povas aperi super la konscia sojlo nur dum kondiĉoj malfacile efektivigeblaj. Sed tiu subkonscio ne konsistas sole el iaj forgesitaj ideoj, kiuj kunmetus ĝin kvazaŭ aron da ideoj analogie, kiel prezentas konscion empiria psikologio. Male: la subkonscio estas tio, kio reale ekzistas. Tiel instruis Eduard Hartmann. En tiun subkonscion povas eniĝi diversaj ideoj, jen konsciataj, jen perceptataj senkonscie.

Kelkaj el ili povas esti ideoj fiksaj, kiuj inflluas idearon konscian. Infiuo de tiaj subkonsciaj ideoj (rememoroj pri pasintaj travivaĵoj aŭ aŭditaĵoj elvokintaj doloron aŭ honton) povas efiki ofte malutile je la konscio kaj kaŭzi diversajn malsanajn statojn psikajn eĉ korpajn. Laŭ Freud estas enhavo de tiuj subkonsciaj, ne tute forgesitaj, sed de la volo en subkonscio tenataj ideoj, preskaŭ ĉiam sekas. Se oni sukcesas tamaniere transigi la subprematan ideon el subkonscio en konscion, estas ĝiaj malutilaj efikoj forigataj. Por trovi ĝin Freud elpensis kaj ellaboris sian psikoanalizan metodon: longedaŭre kaj ripetate oni demandas la pacienton pri ĝiaj sekretaj deziroj kaj pekoj kaj esploras ĝiajn sonĝojn. Per pacienca analizado de respondoj kaj sonĝoj de la paciento trovas la kuracisto la subkonscian ideon kaj diras ĝin al la paciento, per kio ĉesas ĝiaj malutilaj efikoj je la konscio. Freud enkondukis sian metodon en 1894 kaj ĝi baldaŭ trovis vastan aplikon ĉe kuracado precipe de histerioj. Grave pliriĉigis ĝin psikologia skolo de Nancy precipe per esploradoj de *Bernheim, Coué, Baudouin* pri sugestio kaj aŭtosugestio. Laŭ ili ĉiu sugestiita ideo tendencas al efektiviĝo. "Sugestio aŭ aŭtosugestio estas ideo, kiu transformiĝas subkonscie en faron (pli bone dirite en realon)." Oni sukcese prilaboras sur bazo de tiu ĉi teorio metodojn por kuraci diversajn malsanojn kaj por eduki infanojn. En principo diferencas tiuj ĉi novaj metodoj de la malnovaj per tio, ke ili volas infiui la fantazion, ne la volon.

**Psikofiziko** *a. psychophysics, č. psychofyzika, f. psychophysique, g. Psychophysik.*
Scienco pri fenomenoj ĉe la limoj de psikologio kaj naturscienco. Fondis ĝin *Fechner* (1860), ĝia ĉefa konkeraĵo estas psikofizikaj leĝoj pri rilato de intensecoj de ekscitoj kaj sensacoj nomataj laŭ Weher kaj Fechner. V. Sensaco! Nune oni uzas la nomon por signi grupon de psikologiaj metodoj

provantaj mezuri elementajn faktojn psikologiajn laŭ modeloj fiziologiaj kaj pri psikofizika paralelismo. V. t.

**Psikologio** *a. psychology, č. psychologie, psychologia, f. psychologie, g. Psychologie.*
Scienco pri la psikaj fenomenoj, tio signifas pri tiaj, kiuj okazas en nia interno estante nepercepteblaj per niaj sensoj, sed perceptataj per introspekto, tio signifas senpere, sen pero de la sensoj, do sen la eblaj sensaj trompigoj. Krom tio estas objekto de p. fenomenoj alireblaj al la sensoj kaj nur al la sensoj, kiuj laŭ ŝajno aŭ laŭ sperto havas siajn kaŭzojn en la fenomenoj psikaj. Tiujn oni nomas per komuna vorto konduto. Ofte oni distingas la fenomenojn konstateblajn nur per introspekto "fenomenoj de la interna mondo aŭ psikaj" de ceteraj "fenomenoj de la ekstera mondo aŭ fizikaj." Psikaj fenomenoj estas ekz. timo, kolero, rememoro pri rozo donacita hieraŭ al mi, sopiro revidi la belulinon ĵus naĝintan preter mi en la maro, kaj similaj multaj. Fenomenoj de ekstera mondo, kiuj estas same objektoj de psikologia observo, estas ekz.: paliĝo de homo, se li ekaŭdas fortan pafon, movo, kian faros infano 2-jara ekvidante sian patrinon, kioma procento de 14-jaraj studantoj mensogos raportante pri siaj rezultoĵ dum la lasta sporta konkurado, kaj similaj multaj. La klasika p. pensas, ke temo de ĝi povas esti ekskluzive la fenomenoj internaj, la behaviorisma skolo, ke ekskluzive la eksteraj, al sensoj alireblaj, la konduto. La plejmulto de samtempaj psikologoj rigardas kiel objekto de psikologia esploro la ambaŭ sferojn de tiuj faktoj kaj oni difinas kiel centran taskon de p. priskribi normalan homan menson, specojn de ĝia disvolvo kaj evoluo kaj manierojn de ĝia aktiveco. Estas diversaj fakoj de p. laŭ la celoj kaj laŭ la metodo; la ĉefaj estas: 1. P. de normala matura homo. 2. P. de animaloj. 3. P. de infano. 4. P. individua (g. ankaŭ *differenzielle* P. ) klopodas

difini kaj laŭ ebleco eligi specialecojn de unuopaj mensoj. 5. P. de homo en nenormalaj kaj malsanaj statoj de la menso. 6. P. socia, studo de menso de homamaso kaj de ĝia influo je la individua menso. En ĉiu de tiuj ĉi fakoj oni uzas ĉiujn taŭgajn metodojn esplorajn. Estas distingeblaj la tri ĉefaj grupoj: l. Introspekto; ĝi koncernas ne sole la sinobservon de si mem, sed ankaŭ la raportojn, kiujn donas pri la propra interna sinobservo aliaj personoj. Tiu metodo estas kun sukceso uzebla en diversa amplekso en ĉiuj fakoj psikologiaj escepte psikologion de bestoj. 2. Observo kaj klarigo de konduto, t. e. korpaj agoj esprimantaj la psikajn procedojn en interno de homoj kaj bestoj. 3. Studado de objektoj kreitaj per mensa kaj korpa agado de homoj kaj bestoj por konstati, kiamaniere ili povas klarigi esencon kaj agadon de la mensoj, kiuj ilin kreadis. Birda nesto, abelujo, primitivula muziko, lingvo, moraj kutimoj, leĝara kodo, kavalira kastelo, poemo, infana desegnaĵo, esperantista klubo, rega sistemo same kiel ĉiu alia produkto de animala agado povas esti studata laŭ la psikologia vidmaniero kun ia rezuluto. Kombinado de tiuj tri specoj de metodoj estas tre utila, sed efektivigebla ĝi estas plej ofte nur dum agado iniciatita laŭplane kaj vole, tio estas ĉe psikologia eksperimento. Ofle estas bezone fari la saman eksperimenton ĉe pluraj individuoj kaj prilabori la rezultojn statistike.

**Psikologismo** *a. psychologism, č. psychologizmus, f. psychologisme, g. Psychologismus.*
l. Konvinko, ke psikologio estas bazo de ĉiu filozofio, ne sole por ĝi kiel tuteco, sed ankaŭ por ĉiuj ĝiaj faksciencoj precipe por la logiko. - 2. Iam ankaŭ instruo, ke psikologio estas la unusola scienco, ĉar "objektoj" de ĉiuj sciencoj povas esti sole perceptaĵoj aŭ bildoj de la perceptaĵoj aŭ konceptoj pri tiuj perceptaĵoj. "Psikologismo estas pretendo de la psikologio absorbi tutan filozofion aŭ fariĝi almenaŭ ĝia fundamento. . .

La psikologio fariĝis scienco pozitiva kaj eksperimente farata en laboratorioj. Ĝi estas sumige fiziologio de la nerva sistemo kaj de la perceptaj organoj. . . Sed, kvankam ĝi aranĝis sin kvazaŭ aŭtonomia scienco, ĝi konservis ambicion solvadi problemojn pure filozofiajn aŭ liveri almenaŭ elementojn kaj faktojn por ilia solvado. . . Ne estas mirige, ke konkludoj el tiuj esploradoj farataj laŭ metodoj de natursciencoj prezentas daŭre tiun duoblan karakteron empiriisman kaj evoluciisman." (Couturat, 1906). Kontraŭo: Logikismo.

**Psikotekniko** *č. psychotechnika, g. Psychotechnik.*
Uzo de psikologio, precipe de mezuraj metodoj psikologiaj, por celoj de praktika vivo; ĝi celas per mezurantaj metodoj konstati psikajn kvalitojn de homo por trovi lian taŭgecon por sociaj funkcioj. Por tiu ĉi celo ĝi devis klopodi pri fikso de homaj tipoj taŭgaj speciale por la dezirataj funkcioj, tio estas por diversaj difineblaj laboroj. La homajn tipojn kun ia sukceso fiksas la individua psikologio fondita de Stern; ĝi bazas sur kompara metodo serĉanta diferencojn ĉe psikaj fenomenoj ne tro diferencantaj, kaj tiamaniere trovanta diferencojn pli kaj pli konstantajn kaj pli kaj pli gravajn. De alia flanko oni komencis studi per statistika kaj biologia esploradoj la postulojn, kiujn diversaj profesioj faras al siaj faklaborantoj. Kunigante ambaŭ tiujn ĉefmetodojn la psikotekniko povis ellabori metodojn por trovi ekzemple, ĉu juna homo estus taŭga por lerni elektitan metion aŭ por studi elektitan fakon aŭ ĉu li estus taŭga oficisto en fako, por kiu li aspiras. Progresoj de psikotekniko ebligis fondadon de oficejoj por konsili ĉe elekto de profesio; ilia funkciado daŭranta jam ĉirkaŭ dek jarojn montras rezultojn tre kontentigajn. Metodoj psikoteknikaj estas plejparte pure empiriaj, ofte ili eĉ kontraŭstaras psikologiajn teoriojn ne povante ĝis nun esti bazo por teorioj pli bonaj kaj pli taŭgaj. Sed oni povas kun

sufiĉa fido esperi, ke psikoteknikaj rezultoj multon helpos al kreo de novaj teorioj psikologiaj.

**Racia.**
Kio rilatas la racion. Raciaj argumentoj estas tiaj, kiuj rezultas el uzo de racio, ne ekzemple de la volo aŭ sento.

**Raciismo** = racionalismo.

**Racio** *a. reason, č. rozmysl, rozum, f. raison, g. Vernunft.*
Kapablo pensi, analizi kaj sintezi perceptaĵojn, se ĝi estas turnita ne sole kiel intelekto al kono pri kaŭzoj kaj deduktataj disaj konceptaĵoj, sed al universala ligiteco de aĵoj kaj de ĉio okazanta. Difini aŭ priskribi ĝin oni provis multfoje. Platono instruas, ke racio estas konsciiĝantaj rememoroj pri eroj de reala ekzisto, kiuj ekzistas eterne en transcenda mondo. Ilia sumo estas la homa racio, kiu sin konscias, ĉar ĝi konsistas el konsciaj eroj, elementaj partoj de la efektiva esto. Tiamaniere estas solvata la nesolvebla problemo klarigi la konscion per rezonado. - Stoikuloj supozis *mond-racion*, kiu estas rigardebla kiel valideco de universalaj leĝoj en la naturo. *Descartes* kaj *Spinoza* klarigas racion kiel specifan intuon pri la metafizika esenco de la objektoj. *Kant* vidas en racio sistemon de aprioraj formoj celantan unuformigi diversecon de la perceptaĵoj. Tio estas enhavo de lia koncepto pri la pura racio: ĝi celas tutecon absolutan de sintezo en sfero de kondiĉoj; ĝi ne esploras ordon de objektoj, sed kreas por si propran ordon laŭ ideoj. "Mi komprenas tie ĉi sub racio la tutan superan kapablon koni kaj sekve mi metas la vorton racia kontraŭ empiria" (Kant en Kritiko de pura racio, 1781). - Por la plej moderna psikologio ia laŭnocia difino aŭ klarigo de racio ĉesis esti problemo, ĉar por ĝi reduktiĝis la racio je parto

de la mensa strukturo, je la parto senpere partoprenania en la konado.

**Racionala.**

Kio rezultas el efektiva aŭ pretendata scio de la reguloj deduktitaj el la ĝeneralaj principoj logikaj aŭ sciencaj aŭ kio konscie celas adaptiĝon al tiuj reguloj. Ekz.: Decido racionala estas tia, kiu kredas, ke per la decidita faro plenumiĝos leĝoj ekzistantaj en nia interno aŭ celoj fiksitaj de eterneco. Ofte pligraviĝas nuanco de la celo. Ekz. racionala klasigo estas tia, kia plej bone plenumas la intencon de tiu klasigo.

**Racionalismo** *a. rationalism, č. racionalizmus, f. rationalisme, g. Rationalismus.*

Filozofia konvinko, ke la racio, kapablo pensi, estas la sola aŭ la plej eminenta, utila kaj efika ilo por kono haviganta al ni la veron. En metafiziko ĝi signifas doktrinon, ke ĉio ekzistanta havas kaŭzon pro sia ekzisto, ke sekve ĉio ekzistanta estas per racio komprenebla. Noetike: doktrino, ke ĉiu kono devenas el nerefuteblaj, aprioraj principoj tiel, ke la kono estas ilia konsekvenco kaj ke sensoj povas doni sole neklaran kaj konfuzan bildon pri la vero. En tiu senco ĝi estas kontraŭo nl empiriismo. (*Descartes, Spinoza*, *Hegel). Kant* volis konigi racionalismon kun empiriismo instruante, ke kono empiria estas ebla nur pro ekzisto de raciaj principoj, kies sumo estas la pura racio. Jam malnova epoko estis tre racionalisma (*Demokrito*, skolo *Eleata, Sokrato, Platono, Aristotelo*). El la modernepokaj filozofoj estas ankoraŭ nepre nominda *Leibniz.* El samtempuloj tipa reprezentanto de r. estas Herman *Cohen* (1842-1918). Penso (en senco de pensata enhavo) kaj ekzisto (objekto de la pensado) estas laŭ li identaj. "Nur pensado povas produkti tion, kio eblas valori kiel esto." Ĉio metota krom la pensado kaj penseblo (ĉio transcenda) valoras sole

kiel nepenso, aĵo en si mem, iluzio. Etiko kiel instruo pri tio, kio devas esti, estas sendependa de la sperto, ĉar per la aperto oni povas sole trovi, kio estas, sed ne kio devas esti. En *religio* r. signifas ne plenan fidon al supernaturaj fontoj de la religio, skeptikon pri revelacio, ĝeneralan mankon de la ĉefaj signoj de la kredo.

**Radikalismo filozofia** *a. philosophical radicalism, č. filosofický radikalizmus, f. radicalisme philosophique, g. Philosophischer Radikalismus.*
Politika, ekonomia kaj filozofia doktrinaro de grupo de anglaj filozofoj, reprezentitaj ĉefe de *Bentham*, James *Mill,* J. S. *Mill.* Ĉefaj iliaj ideoj estas: ĉiuj formoj de liberalismo, precipe libereco komerca kaj industria; individualismo; supereco de la reprezenta rega formo; fido al la racio; utilismo etika; psikologia determinismo.

**Realismo** *a. realism, č. realizmus, f. realisme, g. Realismus.*
*Mezepoka*: kontraŭo al nominalismo, instruanta, ke realaj estas universalaĵoj, ne opaj aĵoj. Noetika: kontraŭe al noetika idealismo supozas, ke la objektoj ekkonataj de subjekto ekkonanta efektive ekzistas. La naiva r. kredas, ke la perceptata mondo ekzistas efektive tia, kia ĝi estas ekkonata. La *transcenda r.* deklaras, ke nia perceptado liveras al ni bildon de fenomenoj, kiun aperigas al ni la realo, sed tiu realo ne estas konebla pli ol kiom ebligas la perceptataj fenomenoj, ne kia ĝi estas efektive. La kritika r. opinias same kiel la transcenda, ke ekzistas objektiva realo, sed neniel volas respondi pri konebleco kaj nekonebleco de tiu realo. Nia pensado estas laŭ ĝi tiom perfekta ilo, ke ni povas per ĝi iom post iom veni al ĉiam pli perfekta kono de la realo. - Herbarta realismo v. Realo.

**Realo** *a. reality, actuality, č. skutečnost, realita, f réalite, g. Wirklichkeit, Realität.*
1. Kio efektive ekzistas, esenco de fenomenaro sendependa de niaj perceptkapablo kaj pensmaniero. Karakterizaj signoj de realo en ilia kompleteco estas realeco. La realo povas esti prezentata kiel kontinua unuaĵo, tion konjektas pri ĝi singularismo kaj monismo, aŭ kiel malkontinua konsistanta el disaj eroj, tiel konjektas pluralismo. V. Ekzisto - 2. Laŭ Johann Friedrich *Herbart* (1776-1841) estas realo nomo por elementaj estaĵoj supozataj de li, el kiuj konsistas la tuta mondo. Ili similas Leibnizajn monadojn; ĉiu realo posedas unu simplan kvaliton nedetrueblan; per reciproka kunigado, trapenetrado kaj afekciado de realoj estiĝas ĉiuj percepteblaj fenomenoj. Herbarta metafiziko estas nomata realismo aŭ idealrealismo.

**Relativeco de la kono** *a. relativity of knowledge, č. relativnost poznání, poznania, f. relativité de connaissance, g. Relativität der Erkenntnis.*
Doktrino pri relativeco de la kono konsistas el du tezoj: l. Ĉia kono estas kono de rilato. Ni povas koni neniun objekton alimaniere ol kiel ĝi rilatas al ceteraj objektoj. Koni iun ajn objekton kiel aĵon en si mem, sendependan de ĉiuj ceteraj objektoj, estas neeble. - 2. Ĉiu kono estas relativa ankaŭ rilate nian spiriton, nian konan kapablon. Ankaŭ tiurilate ni ne povas koni ian ajn objekton, kia ĝi estas en si, sendependa de niaj perceptaj kaj pensaj kapabloj, sed sole, kia ĝi aspektas antaŭ aŭ post ili. - Krom tio estas la homo en sia ekkonado limigita de spaco kaj tempo, kio signifas, ke nia kono dependas de unuopaj hazardaj okazaĵoj, okazaj cirkonstancoj, do ĝi validas nur por kaj en certaj lokoj, kaj tempoj.

**Relativismo** *a. relativism, č. relativizmus, f. relativisme, g. Relativismus.*
*Noetika*: Doktrinaro pri relativeco de la kono. Ĝi aperas en diversaj formoj kaj nomoj: Agnostikismo, Fenomenismo, Pozitivismo, Probabilismo, Skeptikismo. Sed eĉ se ni konvinkiĝas, ke nia kono estas relativa, ni ne povas nei almenaŭ ekkonon pri ekzisto de aĵoj kaj rilatoj inter la aĵoj. Malgraŭ la spaca limigo ni ekkonas tamen ion, malgraŭ la tempa limigo ni ekkonas almenaŭ eron de pasinto, ĉar ni memoras, kaj pri estonto ni povas rezonadi. Por praktika vivo la relativa kono plene sufiĉas. Ĉar al homo sufiĉas vivi en rilatoj, oni ne ofte bezonas por vivo tion, kion oni ne scias. - *Etika*: Doktrinoj, laŭ kiuj ne ekzistas ĝenerale validantaj normoj moralaj. La normoj varias laŭ la tempo, loko, medio, klaso, nacio, situacio, kulturo, civiliza grado k. s. Bono kaj malbono, morala kaj nemorala, estas relativa kaj subjektiva.

**Religio** *a. religion, č. nábo enství, nábo enstvo, f. religion, g. Religion.*
La plej simpla difino: Tuto de homaj devoj al Dio. Oni iam distingas la religion naturan, kiu determinas devojn ekskluzive laŭ intelekto kaj religion supernaturan (nomatan ankaŭ *pozitiva*), kiu bazas krom sur intelekto ankaŭ sur revelaciitaj veroj. Sed la diversa maniero kompreni Dion kaj la devon kaŭzas, ke la supre donita difino ne sufiĉas kaj ke estis el-pensataj diversaj aliaj. Laŭ *Locke* kaj *Spinoza* konsistas religio en obeo kaj amo al Dio. Laŭ *Hegel* "religio estas konsciiĝo de la absoluta spirito en iu fina (racionala) spirito en formo de ideo." Tiu ĉi difino estas produkto de vidmaniero, kiu vidas en religiaj faktoj aperaĵojn priskribeblajn laŭ psikologia maniero, versimile eĉ mezureblajn. Estas granda merito de Kant, ke li trovis taŭgan agadkampon por filozofio, nome homan racion, kaj eligis el ĝi ĉiun eksterracian mondon same la naturan kiel

la supernaturan, kaj montris la rilatojn de homo al la supernatura mondo kiel la kampon de la religio. F. E. D. *Schleiermacher* (1768-1834) poste primeditis tre profunde la faktoron de la homa animo kaj konstatis la specialecojn de religiaj fenomenoj; ili aperis al li nek kvazaŭ scio, nek kvazaŭ ago, sed kvazaŭ io multe pli interna, pli origina: mistera ektuŝo kun dieco kaj ĝiaj reflektoj en sentadojn kaj fantazion. Religio ne estas perceptata, ne estas sentata, ne estas volata, ĝi estas vivata. Tial studi religion ne signifas depost Schleiermacher esplori sole pensojn, dogmojn, morojn, kutimojn, kvankam ankaŭ tio estas grava, sed studi precipe la travivitaĵojn, kiujn piuloj ne pensis, ne faris, sed travivis. El tio sekvas, ke ne povas ekzisti ia natura religio, kiun oni derivus laŭ indukta metodo el pozitivaj religioj forigante iliajn diversecojn kaj kunigante la trovatajn komunecojn. Religia fakto estas ja en la tuto de la religia travivitaĵo kaj ĝian vivan konkretan realecon neniam povas anstataŭi ia abstrakta konceptaĵaro. Ankaŭ la arto estas io, se oni forigas de *Praksitelo, Raphael, Tizian, Giotto, Donatello, Manet, Bro ík, Štursa* ĉion individuan, diferencan, distingantan. Tial oni povas religion pli facile priskribi ol difini. Tri faktoroj kondiĉas laŭ Paul Janet religion: komisiinto de la revelacio, sanktigita libro, metafiziko kun moralo: tial ne ekzistis laŭ li ĉe antikvaj Grekoj efektiva religio; neniu homo prezentis sin nek estis akceptata kiel sanktigita kaj privilegiita peranto inter Dio kaj homo, ne ekzistis ia Zoroastro, Budao, Kristo; ankaŭ ne ekzistas sanktigitaj libroj kiel Veda, Biblio, Korano; ankaŭ mankis teologio, t. e. metafizika doktrinaro kaj etiko disvolvita de saĝa pastro kaj lokita super liberan ekzamenon de individuoj. La kompreno, ke religio estas fenomeno de individua travivaĵo, kondukis al difinoj, kiuj precipe atentis ĝian signifon por validigo de etikaj normoj. T. G. *Masaryk* difinas ĝin en la verko "Dum batalo pri religio" jene: "Religio

estas centra kaj gvidanta spirita forto de vivo, ĝi estas penado por nova vivo kaj por novaj pli altaj valoroj de la vivo." Unu el la Masarykaj disĉiploj J. Tvrdý difinas jene: "Religio signifas koncentrigon de la homaj valoroj kaj ilian objektivigon." Tiu ĉi difino bonege atentas eĉ la socian eĉ la individuan elementojn en la religio. Grava signo de ĉiu religio estas kredo. Ĝin akcentas la difino de *Dunkhein:* "Religio estas fiksa sistemo de artikoloj por kredo kaj faro rilatantaj al aferoj sanktigitaj, t. e. forigitaj, malpermesitaj. Tiuj ĉi kredartikoloj kaj faroj kunigas ĉiujn, kiuj ilin konfesas, en moralan komunon nomatan eklezio." Tiu ĉi difino ne taŭgas por budaismo, kiu ne havas sufiĉe klaran konceptaĵon de eklezio kaj en kiu la savo estas afero plene individua. La signon de Dia ekzisto atentas la difino de O. Pfordten: "Religio estas kredo je laŭorda influo inter la homo kaj ia supersensa bona spirito." - Ĉiu religio posedas etikon, kies normoj bazas sur ĝia metafiziko. La argumento por valideco de moralaj leĝoj estas en la aŭtoritato de la metafizika Dio. Tial ĉiuj religiaj etikoj estas heteronomiaj. - Pri deveno de la religio ekzistas diversaj teorioj: Diigo de herooj (eŭhemerismo). La ideoj religiaj estis ennaskitaj (nativismo). Religio estas derivita el diigitaj naturfortoj, kiujn la homo timas aŭ dankeme observas (naturismo); iam oni kunigas kun tiu ĉi hipotezo derivon de la religio el la lingvaj ŝanĝoj. Religio estis inventita de pastroj kaj politikistoj (teorio pri aŭtoritato). Religio estas utila aranĝo por facila decido pri bezona ago (pragmatismo). Kiel psikologiajn faktorojn de religio oni nomas: Timo, fantazio, sonĝo, bezono de kaŭzeco, sento de dependeco, deziroj, moralaj sentoj, moralaj idealoj, bezono de rekompenco k. a. - Antaŭŝtupoj de religio estas ofte nomataj naturreligioj, sed ne tute ĝuste, ĉar per tiu nomo jam stoikuloj nomis religion racian kaj ankaŭ nun oni pravigas raciaĵon kiel naturaĵon. Kaj diri *natur*-religio en signifo ana-

logia al natur-scienco enhavas kontraŭdiron en la vorto mem, ĉar religieco estas ja ĉiam super- aŭ eksternatura. Ĉiuj antaŭŝtupoj de la religio estas karakterizataj per tio, ke ili plivastigas la koncepton de la mondo transigante ĝiajn limojn en metafizikon kaj psikologion. La etika fianko estas en ili nur tre malmulte evoluinta. Iliaj nomoj estas: Animismo (pan-vitalismo, hilozoismo), Spiritismo, Fetiĉismo, Animalismo, Totemismo. Manismo, Demonismo. - El 1800 milionoj da homoj estas č. 245 milionoj mahometanoj, 230 milionoj bramananoj, 320 milionoj konfucanoj, 240 milionoj budaanoj, 14 milionoj judoj, 72 milionoj aliaj. Kontraŭ tiuj 1121 milionoj estas 678 milionoj kristanoj, inter kiuj estas 320 milionoj katolikoj, 200 milionoj protestantoj, 158 milionoj ortodoksuloj kaj ceteraj. Da kristanaj sektoj estas pli ol 500, da nekrisianaj sektoj ankoraŭ multe pli.

**Sankcio** *a. sanction, č. sankce, sankcia, f. sanction, g. Sanktion.*
Aro de rekompencoj aŭ punoj sekvanta la obeon aŭ malobeon de la moralaj ordonoj. Sankcio estas aŭ natura (konsekvencoj korpaj kaj animaj), aŭ laŭleĝa, de leĝo fiksita (punoj, rekompencoj, premioj), aŭ morala, interna, ĉu individua (konsento aŭ malkonsento de la konscienco, de morala konvinko) ĉu socia (laŭdo aŭ mallaŭdo de la publika opinio), aŭ sankcio de la estonta vivo, religia, postmorta, rezultanta el la dia aŭtoritato kaj el la nemortebleco de la animo.

**Sensaco** *a. sensation, č. počitek, počitok, f. sensation, g. Empfindung.*
Baza nocio psikologia. La plej era elemento de kono. Difini ĝin oni ne povas same, kiel oni ne povas difini la konon mem. Sed oni povas ĝin priskribi kaj komparante ĝin kun aliaj fenomenoj klarigi ĝian signifon. Sensaco estas elementa fakto

de konscio, senigita de ĉia sento agrabla aŭ malagrabla. Oni ĝin klare distingas de objekto, kiu ĝin elvokas, kaj de modifo fiziologia, kiu ĝin kondiĉas. La sensaco estas do fenomeno absolute origina laŭ sia esenco kaj tute distinga de ĉiu fenomeno materia. Ĝi estas fakto de konscio kaj nenio alia plu. El ĝia kvalita esenco sekvas, ke en si mem la sensaco ne povas esti alimaniere observata ol per introspekto, kaj ke ĝi povas esti pli aŭ malpli intensa, sed tre maltaŭgas por ia ajn maniero de mezurado aŭ kombinado. Por ke la psikologia fenomeno de sensaco okazu, estas bezonaj iuj fiziologiaj kondiĉoj. El ili konsistas mekanismo de sensacado. Estas bezone, ke periferia organo estu ekscitita de objekto, ke tiu ĉi ekscito estu per taŭgaj nervoj transigita al nervaj centroj, nome al la cerbo, kaj ke la cerbo respondu al la ekscito per du vitalaj reakcioj samtempaj: fiziologia kaj psikologia. En tio konsistas la sensaco. Ĉiuj sensacoj influas iel la subjekton kaj per ili la subjekto reprezentas sin mem al si. Sed kelkaj prezentas al la subjekto la objekton kiel aĵon distingan de la subjekto; ili estas nomataj sensacoj reprezentaj; la ceteraj, limigantaj sin sole je modifo de konscio, estas nomataj *sensacoj afekciaj*. Do la nomo sensaco reprezenta (ofte oni diras sole sensaco) esprimas sole konscian reakcion de subjekto al ekscito de iu ĝia sensa organo per iu objekto. Ĝi estas la plej simpla reakcio sen ia ajn juĝo pri esenco, ekzisto aŭ ekstereco de la objekto. Ekz.: Vidi ruĝan koloron estas reprezenta sensaco; konscii pri ektimo estas afekcia sensaco. Estas klare, ke sensacoj laŭ sia deveno estas nocioj artefaritaj, devenintaj el scienca abstraktado. Neniam povas iu sperti unusolan sensacon, ĉiam ni spertas aron de sensacoj samtempaj; tio estas percepto. Ni povas sperti, aŭ havi travivaĵon, aŭ simple ni povas samtempe vidi, tuŝi kaj flari rozon en nia mano; ni perceptas ĝin. Por ebligi analizon de tiu ĉi komplika spertaĵo, la psikologio provis disigi ĝin je spertaĵeroj kiom eble plej elementaj kaj

provis difini ilin kiel eble plej precize, por ke estiĝu el ili uzeblaj nocioj. Tiel naskiĝis ideo de sensacoj. Oni povas ilin eĉ klasigi laŭ kvalito je: prem-, varm-, malvarm-, dolor-, gustum-, flar-, son- kaj lum-sensacoj. Oni eĉ provis mezuri dependon de intenso de la sensaco de la grandeco de la ekscito. Tion provis la unuan fojon Ernst Heinrich *Weber*. Li trovis (1834), ke ŝanĝo de premo de peziloj sur malfermitan manon kuŝantan sur tablo estas konstatebla nur, se la pezo de peziloj ŝanĝiĝas po 10 unuoj. Similajn observojn li faris ankaŭ pri sensacoj de aliaj sensoj kaj konkludis el tio pri ekzisto de regulo nomata laŭ li Webera leĝo: Por ke diferenco en la koncerna sensaco estu rimarkebla, devas esti pligrandiĝo de la ekscito en konstanta rilato kun ĝia komenca grandeco. Ju pli forta estas la ekscito, des pli granda devas esti ĝia pligrandigo. Se ekz. por fari rimarkebla ŝanĝon de premo, oni estas devigata aldoni 1/10 da pezilo al 1 kg, do al 2 kg oni estas devigata aldoni 2/10, al 3 kg tri dekonojn kaj tiel plu. Gustav Theodor *Fechner* (1801- 1887) pliampleksigis tiun leĝon. Laŭ li respondas al relative egalaj diferencoj de ekscitoj egalaj diferencoj de sensacoj. Se la ekscitoj kreskas laŭ geometria progresio (l, 2, 4, 8, 16. . . ) kreskas intensecoj de sensacoj laŭ progresio aritmetika (1, 2, 3, 4, 5. . . ). Esprimite laŭ matematikaj terminoj: Intenseco de sensacoj kreskas proporcie kun logaritmo de ekscit-grandeco. Pli posta kaj pli detala esplorado montris, ke tiuj ĉi du psikofizikaj leĝoj validas nur proksimume kaj pri mezaj valoroj intensecaj; pri malfortaj kaj tre fortaj ekscitoj ili tute ne validas. Tamen trovo de tiuj ĉi reguloj tre konvinke montras utilecon de nocio tiel abstraktita kiel estas la sensaco. Ĝi estas elanalizita el kruda sperto de perceptoj por ebligi laŭcelan observadon kaj esploradon de sperto tro komplika pro ĝia komplekseco.

**Sento** *a. feeling, č. cit, f. sentiment, g. Gefühl.*

Plej ĝenerale: Konsciiĝo pri ĝenerala farto de nia mi kiel tuto. Tiu konsciiĝo naskiĝas en ĉiu aparta okazo kiel reakcio de la daŭranta stato kontraŭ ia ŝanĝo sekvanta post iu ekstera aŭ interna afekcio; ne gravas ĉu la afekcio dume fariĝis perceptaĵo aŭ imagaĵo. Malofte la filozofoj esploradis la sento-kapablon homan sen ia alia intereso krom la pure scia. Preskaŭ ĉiam ili observadis sentajn fenomenojn kun celoj apartaj, intencante apogi diversajn teoriojn psikologiajn, etikajn, noetikajn. Plej ofte gvidis ilin tia intereso rigardi la sentajn fenomenojn kvazaŭ akcesorajn; eble ankaŭ pro tio ili malofle venis al zorga analizo de la koncernaj vortoj en la vulgara lingvo. Sed pri la pli intensaj sentoj vigle interesis sin ĉiuj filozofiaj skoloj esperante trovi en tia studo pluajn pruvojn por siaj teorioj. Ankaŭ la nefakula filozofia meditado turnadis sian intereson precipe al pasioj. Tiel naskiĝis per kunlaborado de teknika filozofado kaj popola meditado en ĉiuj lingvoj aro da diversaj ne tute precizaj vortoj por sentaj fenomenoj, kiun ĥaoson forigi ne povas provizore eĉ lingvo artefarita; tial la enhavo de terminoj sento, emocio, pasio ne estas precize difinebla. Plej ofte oni distingas jene: sento estas termino plej ĝenerala kaj samtempe vulgara vorto por esprimi ĉiun ŝanĝon en humoro; emocioj estas sentoj pli intensaj aŭ la termino esprimas senton, kiu estas studata aŭ studebla pro psikologia intenco; pasio estas la plej intensa sento. Sed en vulgara psikologio estas nomata ofte sento ĉio, kion oni ne povas difini klare kiel penson aŭ imagaĵon. "Kaj estas homoj, kiuj tiun ĥaoson de nocioj, kie oni povas facile en malklaro fiŝojn kapti, volas je neniu prezo forlasi. Tie ĉi estas minejo por oportunaj konoj, kiujn oni ne bezonas pruvadi, tie ĉi ŝajnas la misteraj profundoj de la homa spirito malfermiĝantaj, tie ĉi estas azilo por fuĝantoj el sobra klareco de la scienca kono. Sed psikologio klopodas venigi lumon ankaŭ en tiun ĉi malluman teritorion de la homa animvivo; ĝi trovas, ke krom

la intuo kaj pensado ne ekzistas ia kona funkcio, ke malklaraj nocioj estas ja malpli valoraj nocioj kaj ke konfuzigitaj imagoj estas imagoj bezonantaj plibonigon. Ĝi trovas, ke laŭ kondiĉoj eĉ neklara kono pri ĝusto povas esti pli bona ol sagaca trompo. Sed per tio ne estas dirite, ke klara kono de ĝustaĵo ne estas pli bona ol neklara, argumentita ne pli bona ol argumentota." (Dürr, Noetiko.)

**Sinergio** *a. synergy, č. synergie, synergia, f. synergie, g. Synergie.*

Kuna efiko de diversaj fortoj kaj funkcioj por ricevo de unu rezulto. Simileco de ago aŭ volo, el kiu estiĝas simpatio. "Unua stadio de simpatio konsistas en similiĝo de la movaj tendencoj; ĝi estas sinergio. Ĝi estas imitado en sia pli malalta grado. - Ĝi vidigas sin ĉe animaloj formantaj gregojn (ne societojn) kiel gregoj de ŝafoj, aŭ hundoj, kiuj kuras, haltas, bojas ĉiuj en la sama tempo pro imitado pure korpa." (Ribot, Psikologio de sentoj. ) En sociologion enkondukis la vorton Lester Ward (1903), kiu rigardas s-n universala principo difinante ĝin: "Sintezo de laboro aŭ sinteza laboro." La sama sinergio estiganta stelajn sistemojn, kemiajn sintezojn kaj organismojn estigas ankaŭ sociajn ligojn kaj societojn inter homoj. La sinergia procedo, kiam ni konvinkiĝis pri ĝia utileco kaj signifo por bono de la homaro, povas fariĝi objekto de volo, ĝia apliko fariĝas devo. Tia sistema apliko de sinergio kiel principo en noetiko, metafiziko, etiko, sociologio estas kelkfoje nomata sinergiismo. Ankaŭ oni nomis sinergiismo religian doktrinon de Pelagianoj, laŭ kiu por savo de la homo estas ĝia aktiva kunlaboro necesa; kontraŭe instruis sankta Aŭgusteno, ke savo estas ebla ekskluzive per Dio.

**Singularismo** *a. singularism, č. singularizmus, g. Singularismus.*

Filozofia vidmaniero, laŭ kiu sub la plej diversaj fenomenoj ekzistas unusola, la plej lasta, kaŭzo de la universo, unusola fundamenta substanco, baza ŝtofo, praaĵo aŭ praforto, unu baza principo, unueco de universo. Tiu ĉi praesenco aŭ praesto (aŭ alie nomata praideo) estas simpla, senfina, sendifina, el ĝi estiĝas ĉia multeco kaj diverseco. Kompreneble la ĉefa malfacilaĵo estas, kiel derivi el la unusoleco la diversecon, el la singulareco la pluralecon. Samsignifa, sed malpli ampleksa kaj pli ofte uzata, estas monismo, kontraŭo estas pluralismo.

**Sinkretismo** *a. syncretism, č. synkretizmus, f. syncretisme, g. Syncretismus.*
Kunigo de divers-originaj tezoj kaj ideoj en tuton, kie ilia kontrasteco kaj malkonsento estas malvidigata. Ofte uzata en malŝatiga senco. Prefere oni nomas tiel religian miksaĵon en la malfrua antiko. En la 16-a jarcento oni nomis sinkretistoj filozofojn volantajn kompromisi inter Platono kaj Aristotelo.

**Sintezo** *a. synthesis, č. sklad, synteza, f. synthese, g. Synthese.*
Kombino de aro en unuecon, de partoj en tuton, de pluraj signoj en unu nocion, preno de multaj diversaj faktoj sub unu klarigan principon. Ĉiu sintezo estigas novspecan produkton, kies ecoj ne estas sumoj de la sintezitaj komponantoj, sed rezultoj de la ĉia kuniĝo kaj traiĝo. Ekz. per kombino de fero kaj sulfuro estiĝas unu nova ŝtofo, ferosulfido, kiu ne estas miksaĵo de la ambaŭ ŝtofoj sintezitaj sed nova kombinaĵo. Kontraŭo: Analizo. En la *Hegela* dialektiko s. estas la tria grado, kiu kunigas en si la ambaŭ gradojn subajn kaj kontraŭajn (tezon kaj antitezon) en nocion pli altan, forigantan tiujn kontraŭojn kaj sintezantan ilin en pli superan unuecon.
*Sinteza metodo*, kiu iras kvazaŭ malsupren de la rezulto, de tezo al argumentado, de principo al fenomenoj klarigotaj, de ĝeneralaĵoj al apartaĵoj. Kontraŭo: m. analiza.

*Sinteza propozicio*. Juĝo, kies predikato eldiras pri subjekto ion, kio ne estas en la subjekto necese enhavita, do ion novan. Sintezaj juĝoj estiĝas post ia sperto kaj pligrandigas nian scion.

**Skeptikismo** *a. scepticism, č. skepticizmus, f. scepticisme, g. Skepticismus.*
*Noetika*: neas eblecon de kono aŭ dubas pri ĝi aŭ almenaŭ dubas pri certeco de kono. Maksimume ĝi allasas relativecon aŭ subjektivecon de la kono aŭ ĝi almenaŭ atentigas pri malfacilecoj de perceptado kaj pensado. Radikala skeptikismo estas esence dogma. Fruktodona estas nur skeptikismo kiel instigo por esplorado; el ĝia dubemo naskiĝas noetiko. Skeptikon, dubemon, deklaris Descartes la ĉefa kaj plej utila metodo por filozofado. El dubo pri ĉio oni povas veni al propozicioj veraj aŭ proksimaj al la vero. "Ne por ke mi imitu en tio skeptikulojn, kiuj dubas sole por dubi kaj afektas kvazaŭ ili estus ĉiam sendecidaj. . . (Metodo, III, 6). "Skeptikismo estas ripozejo ne loĝejo por la racio." (Kant). Etika s. proklamas neeblecon starigi fiksajn, precizajn normojn etikajn pro grandaj ŝanĝemo kaj diverseco de moroj kaj moralaj principoj. Ĝi predikas ekstreman relativismon kaj subjektivismon; se ĝi estas ekstreme radikala, senmoralismon. Kontraŭo: Dogmismo. - Antika skeptikismo naskiĝas kiel reakcio kontraŭ la dogmisma metafiziko; ĝia ĉefa reprezentanto estas *Pyrrhon* (360-270 a. K.); laŭ li nenio estas en realo bela aŭ malbela, justa aŭ maljusta, ĉia valorigo dependas de la homo kaj de la moro. La aĵoj estas al nia kono neatingeblaj; tial decas al saĝulo abstinenci de ĉiu juĝo. Lin sekvis pli poste *Arkesilaos, Karneades, Ainesidemos, Sextus Empiricus*. En la moderna epoko estas dubo pri ebleco trovi la nerelativan veron iam uzata por rekomendi kredon al religiaj

veroj; tial kelkaj gravaj skeptikuloj predikis revenon al eklezia religio, ekz. *Pascal, Lamenais, Montaigne, Pierre Bayle.* Per kritikismo estas la homa pensado gvidata el senrezulta skeptiko.

**Skolastiko** *a. scholatic philosophy, č. scholastika, f. scolastique, g. Scholastik.*
Dua periodo de filozofio en kristana epoko. Ĝi estis filozofado dum la mezepoko. De la patristiko ĝi diferencas precipe en tio, ke skolastiko rekonas filozofion kiel memstaran sciencon, bazantan sur propraj principoj kaj metodoj, kiuj estas tute diferencaj de tiuj, kiuj estas bazo kaj iloj de teologio. Harmonio de ambaŭ manieroj de kono, de filozofia kaj teologia, estas supozata kaj al la kristana doktrinaro estas atribuata normiga signifo por la filozofia pensado. La mezepoka pensado estas malgraŭ ŝato de filozofio kiel aparta scienco komplete estrata de religieca vidpunkto. Religieco estas ĝia elirpunkto kaj same ĝia principa intereso. Ĝi manifestiĝas ankaŭ en tio, ke ĉefaj mezepokaj pensuloj estas teologoj. Skolastiko ricevis sian formon kaj enhavon de *la Aristotela* sistemo, en kiu tamen ĉe grandaj metafizikaj problemoj estas konservataj kaj enmetataj ideoj de novoplatonismo. Specifeco de skolastiko estas ĉefe en ĝia metodo. En XI. jarcento, la unua florperiodo de skolastiko, estis ĝia unusola celo kaj tasko pruvi, ke la religiaj veroj necese estas samtempe ankaŭ raciaj veroj. Filozofio estis servistino de la teologio (*ancilla theologiae*). Ĝuste la supersenseco de la problemoj instigas kaj ekzercigas la sagacecon de la intelekto de skolastikuloj. Ili inventas la ontologian metodon, kiu klopodas pruvi la veran ekziston de objekio el ĝia nocio. Tia estas pruvo pri ekzisto de Dio, kies aŭtoro estas s-a Anselmo. Oni dividas skolastikon je kvar periodoj: 1. Antaŭ-skolastiko, pleniganta precipe la IX.

jarcenton. 2. Frua skolasliko, epoko de fundamentigo, XI. - XII. jarcento. 3. Floro de skolastiko, epoko de grandaj sistemoj, 1200-1340. 4. Malfrua skolastiko, epoko de fiksigo de sistemoj, manko de novaj ideoj, resto en malnovaj formoj kaj malkompono de la tiama sintezo. La ĉefaj skolastikuloj estas: *Johannus Scotus Erigena, Roscellinus, Anselmo el Canterbury, Abaelard, Petrus Lombardus, Tomaso el Aquino* (la plej granda inter ili), *Duns Scotus, Wilhelm el Occam* k. a.

**Solipsismo** *a. solipsism, č. solipsizmus, f. solipsisme, g. Solipsismus.*
Ekstrema subjektiva idealismo, teoria kaj metafizika egoismo, laŭ kiu la unusola realo estas konscio de la ekkonanta homo. Nenio alia ol ĝi ekzistas, ĝi estas la unusola substanco, ĝiaj statoj kaj agoj estas la imagaĵoj. Ĉiuj perceptataj kaj imagataj objektoj ne ekzistas efektive sed nur kiel miaj imagoj. Kvankam la termino estas ofte uzata de verkistoj de la 18-a jarcento, estas konata nur unu severa solipsisto, kuracisto *Claude Brunet* klariginta tiun ĉi doktrinon en 1686. Laŭ *Schopenhauer* apartenas solipsisto en frenezulejon.

**Somnambulismo** *a. somnambulism, č. somnambulizmus, f. somnambulisme, g. Somnambulismus.*
Patologia stato similanta sonĝon, en kiu malsanulo dum normala dormo leviĝas, marŝas, parolas, agas kvazaŭ ĝi revus ne sole pasive (en imagoj) sed ankaŭ aktive (en faroj). Simila stato povas esti elvokita ankaŭ per hipnotigaj procedoj; tiam oni povas paroli pri s. artefarita kontraste kun la supre priskribita s. natura.

**Spiritismo** *a. spiritism, spiritualism, č. spiritizmus, f. spiritisme, g. Spiritismus.*

Konvinko, ke homaj animoj konsistas el speciala substanco nemateria (perisprito, astralo) sed tamen posedanta ian pezon, kaj ke tiuj animoj vivas post morto de la homo ekster la mondo alirebla per sensoj, eble en la supozata kvara dimensio de spaco. Tiuj animoj povas pere homoj posedantaj specialan kapablon por tio (*mediumoj*) kontakti kun la sensa mondo ĉu kaŭzante diversajn fenomenojn (frapetado de tableto, frapoj en muroj kaj plafonoj, leviĝo de objektoj) ĉu prenante sur sin videblajn formojn de strangaj staturoj (materiiĝo de spiritoj). La plej fama inter libroj kompilintaj teoriojn kaj atestojn pri spiritismaj fenomenoj estas Allan Kardec: Libro de spiritoj (Le Livre des Esprits) el j. 1853.

**Spiritualismo** *a. spiritualismus, č. spiritualizmus, f. spiritualisme, g. Spiritualismus.*
Metafizika doktrino, laŭ kiu la absoluta realo estas spirita, la korpoj estas produkto aŭ aperigo de spirito, la materio mem estas sole imago de la absoluia spirito. La tuta mondo alirebla per sensoj estas nur la ekstera formo de la spiritaj esenco kaj substanco. La mondo konsistas aŭ el spiritaj senkorpaj estaĵoj nedifinataj pli detale; aŭ el estaĵoj prezentataj kiel imagantaj (monadoj, animaj realoj); aŭ el volantaj spiritaj estaĵoj (volaj atomoj); aŭ el homogena psika substrato ebliganta reciprokan afekciadon de ĉiuj opaj fenomenoj (universala mi); aŭ el spirito, kies manifesiiĝo estas la universo (spirito de la mondo). Ofle estas s. nomata objektiva idealismo. Ĝia plej unua reprezentanto estas Leibniz (v. Monado). Pluaj: *Lofze, Berkeley, Fichfe, Hegel k.* a. Kontraŭo: Materialismo.

**Subjektiva** *a. subjective, č. subjektivní, subjektívny, f. subjectif, g. subjektiv.*
Persona, individua, singulara, aparta. Kio apartenas al la homa menso, kio estas ekskluzive pensata kaj neniam povas enveni

en la korpan materian mondon. Plej ofte estas substrekata ekkona flanko de la subjektivaj travivaĵoj, sed iam ankaŭ la senta flanko.

**Subjektivismo** *a. subjectivism, č. subjektivizmus, f. subjectivisme, g. Subjektivismus.*
Noetika tendenco substrekanta, kiom la homa ekkono dependas de la ekkonanta individuo (subjekto). Ni ne ekkonas la objektojn, kiaj ili estas en si mem, sed, kiaj ili aspektas al ni, nur en ilia rilato al subjekto: (S. genra, relativismo, idealismo subjektiva, fenomenismo). Konvinko, ke kono validas sole por unuopa homa individuo (solipsismo). Etika s. vidas la plej altan bonon en subjektiva stato de kontenteco, bonfarto, plezuro kaj havas diversajn formojn inter hedonismo kaj eŭdaimonismo. Etikajn normojn universale validantajn ĝi ne akceptas sed sole normojn ŝanĝiĝantajn laŭ individuo, kiun ili koncernus. Bono kaj malbono estas sole subjektivaj konceptaĵoj. Noetikaj subjektivistoj estis jam grekaj sofistoj kaj kirenaikanoj. Ankaŭ modernaj pragmatistoj kaj Simmel estas proksimaj al subjektivismo. Etika subjektivisto estis M. Stirner.

**Subjekto** *a. subject, č. podmět, podmet, f. sujet, g. Subjekt.*
En logiko: Tio, pri kio oni parolas en propozicio, kontraŭe al tio, kion oni pri ĝi asertas aŭ neas. "Moderna logiko estis alkondukita distingi du partojn de la propozicio: subjekton kaj tion, kion oni asertas pri tiu subjekto; ĉar oni povus tion aserti pri iu alia subjekto, oni estas kondukata konsideri tiun subjekton kvazaŭ varianton s, kies funkcio estas predikato." *(Couturat,* Pri logika strukturo de la lingvo, 1912). En kritika psikologio *s. dekono* estas estaĵo, kiu ekkonas, pritraktata ne laŭ siaj individuaj apartaĵoj sed kiel necesa kondiĉo, por ke

diversaj eroj de imagado kuniĝu en tuton reprezentantan objekton. *Subjekta*: koncernanta subjekton.

**Substanco** *a. substance, č. substance, substancia, f. substance, g. Substanz.*
Kio estas senŝanĝa kaj daŭra sub la fenomenoj. Kio efektive kaj daŭre ekzistas sub la transformiĝanta supraĵo de la aĵoj. La esenco de mondo perceptebla per sensoj, sed esenco efektive ekzistanta ne nur imagebla. Trovi, ĉu laŭvere ekzistas ia subatanco, ĉu estas unusola aŭ pluraj, kiaj estas ĝiaj kvalitoj aŭ ĉu ĝi estas tute senkvalita, estis la principa problemo de ĉiaj metafizikoj depost la greka. Descartes supozas tri substancojn: absolutan, tio estas Dion, kaj du kreitajn; unu el ili estas anima, karakterizata per pensado, la dua materia, karakterizata per plenigado de spaco. Spinoza supozas unusolan substancon: "Tio kio estas en si mem kaj per si mem estas konceptata; tio estas tio, kies konceptaĵo por estiĝi ne bezonas konceptaĵon de alia aĵo" (Etiko, I. dif. 3.); s. estas laŭ li senfina kaj oni povas nomi ĝin aŭ Dio aŭ naturo; la apartaj aĵoj kaj imagaĵoj estas modusoj de la eterna substanco. Laŭ *D. Hume* substanco estas fikcio. Laŭ *Schopenhauer* ĝi egalas materion. En la pli nova filozofio estas substanco rigardata nur kiel aro da kvalitoj, kunigo de ecoj, objektivigita sintezo de impresoj aŭ nur kutimo konstante kunigadi certajn perceptojn aŭ kvalitojn, aŭ imagaĵo pri kuna aparteno de certaj kvalitoj.

**Superhomo** *a. superman, č. nadčlověk, nadčlovek, f. surhomme, g. Übermensch.*
Vorto uzita ĉeokaze de Herder, Gothe k. a. sed popularigita de Fr. Nietzsche: "En la homaro estas ekpaŝonta sur lumon ia pli forta speco, pli alta tipo, kiu havos aliajn kondiĉojn de estiĝo kaj daŭro ol la mezhomo. Mia nocio, mia simbolo por tiu ĉi

tipo estas, kiel sciate, la vorto superhomo." ("Volo al potenco"). En la samtempa literaturo kaj filozofio la nocio disvastiĝis kaj prenis enhavon diversmaniere derivitan de tiu ĉi.

**Supernaturalismo** *a. supranaturalism, č. supranaturalizmus, f. supernaturalisme, supranaturalisme, surnaturalisme, g. Supranaturalismus.*
Tendenco de filozofado krediganta, ke krom la racio kaj ceteraj faktoroj naturaj ekzistas kaj helpas pli profundan konon ankoraŭ fortoj supernaturaj: volo kaj revelacio Diaj, ekstazo, intuicio kaj similaj efikantoj. Ili konigas al homo realaĵojn supernaturajn. Alia nomo de tiu ĉi s. filozofia estas superracionalismo. S. etika metas celon de la vivo en mondon superan, en mondon "sur la alia bordo", por kiu tiu ĉi surtera vivo estas sole preparo. Tial ĝi postulas, ke la homo subpremu siajn naturajn instinktojn kaj tendencojn; idealo por ĝi estas vivo asketa, rifuzanta al si la ĝenerale ŝatatajn ĝuojn.

**Tabula rasa** *(l. tabulo glata, moderne: pura paperfolio).*
Simbolo esprimanta sensualisman opinion, ke ne ekzistas denaskaj ideoj, kiuj estus ekzistantaj en la animo tuj depost naskiĝo de la infano, sed ke la animo estas sen iaj ajn ideoj kaj ke ĉiuj en ĝi estiĝas per sperto, ke ĉiuj konceptaĵoj eniras en ĝin per sensoj, ke per sensaj perceptoj komencas la anima vivo.

**Tabuo** *a. taboo, č. tabu, f. tabou, g. Tabu.*
Polinezia vorto signifanta ĉe primitivaj popoloj, ke iu persono aŭ objekto posedas potencon transigi malfeliĉon aŭ malagrablan akcidenton al ĉiu ĝin tuŝinta. Malpermeso tuŝi la tabu-objekton ne devenas el iu kaŭzo praktika kaj la motivo de puno estas eksternatura. La homo tuŝinta tabuon ekz. mortas

aŭ blindiĝas. Personoj posedantaj la tabu-potencon povas ĝin transdoni al ia objekto simple per tuŝo de sia mano. Iam oni konjektas, ke el ideo de tabu naskiĝis la unuaj etikaj ideoj.

**Taŭtologio** *a. tautology, č. tautologie. tautologia, f. tautologie, g. Teutologie.*
1. Propozicio pri identeco, en kiu subjekto kaj predikato estas la samaj nocioj esprimitaj per la samaj aŭ aliaj vortoj. 2. Malĝusta difino, difino per cirklo, kie la difinata nocio estas klarigata per si mem, per la sama nocio sed per alia vorto. Ekz.: La belo estas tio, kio plaĉas.

**Teismo** *a. theism, č. teizmus, f. théisme, g. Theismus.*
Metafizika instruo metanta kiel kaŭzon de la mondo personan Dion, tio estas supernaturan estaĵon, kiu ekzistas ekster la mondo, konscias sin mem same kiel la mondon, estante de la mondo esence diferenca, ĉar li la mondon kreis, konservas kaj regas pro decido de sia propra sendependa volo. Dio estas absoluta racio, ĉionpova, la plej bona kaj la plej justa, ĉieest-anta. Teismo estas metafiziko de la kristana religio, sian sistemigon ĝi ricevis de s-a Tomaso el Aquino. Laŭ li ni ne konas la esencon de Dio senpere, sed nur per ĝiaj efikoj. Esto de Dio estas identa kun lia esenco, tial lia ekzisto devus esti deduktebla el lia esenco, kiel montris jam s-a Anselmo. Ni ne povas scii, kio estas Dio en si mem, sed tamen ni povas aserti, ke ĝi estas estaĵo, kies substanco estas ĝi mem, kaj kiu distingiĝas de la ceteraj kreitaĵoj.

**Telekinezo** *f. telekinese, č. telekinesis, g. Telekinese.*
Laŭ asertoj de spiritistoj fenomeno, ke kelkaj personoj, la "mediumaj", posedas potencon movigi la objektojn neniel ilin tuŝante. Plej ofte estas priskribataj malsupreniro de unu

pesiltelero, super kiu mediumo tenas la manon, kaj eksono de gitara kordo en apuda ĉambro.

**Teleologio** *a. teleology, č. teleologie, teleologia, f. teleologie, g. Teleologie.*
Doktrino, ke ekzistas celo en universo aŭ almenaŭ celoj en partoj de la universo. Metodo klarigadi fenomenaron per celo ekzistanta en la klarigata fenomeno aŭ ekster ĝi. Severa mekanismo estas kontraŭ-teleologia. Biologiaj sciencoj precipe fiziologio klarigas preskaŭ ĉiam la organojn kaj iliajn funkciojn kiel plenumantojn de iuj celoj. La sciencoj pri ne-viva naturo klarigas kontraŭe la fenomenojn kiel rezultalojn el iuj kaŭzoj. Ideo de energio estas kunigata kun ideo de kaŭzeco, ideo de vitala forto estas kunigata kun ideo de celeco. Konscia agado de homoj estas laŭ ĝenerala sperto ĉiam regata de celo. Tial oni kun granda probableco supozas, ke ankaŭ ĝia konduto de animaloj estas destinata de celo.

**Telepatio** *a. telepathy, č. telepatie, telepatia, f. telepathie, g. Telepathie.*
Psikologia fenomeno (kies efektiveco ne estas de ĉiuj asertata), ke pensoj aŭ imagoj povas transiĝi el unu menso en la alian senpere, t. e. sen parola aŭ alimaniera esprimo, sole kiel pensoj, kaj ke tiu transiro povas okazi eĉ trans grandaj distancoj. Laŭ la samaj asertantoj ekzistas ankaŭ telepatiaj halucinacioj, kiam persono ekvidas aŭ ekaŭdas okazaĵojn, kiujn ĝi ne povas percepti per kutimaj perceptmanieroj.

**Temperamento** *a. temper, č. temperament, f. temperament, g. Temperament.*
Termino tre vasta, kiu signifas emocian konstituon de individuo, ĝian heredan emociemon kaj emocieblon kaj tipecon de ĝiaj emociaj reakcioj. Same indikas talento

konstituon intelektan, karaktero konstituon volecan. La teorio pri temperamentoj estis unuan fojon formulita de la greka kuracisto Galeno (l31-210 post Kristo), kies klaisigo atentas samtempe fortecon kaj daŭrecon de la emociaj reakcioj. Oni ricevas jenan skemon:

| *Reakcio* | *Forta* | *Malforta* |
|---|---|---|
| *Rapida* | *Kolerika* | *Sangvina* |
| *Malrapida* | *Melankolia* | *Flegma* |

Kolerika temperamento estas facile ekscitema al fortaj emocioj, sed same facile forturnema; flegma temperamento ekscitiĝas malrapide al emocioj malfortaj; simile oni povas priskribi la ceterajn temperamentojn. Tiu ĉi klasigo de temperamentoj estis eminenta divido, ĉar ĝi restis uzebla ĝis niaj tagoj. Nur en la 18-a jarcento oni provas anstataŭi klasigon Galenan per iu alia. Sed nur niaj tagoj alportis provojn, kiuj eble povos esti pliuzeblaj ol la klasika divido. La plej grandan sukceson ricevis germana psikologo *Kretschmann* per sia verko "Korpa konstituo kaj karaktero" (1921). Kretschmann montras, kiom kaj kiel la homaj temperamento kaj karaktero dependas de la korpaj ecoj, de la ĝenerala staturo kaj de kvalitoj de la diversaj korpaj organoj. Li dividas tri ĉefajn homajn tipojn.

1. *Piknika tipo* havas ĉiujn korpajn kavaĵojn rilate pli larĝajn (kranio, brusto, ventro, pelvo). La kapo estas afera, vizaĝo plena kun harmoniaj trajtoj, distanco inter frunto kaj supera lipo malgranda. Maksimuma alteco ĉe viroj 167 cm, ĉe virinoj 156. Manĝemo kaj trinkemo rimarkindaj, tial tendenco dikiĝi. Piknikuloj laŭregule estas societemaj, parolemaj, volonte oratoras, ne tro ordamaj, influeblaj facile de amasaj movadoj, kapablaj kunsenti kun la aliaj. lli estas bonaj laborantoj,

energiaj, kun kompreno por praktika vivo. Estas inter ili malmultaj matematikistoj, sed multaj natursciencistoj kaj kuracistoj. Inter ilin apartenas kondukantoj de revolucioj, same kiel majstroj de kompromiso. Konataj tipoj piknikaj estas *Humbold, Mirabeau, J. Hašek, Švehla, Privat.*

2. *Astenika tipo* estas longeca, la kapo sidas sur longa kolo, vizaĝo estas maldika, longeca, nazo tre elpenetras, mentono kvazaŭ perdiĝus malantaŭen, la korpa pezo estas subnormala. Signoj de maljuneco aperas baldaŭ. Ankaŭ spirite estas la astenikuloj inversuloj de la piknikuloj. Tre disvolvita estas ĉe ili senco por ilia propra persono, ili scias eluzi la societon por siaj propraj celoj, sian propran konvinkon ili nepre volas kaj scias altrudi al la ceteraj. Ilia celo ĝenerale estas alten metata, havu ĝi tendencon aŭ vaste homaranan aŭ malvaste egoisman; tial ni trovas inter astenikuloj plej multajn eminentajn virojn, sed same tre multajn fantaziulojn kaj tre multajn egoistojn, tiranojn, avarulojn. Iam oni trovas inter ili tre tipajn aristokratajn karakierojn. Ekzemplo de nobla astenikulo estas prezidenio *Masaryk*. Aliaj: *Hodza*, *Cart.*

3. *Atletika tipo* havas fortajn ostojn kaj muskolojn, precipe fortan zonon muskolan inter brakoj sur brusto. La brusto estas larĝa, kavaĵoj venira kaj pelva mallarĝaj, kapo osteca, frunto alta, mentono longforma, vizaĝo ovala. Haŭto forta, rigida, graseco normala. Spirite ili sufiĉe similas la astenikulojn, sed la plej karakteriza ilia trajto estas samtempe ĉe ili ekzistanta kapablo esti altgrade ekscitemaj kaj same indiferentemaj. Interne bolante la atletikuloj ekstere estas seninteresemaj. Inter ili estas plej ofte matematikistoj kaj belartistoj kun aristokrataj plaĉoj: ankaŭ tre multaj metafizikistoj apartenas inter ilin. Kiel ekzemplo estu citita skulptisto *Štursa*.

Estas memkomprenebla afero, ke la klasoj kreitaj de Kretschmann ne povas esti rigardataj kiel helpilo, kiu donus temperamenton de homo kiel unudirektan kvantecon; tion ja

neniu simila divido povos doni, ĉar homa individuo estas produkto de heredo, do plejparte ĝi estas tipo miksita, kiel Kretschmann prave argumentas. Lian dividon malaprobas *Klages*, kiu volas havi sole du ĉefajn tipojn temperamentajn: *abrupta* kaj *kvieta*; inter ili estus tuta vico de temperamentoj miksitaj.

**Teodiceo** *a. theodicee, theodicy, č. theodicea, f. theodicee, g. Theodicee.*
En pli vasta senco: parto de metafiziko traktanta pri Dio; tiel uzata ĝi anstataŭas malnovan terminon "natura teologio". Leibniz uzis tiun vorton por titolo de la verko traktanta pri Dia justeco, boneco, potenceco, libereco, pri la kreado kaj pri ekzisto de Dio; celo de tiu verko estas pravigi Dion pro kreo de la malbono en la mondo, nome pruvi, ke Dio estas la plej bona, kvankam li kreis ankaŭ malbonon en la mondo.

**Teologio** *a. theology, č. teologie, teologia, f. theologie, g. Theologie.*
Scienco pri Dio, liaj atributoj, liaj rilatoj al la mondo kaj al la homo. T. revelaciita, dogma, pozitiva apogas sin je parolo de Dio konservita en Sanktaj Libroj; t. *racia, natura* apogas sin je sperto kaj racio.

**Teorio** *a. theory, f. teorie. teoria, f. theorie, g. Theorie.*
En logiko sistema klarigo de granda grupo de fenomenoj per unusola hipotezo, kies valideco aperas tre ampleksa aŭ tre daŭra. - Teorio de kono = noetiko.

**Teoremo** *a. theorem, č. poučka, f. theoreme, g. Lehrsatz.*
Propozicio metita antaŭe, pri kiu oni volas pruvi, ke ĝi rezultas el aliaj, jam metitaj propozicioj. En tiu senco ĝi estas kontraŭa al difino, aksiomo, postulato, aliflanke al problemo. Antikva

signifo estis etimologia: spekulacia propozicio. Ekz. *Leibnitz* kontraŭmetas "teoremojn de la spekulacio" al "kanonoj de la praktiko." Tiu senco nun jam preskaŭ tute estas forgesita, sed oni iam uzas terminon teoremo, kiu pruvite fariĝas mem premiso de nova rezonado, en signifo de principo; sed tiam oni preskaŭ ne uzas ĝin sola, aldonante ĉiam distingon: ekz. teoremo pri la hipotenuza kvadrato, teoremo de Thales k. t. p.

**Teogofio** *a. teosophy, č. teosofie, teosofia, f. théosopbie, g. Theosophie.*

Pli supera scio pri Dio kaj sekretaj misteroj de la kreo. Kono tia estas akirebla nur per sento, fantazio, intuicio, ne per intelekto kaj racio. T. estas malnova movado celanta kunigon de antikvaj magiaj kaj mistikaj ideoj kun kristanismo kaj leĝoj, reguloj kaj hipotezoj de modernaj sciencoj kaj daŭre akiras rimarkindan nombron de anoj kaj simpatiantoj inier temperamentoj sopirantaj pri kontinua, sentrua, bildo de la universo precipe koncerne la kaŭzecon kaj celecon. Ĉar t. pretendas doni laŭ instruoj de "grandaj majstroj" plene fidindan kaj klaran scion pri: "deveno, celo kaj estonteco de la tuta homaro kaj de ĝia planedo; la sepopa naturo de la homo kaj de la universo; spirita organizo de la planedo kaj de la sunsistemo; leĝo pri rea enkorpiĝo de la homa animo; leĝo pri rekompenco (*Karma*); la vivo kaj stato post la morto; vojo kaj celo de la evoluo; adepteco kaj la granda frateco inter la adeptaro; danĝeroj de la spirita evoluado kaj ĝia superigo; kaŭzoj de doloro, malsano, malriĉeco kaj forigo de ili; spiritismo, mediumismo, magnetismo, hipnotismo ktp." En New York estis 1875 fondita "Teosofia societo" de Helene Petrovna Blavatska, akirinta laŭ sia aserto dum longa vivado sub Himalaja montaro sekretajn sciojn de budaistaj saĝuloj. Post ŝi transprenis la gvidadon de teosofia movado s-ino Annie *Besant*. Kiel celo de la Teosofia societo estas indikata: fratigo de la tuta homaro, ekzerco de la homa intelekto por

solvado de enigmo pri mondo kaj homaro, travivo de propra mi. En Germanujo estis t. societo fondita 1884 de Hübbe-Scheiden, sed 1913 okazis skismo per foriro de Rudolf Steiner, kiu fondis *Antroposofian societon* kaj movadon, kun preskaŭ identaj teorio kaj celo.

**Teratologio** *a. teratology, č. teratologie, teratologia, f. teratologie, g. Teratologie.*
Priskribo de malnormalaĵoj en organika naturo aŭ de malnormalaĵoj ĝenerale.

**Testo** *a. test, uzata same ĉ., f., g.*
Ekzameno uzata por determini ĉeeston aŭ gradon de iu kvalito fizika aŭ psika ĉe ekzamenata homo; ĝia metodo devas esti antaŭe fiksita kaj daŭre kontrolebla. Ekz. konstati la nombron de e, kiujn forgesis substreki la ekzamenato sur unu presita paĝo, estas testo por mezuri atentemon de la vida perceptemo. La termino estis enkondukita en psikologion de Keen *Cattel* en 1890. La uzado de testoj daŭre pligrandiĝas en mezuranta psikologio. Plej grandajn sukcesojn ĝi akiris en mezurado de inteligenteco.

**Tezo** *a. thesis, č. these, téza, f. these, g. These.*
Meto de iu doktrino, kiun oni volas pruvadi kontraŭ eblaj atakoj aŭ duboj. Dum kontraŭmeto al antitezo kaj sintezo ĝi signifas unuan membron de sistemo konsistanta el tri propozicioj, en kiu el la du unuaj kontraŭaj, tezo kaj antitezo, rezultas la tria la sintezo. Tion aplikis en sia dialektiko *Hegel. V.* Sinteza metodo.

**Timo** *a fear, č. strach, f. peur, g. Furcht.*
Emocio naskiĝanta en situacio, kiu postulas praktikan ĝustaranĝon; sed la malkapabliĝo devenas pli el malkutimeco

de la situacio ol el minacanta danĝero. Dum intensa timo nenia ĝustaranĝo estas ebla krom forkuro aŭ fuĝo; en ekstrema kazo eĉ tia ĝustaranĝo ne estas ebla. Timo estiĝas ankaŭ el atendado de neagrablaĵo; en tiu senco ĝi estas kontraŭo al espero. Timo apartenas inter la plej elementajn emociojn estante konsistebla sur ĉiu ŝtupo de la homa inteligento super ŝtupo de la sensaj refleksoj. Ĝi havas sian originon pli en atrangeco kaj sintrudeco de la okazaĵo ol en ia aperto pri malagrablaĵo. Laŭ observoj de J. B. Watson estas timo unu el la tri kondutoj, kun kiuj infano naskiĝas; ĝi vidigas sin ĉe infano ĉiam, se oni subite forigas subaĵon, sur kiu la infano kuŝas, aŭ se subite eksonas forta sono.

**Tomismo** *a. thomism, č. thomizmus, f. thomisme, g. Thomismus.*
Doktrinaro de sankta Tomaso el Aquino (1225-1274). Laŭ li estas preciza limo inter kredo kaj scio. Propozicioj de la revelacio aŭ de la kredo, misteraĵoj laŭ noetika vidmaniero, estas laŭ li nepruveblaj; raciaj argumentoj povas pruvi sole ilian versimilecon. En disputo inter nominalismo kaj realismo li staris sur kompromisa vidpunkto kliniĝante pli al nominalismo. Li supozas ekziston de persona Dio kreinta mondon el nenio kaj senmortecon de la individua homa animo, kiu estas nedetruebla, ĉar ĝi estas "pura formo". Sed la animo ne ekzistis antaŭ naskiĝo de la homo; la imagojn la animo akiras per perceptado, ne per rememorado kiel estis instruinta Platono. - Pli ĝenerale t. signifas doktrinaron apogantan sin sur tiu ĉi instruo. En la mezepoko ĝi estis metata kontraŭ *Scotismo* kaj *Occamismo*, en la moderna epoko uzas tiun nomon vigla tendenco prilabori rezultojn de la modernaj sciencoj en senco postulata de la katolika teologio. Gravan instigon ricevis tiu ĉi tendencaro de la papa encikliko

"*Aeterni pairis*" (De la eterna patro) eldonita de Leo XIII. en 1879. En ĝi estis t. proklamita oficiala filozofio de la katolika eklezio. Oni nomas tiun movadon ankaŭ novo-tomismo.

**Totemismo** *a. totemism, č. totemizmus, f. totemisme, g. Totemismus.*
Sociaj divido kaj organizo bazitaj sur ekzisto de totemoj.

**Totemo** *a., ĉ., f., g. Totem.*
Indiana vorto por nomi ian gentan grupon kaj ĝian simbolon, plej ofte beston. Krom la amerikaj ankaŭ australiaj gentoj uzas similajn simbolojn por dividi kaj nomi siajn grupojn. Klanoj de primitivaj homoj honorigas iun objekton (plej ofte animalon, iam ankaŭ vegetalon) atribuante al ĝi potencon gardan kaj regan. Ĝia bildo estas emblemo de la koncerna klano.

**Tranco** *a. trance, uzata senŝanĝe č. , f. , g.*
En spiritismo stato de mediumo, en kiu ĝi aperigas specialajn fenomenojn karakterizantajn ĝin ekz. parolojn de spiritoj de ĝi peratajn, levadon de objektoj k. s. Sed oni uzas tiun terminon ankaŭ por stato dum profunda hipnota dormo, ekstaza krizo, somnambula stato, ŝanĝoj de personeco, kelkaj kazoj de letargio.

**Transcenda** *a. transcendent, č. transcendentní, f. transcendent, g. transcendent.*
Kio superas nian sperton aŭ nian konscion, estas ekster limoj de nia kono, ekster tiu ĉi mondo ekkonebla per perceptado. Kontraŭo: Imanenta.

**Transcendental**a *a. transcendental, č. trenscendentální, transcendentálny, f. transcendental, g. transcendental.*

Koncernanta kondiĉojn de ĉia sperto, ne tiun sperton mem. Tiuj kondiĉoj de sperto ne estas necese donitaj empirie: La transcendentala esploro malatentas la aĵojn kaj celas trovi en nia intelekto la principojn ebligantajn al ni konon de la aĵoj. Laŭ Kant estas transcendentala ĉiu nia kono, kiu esploras ne la objektojn mem, sed nian manieron por ekkoni la objektojn. T. e.: ĉio estanta sole psika, alirebla sole al subjektiva ekkono, nuraj nocioj, ideoj, idealoj. Transcendentala estas meditanto, kiu atentas sole enhavojn de la konscio sen demandi, ĉu respondas al ili iu objektiva aĵo. Empiriaj imagaĵoj kaj nocioj fariĝas transcendentalaj ideoj, se ili rilatas al objektivaj per sensa sperto koneblaj objektoj; ili fariĝas nuraj pensaĵoj (transcendentalaj nocioj), se oni sen ia ajn sperto, ja eĉ sen ia ajn spertoebleco, supozas, ke apartenas al ili objektoj ekster la konscio. Transcendentalaj konkludoj, volantaj konduki nin trans teritorio de la ebla sperto en transcendon nealireblan al nia sperto, estas trompigaj kaj senbazaj. (Kant en Kritiko de pura racio).

**Transformismo** *a. transformism, č. transformizmus, f. transformisme, g. Transformismus.*
Biologia teorio, laŭ kiu specoj de vivaĵoj ne estas fiksaj sed transformiĝas pro influo de ŝanĝantaj situacioj, en kiuj ili vivas. Laŭ biologia vidpunkto ĝi estas pli ĝenerala ol evoluismo, laŭ vidpunkto filozofia pli speciala.

**Universalaĵoj** *a. universals, č. universalie, f. les universeus, g. Universalien.*
En skolastiko (1. universalie) ĝeneralaj ideoj, pri kies reala ekzisto disputis nominalismo kaj realismo. V. t. Laŭ s-a Tomaso "universalaĵo ne ekzistas sole *post rem* (post aĵo) en nia intelekto, sed ĝi ne ekzistas ankaŭ *in re* (en aĵo) en la opaj

aĵoj; ĝi ekzistas *ante rem* (antaŭ aĵo) en la Dia spirito. " (*Janet-Seailles*).

**Universalismo** *a. universelism, č. universalizmus, f. universalisme, g. Universalismus.*
En metafiziko doktrino, ke efektiva, substanca realo estas en genraj, ĝeneralaj kvalitoj, kiuj kuniĝas por estigi unuopaĵojn; kiele ili kuniĝas, estas problemo. En naturfilozofio opinio, ke vera kaj daŭra realo estas
en ĝeneralaj fortoj, substancoj, leĝoj dum opaj aĵoj estas nur maldaŭraj fenomenoj. En sociologio preferado de socio kiel tuto super individuojn. En etiko tendenco meti por celo de la homa agado tuton, homaron, socion, familion, klason, ne unuopulon. En religio proklamo de kuniĝo de opa individuo kun Dio kiel senco de universo. En logiko konvinko pri reala ekzisto de universalaĵoj. V. t.

**Utilismo** *a. utilitarianism, č. utilitarizmus, utilitariazmus, utilizmus, f. utilitarisme, g. Ulilitarismus.*
Etika dokirino, kiu identigas bonon kun utilo kaj vidas en utileco celon de morala agado. Unusola principo de niaj faroj estas intereso ĉu persona kaj aparta, ĉu komuna kaj ĝenerala. Laŭ tio utilismo diverse diferencas de egoisma kaj individueca, kiu atentas sole propran personan prosperon, ĝis u. simpatieca, socia kaj evolua. Filozofie disvolvita kaj argumentita estas nur tiu ĉi. Ĝia fondinto estas Jeremias *Bentham* (1748-1832), laŭ kiu celo kaj senco de la homa agado devas esti maksimumo de produktebla feliĉo, "la plej granda feliĉo de la plej granda nombro." Se ni plialtigas la bonfarton de la komuno, ni plialtigas ankaŭ bonfarton de ni mem. Kiel la fondinto ankaŭ la ceteraj ĉefaj partianoj de u. estis angloj. La plej influa inter ili estas J. St. *Mill.* Laŭ li "la kredo, kiu akceptas kiel principon de moralo utilecon aŭ

principon de la plej granda feliĉo, apogas konvinkon, ke agoj estas tiom bonaj, kiom ili tendencas pliigi feliĉon, malbonaj, kiom ili tendencas produkti la malon de feliĉo. Per feliĉo estas komprenata plezuro kaj foresto de doloro; per malfeliĉo doloro kaj foresto de plezuro" (Utilismo, 1863).

**Utopio** *a. utopia; č. utopie, utopia, f. ufopie, g. Utopie.*
Ideala ŝtato konstruita per penso en imago. La vorto kaj nocio devenas de anglo Thomas Morus, kiu titolis sian verkon pri ideala ŝtato Utopia (en 1516).

**Vitalismo** *a. vitalism, č. vitalizmus, f. vitalisme, g. Vitalismus.*
Biologia hipotezo kaj naturfilozofia doktrino, ke fenomenoj de la vivo havas sian kaŭzon en speciala forto de vivo analogia al energio de la neviva mondo, sed esence de ni distinga. La origina uzo franca ĉe *Barthez* (Novaj principoj de scienco pri homo, 1775) kaj ĉe tiama lia skolo akcentas ankaŭ esencan distingon de la forto psika. Moderna samtempa vitalismo konceptas la vivforton (vitalan forton) kiel konceptaĵon similan al energio nereduktebla al iu alia forto sed diferencantan de ĝi pro tio, ke ne validas pri ĝi la principo pri ĝia konservo. "Mi konsentus kun la vitalistoj, se ili simple volus akcepti, ke vivaj estaĵoj prezentas fenomenojn, kiuj ne estas trovataj en la senviva naturo kaj kiuj pro tio estas siaspecaj. Mi konsentas, ke manifestaĵoj de la vivo ne povas esti klarigitaj ekskluzive per fenomenoj fizike-kemiaj konataj en naturo senviva" (Cl. *Bernard* en Enkonduko al studado de eksperimenta kuracado). Henri *Bergson* nomigis la vitalan forton *vitala elano*. La plej sistema moderna vitalisto estas Hans *Driesch* (Vitalismo kiel historio kaj doktrino, 1905). Li uzis la aristotelan terminon enteleĥio por nomigi la vitalan forton. "Enteleĥio ne estas energio, ne estas forto, ne intenso, ne konstanto sed - enteleĥio." Plej facile komprenebla

diferenco inter energio kaj enteleĥio estas en aserto, ke inter fenomenoj energiaj validas principo de kaŭzo, inter la enteleĥiaj principo de celo.

**Voluntarismo** *a. volunturism, č. voluntarizmus, f. volontarisme, g. Voluntarismus.*
En *psikologio* doktrino, ke la fundamentaj fenomenoj psikaj estas aperaĵoj de la volo, ke volo estas baza funkcio de psiko. Kiel konvinko etika ĝi signifas, ke por senco de la vivo la ago kaj sento pli valoras ol meditato kaj rezonado. En metafiziko ideo de la volo estas transigita super ideon de la volo homa kaj tiu ĉi universa volo estas rigardata kiel aĵo en si mem, kiel esenco de monda ekzistado kaj daŭrado. Klasika filozofo de voluntarismo estas Arthur Schopenhauer (1788-1860). Volo vivi (Wille zum Leben) estas laŭ li universala principo de la instinkta klopodado, pro kiu ĉiu viva estaĵo efeklivigas tipon de sia speco kaj batalas kontraŭ la ceteraj specoj volante daŭrigi sian formon de vivo.

## Verkoj ĉefe uzitaj kiel fontoj kaj por komparo


M. *Baldwin*, Dictionary of Philosophy and Psychology New York, 1918-1920.

Rudolf *Eisler*, Wörterbuch der philosophischen Begriffe, 4. Auflage, Berlin, 1929.

Andre *Lelande*, Vocabulaire technique et critique de la Philosophie, Paris, 1928.

Heinrich *Schmidt*, Philosophisches Wörterbuch, 8. Auflage, Leipzig, 1930.

Edmond *Goblot*, Le vocabulaire philosophique, Paris 1920.

Josef *Král*, Filosofický slovníček, Praha, 1924.

P. *Trarbach*, Teknika vortaro Esperanta-germana-franca-angla por Pedagogio, Logiko kaj Psikologio. Horrem bei Köln.

Paul *Bennenmann,* Provo de esperanta terminaro pedagogia kaj psikologia. Internacia pedagogia revuo, IX. p. 146. , X. , p. 6.


## Mallongigoj uzitaj en la libro

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| a. | = | angle | l. | = | latine |
| č. | = | ĉeĥoslovake | s-a | = | sankta |
| ekz. | = | ekzemple | t. e. | = | tio estas |
| f. | = | france | t. n. | = | tiel nomita |
| g. | = | germane | V. | = | vidu |
| gr. | = | greke | V. t. | = | Vidu tie |
| j. | = | jaro | | | |